

Kongreso en Cuneo de la aprilo 2005

## Tritago prelegata de ekzegezisto **Alberto Maggi**

Pri la temo:

“ABSOLUTE NUR BONA LA DIO DE LA EVANGELIOJ”

### UNUA PRELEGO

Bonan vesperon al ĉiuj, dankon pro tiu partopreno, dankendaj la amikoj el Cuneo kiuj organizis vere, al mi ŝajnas, ekscelence tiun unuan renkonton. Renkonto kies temo estas: La ”la vizaĝo de Dio”. Metafora vizaĝo, vizaĝo por ideo, koncepto.

El si mem ne estus bezonate: fakte, se ni estas kredantaj aŭ praktikantaj ni devus posedi ideojn klarajn pri la vizaĝo de Dio. Ni vidos, male, en ĉi tiu tritago, ke bedaŭrinde ne estas tiel. Iomete pro nia malagemo, iomete pro ignoro, iomete pro la malsperto; tiaĵoj kune igas ke kiam oni parolas pri Dio oni diras multaĵon kiun eble ne koincidas kun tiu trovebla en la Sankta Skribo.

Ĉi-vespere ni provos kompreni antaŭ ĉio “Kiu Dio”, poste ek de morgaŭ matene ni komencos la ekzamenon pri evangeliaj eroj.

Se ni faru komparon inter la Dio je kiu kredis niaj geavoj, kaj tiu je kiu kredas ni kaj tiu je kiu kredas niaj gefiloj, ni jam malkovras ke ekzistas malsameco.

La Dio kiu estis sentigita al ni estas rimarkinde malsama el la Dio kiu estas sentigita hodiaŭ.

Tiam abruptas demando: kiamaniere tio okazas, ĉu ŝanĝiĝis Dio mem?

Ne, Dio ne ŝanĝiĝas. Laŭgrade de sia kresko, kaj en la kreskiĝo oni rekonas ĉiam la valoron de la digno de homo, la homaro senvualas ĉiam pli la vizaĝon de Dio. Laŭgrade la eklezio fidele enpenetras en la evangelian mesaĝon, do laŭgrade la vero pri Dio eniras en novan formuladon.

Ne estas Dio kiu ŝanĝas la homaron: estas la homaro mem kiu kreskas, kaj kun la homaro kreskas la eklezio; laŭgrade ke ĝi enradikiĝas en la fidelecon al la evangelio ĝi malkovras tiujn vizaĝojn de Dio kiuj ne estas novaĵo, ili ĉiam ĉeestis sed estis preskaŭ obskuraj sub diversaj spuraĵoj.

Tiu temo, pri la malkovro de la Dia vizaĝo, gravas; kial gravas? Ĉar multaj homoj, kaj vere multaj, forlasis la kredon, forlasis la eklezion pro erara interpreto rilate la noción pri Dio.

Estis prezentita iu Dia vizaĝo tiel fremda al la reala homa vivo, al la reala komfortaspiroj de homo, ke personoj, kutime tiuj kiuj rezonadis per sia kapo, ne povis ĝin ne rifuzi. La aliaj akceptadis ĉion sendistinge.

Vidu: en tiuj tagoj ni parolos plurfoje pri religio kaj uzos tiun terminon ĉiam kun malŝatiga malestimo. (Tiu vorto estas kiel instrumento por distingi tion vere religia el tio kontraŭreligia)

Kio farita de Jesuo ne estas enkalkulebla sub la voĉo **religio**, se sub la voĉo **fido** kaj ni vidos pliklare la sencon de la du terminoj. Ĉiukaze la efiko de la religio kontribuas kredindigi homojn, nome igi kredindaj aferojn kiujn eĉ la ularo kiu kutimas rezonadi per propra cerbo kaj deziras kompreni, ne kapablas rifuzi.

Fakte la religio sukcesas malklarigi la konsciencojn. Ĝi igas akceptebla la absurdon. Tiam tiu kontraŭdiro pri iu Dio kiu estas prezentita malamika al la plej malalta postulo de la homa racio, fakte favoris la naskiĝon de ateismo kaj bonvolu konsideri ke tio estas serioza afero: tion diras la lasta Vatikana Koncilio en la *Gaudium et Spes*. tie kie estas deklarite ke la responseco pri la naskiĝo de ateismo superŝvebas kredantojn - **“al la naskiĝo de ateismo povas kontribui ne malmulte la kredantoj”**<sup>1</sup> -

Tial ni, kiuj sin taksas kredantoj, estas responsaj pri ateismo pro tio ke ni malatentis edukiĝon pri nia kredo; kaj tio aŭ pro ignoro aŭ pro trompiga prezento pri kredinderoj. La akuzo trafas ĉiujn: la kredantaro pro nescio, pro malinteresiĝo, sed ankaŭ la pastoralo regantaro pro pridoktrina prezento erariga aŭ almenaŭ nekompleta: oni ŝajnas kunlabori pli al kaŝiĝo ol al manifestiĝo de la vera vizaĝo de Dio.

Kaj daŭrigas la Koncilio: “Tio kombiniĝas por ke multaj nekredantoj sin prezentu Dion laŭ maniero tia, ke la sama reprezentaĵo, kiun ili rifuzas, nenisence apartenas al la Evangelio”.

Uloj de mia generacio kiuj estis edukitaj koncepti Dion (ekzemple, oni kredigas, kaj tion kredis nun) ke unu sola mortiga peko vin sendas al la infero por la tuta eterneco. Ne estis proporcio inter la kulpo kaj la puno. Hodiaŭ, oni vidu, la homaro kreskis kaj kreskante ĝi komprenis ke jam la peno pri la ergastolo estas puno senproportia se komparata al la kulpo de la krimulo.

Nu, Dio pro unu sola mortiga peko pretiĝis vin sendi al la infero (kaj por miaj kungeneracianoj havis ampleksan gamon de elektoj: oni kredigis ke se vendrede vi manĝis mortadeltranĉaĵeton kaj hazarde misglutita maĉaĵo kaŭzis vian morton, vin sendante al la infero, ne nur laŭlonge de mil jarcentoj, sed laŭlonge de la tuta eterneco, en ĝi vi vere kuŝus poreterne.

Tiam rezonanta persono ĉe si enketadis: “Sed ĉu eblas ke tio okazu ĉe tiu Jesuo kiu ordonis ke ni, kiuj estas home etmensaj kaj neperfektaj, pardonu (kiom da foje?, sepdek fojojn, nome senmezure!)? Kial li, la Patro, ne kondutas samekzemple? Pro unusola trafo li kapablas venĝi laŭ la tuta eterneco!”<sup>2</sup>

Tiam tio kondukis multajn personojn, antaŭ tiaj proponoj pri iu Dio nerespektanta la karakterizojn de la Patro de Jesuo spruciĝantaj el la Evangelio, forlasis ĉion religiecan.

---

<sup>1</sup> (Noto de la tradukintoj). Iuj esprimoj en la tuta prelegaro povas dekomence ŝajni eksterkristanaj, sed iom post iom multo klariĝas kaj aperas vere ortodoksa, kvankam tie kaj tie bezona je pliaj nuancigoj kaj forigo de kontrastaj ekcesoj. Tiu noto funde koincidas kun la averto de la preleganto kiu ankoraŭ ne povis kontroli la registritajn tekstojn

<sup>2</sup> (Ndt) Tamen du estas ĉi-rilate la problemoj: la unua koncernas la koncepton men de mortiga peko (pri kiu ne eblas dubo), la alia rilatas al *kiam kaj kiel* tia peko realiĝas, kiuj ĉi-supre estas oportune diskutataj.

**Tial gravas havigi al si la ĝustan bildon pri Dio, ĉar el la rilato kiun oni travivas kun Dio dependas ankaŭ la rilato kiun oni travivas kun la homoj.**

La eklezio, ni devas tion proklami kaj rekonii!, tro malhaste kaj malurĝe modifas la predikatan vizaĝon de Dio. Sed, malgraŭ lia malrapideco, ĝi laste mallaste atingas la celon kaj la ĉiaman veron ĝi reformulas, iom post iom ĝi pli penetras la evangelian mesaĝon.

Unu sola ekzemplo: 1442 en la Ekumena Koncilio de Florenco

“Tiu Koncilio dekretas ke la Sankta Roma Eklezio senhezite kredas ke neniu ekstere de la Katolika Eklezio, nek paganoj, nek hebreoj, nek herezuloj aŭ skismoj partoprenos en la eterna vivo. Sed iros en la eternan fajron preparitan por la demono kaj por ties anĝeloj“. Tial la Eklezio de la XV jarcento instruis ke la muzulmanoj, la hebreoj kaj ankaŭ la nekatolikoj (tial ne sufiĉis esti kristanoj por sin savi, do ankaŭ la nekatolikoj) postmorte destiniĝas al la eterna fajro .

Kvin jarcentoj poste, alia Koncilio, la Dua Vatikana, en 1964 asertas ke ĉiuj personoj, do hebreoj, muzulmanoj kaj ankaŭ nekredantoj, kaj do tiuj kiuj obeas al sugestoj de sia konscienco, povas sin savi. Tial, ĉiuj personoj kiujn laŭjacentoj ni kredis falintaj inferen, per tia dekreto, neatendite revenas al Paradizo!

Ni priridas tion, sed demandendas, kaj al tio ni ne povas senkulpe rezigni: “ĉu ne okazos ke ĉiuj personoj kiujn ni hodiaŭ serioze kredas ekskluzivitaj el la eklezio, kiuj estas flankenpuŝitaj, kiuj estas konsiderataj kristanoj duarangecaj kaj ĉiukaze forigataj el Dio, espereble ne post kvin jarcentoj, sed post nur 50 jaroj, al tiuj ĉi personoj nova papo diras: **ni pardonpetas ĉar ni eraris**”? Ĉu ne okazos ke ni, kiel nun ni vidos, kiuj facile estas priridantaj la bildo pri Dio de niaj patroj, niavice estos objekto de prirido ĉe niaj nepoj pro la koncepto pri Dio en kiu ni nun kredas? Do la temo estas grava, gravega.

Nepras senvuali la veran vizaĝon de Dio kaj forlasi la bildon nerkoheran kun la evangelio.

**Por ne sin trompi necesas direkti la tutan atenton al la instruaĵaro de Jesuo.** Kaj estas tio kion ni faros en tiu nia tritago.

Tiun vesperon, antaŭ ol pritrakti la evangliojn (ni tion okazigos nur ĉe la fino), ni faru etan ekskursdancon el la paganaj dioj al la Dio de Jesuo kaj ni vidos ke ĉiu pagana diecaĵo kaj ankaŭ la Dio de la hebreoj - aŭ tiu kiun oni kredis ke ĝi estus la Dio de la hebreoj) - lasis spurojn en tiu de la Patro de Jesuo.

La antaŭa enketo kiun ni devas fari antaŭ ol alveni al la Patro de Jesuo, al la Dio de Jesuo, encentriĝas tra la neceso malkovri kion ni bezonas elimini por purigi la dian vizaĝon.

Ni do startu el paganaj dioj.

Prerogativo de la paganaj dioj je kiu ili estis tute ĵaluzaj kaj ne toleris ke la samajn posedu ankaŭ la homoj, esti la senmorteco kaj super ĉio la feliĉo. Tial la dioj viglis sur la homoj; kiam ili ekvidis ke iu persono sur la tero estas atinganta sojlon de feliĉo kiu al ili ŝajnis netolerebla kaj ofendo al ilia pleneco de feliĉo, tiun ĉi ili trafadis per malfeliĉo.

Tiam ni al ni demandu: kiom da tia kredaĵaro el la paganaj dioj malpurigis la Jesuan mesaĝon? Ĉu ne estas tia la sento kiun multaj kristanoj nutras rilate Dion? Notu, la kontraŭprovo kuŝas en popola lingvaĵo, en onia lingvaĵo: kiam okazas negativa evento, kion ordinare oni diras? “mi eksentis ke estis ekokazanta io nebela, ĉio fluis tro kontentige”. Nome, Dio estus ĵaluza pri feliĉo de la homoj. Kiam Li ekvidas ke en iu familio floras sereneco, feliĉo, minimume iom da timo neniu sukcesas disipi. Estas la kruco donita de Dio.

Kiom da fojojn okaze de malfeliĉaj spertoj aŭdiĝas tiaj eksplikoj. Estas la kruco per kiu la Sinjoro vin vizitis.

Estu dirate tuj: kiam falas sur nin malĝoja evento, la unuaj personoj evitendaj estas la piemaj personoj, la devotaj personoj, tiuj nome kiuj havas respondon por ĉiuj, uloj kiuj ĉion konas kaj al ni alproksimigas kaj diras: “Estas la kruco kiun la Sinjoro al vi asignis; ne provu forigi tiun krucon ĉar sur vin alia pli peza estas vin gardanta”, aŭ “ĉiu havas sian krucon”.

Do sur la kruco oni akumulas ĉion kio kunportas suferon: malsanoj, malsukcesoj, malfacilajn rilatojn ene de la familio, funebroj: tio estas la kruco de la Sinjoro, kaj oni finiĝas en la konvinko ke vere tiu ĉi homa ekzisto estas baraktado en valo de larmoj, kie la afero plej angora el la plonĝantaĵoj sur personon estas fari la dian volon!

Kiam plej oftas la esprimo “fari la dian volon”? Kiam homoj provas ĝin ĉiuenergie eviti kaj fine troviĝas kun la ŝultroj kontraŭmure.

Kiam kontraŭ situacio jam neevitebla, oni ekzemplu malsanon, vi senutile provis ĉiujn aranĝaĵojn por el ĝi forfuĝi, kion vi diras? “estu farata la dia volo”.

Ĉu konstateblas ebleco ke la dia volo koincidu kun la eventoj malĝojaj kaj negativaj kaj ĉiukaze malplaĉaj de nia ekzisto? Kial ankoraŭ ne aŭdeblis persono, gajninta lotludon, diranta: estu farata la dia volo! Sed nur kiam nin ĝenas malfeliĉaĵoj. Sed Dio, kial tiun lian volon neniam devias el sia direkto? Neniam li sendas en la direkton de la feliĉo? Jen, tiu estas heredaĵo el paganaj dioj: la dio envia pri la homa feliĉo kaj ĵaluza je la sia!

Komprebeble, en la Patro de Jesuo ne dancas iu ajn el tiuj karakterizoj: **Dio estas amo. Estas la amo kiun li deziras komuniki;** kaj amo nenion alian deziras ol ke homoj atingu en tiu ĉi ekzisto la feliĉon.

En la dia volo nenio troviĝas **negativa:** ĉio pozitivaj.

La feliĉo ne rifuĝiĝas en la transmondo, kiu ne estas feliĉa en tiu ĉi mondo ne estos feliĉa en la alia.

Ĉar en la alia mondo nenio el nia situacio ŝanĝiĝos kaj **la Patro volas ke la homoj atingu la plenecon de feliĉo ĉi-tie sur tiu ĉi-tero**

Sekvas, kohere, ke evitentiĝu ĉiuspecaj esprimoj devenantaj el pensmaniero de la paganaj dioj.

Mi menciis iujn inter la multaj, sed ne forgesiĝu “ĉiu havas sian krucon”. Same trompiga. Same falsa.

La Vatikana Koncilio estis instiganta ke oni startu procedon de alproksimiĝo al la Evangelio por kontroli ĉu ĉio je kio ni kredas, diras kaj predikas, tio ankaŭ koheras kun la instruoj de Jesuo. Ofte kelkaĵo malkoheras.

Tia fataleca dirmaniero laŭ kiu “ĉiu havas sia krucon, ĉiuj ni havas krucon“ ktp, ne konformas al la Jesua anonco. En la evangelioj ne estas asociigita la kruco al la homa sufero. Neniam en la evangelioj estas asertate ke ĉiuj havas sian krucon, neniam en la evangelioj estas komunikate ke Dio liveras krucojn.

La “kruco” estas nomata kvin fojojn entute en la kvar evangelioj, (pliprecize en la tri, ĉar en Johano ne troviĝas la invito sin ŝarĝi per la kruco). Nemian la kruco estas ŝarĝigita de Dio, sed de homoj.

**Kiu estas la signifo de la kruco en la evangelioj?** Jesuo al siaj disĉiploj kiuj lin sekvas puŝite (kelkamomente) de nejustaj motivoj, de ambicioj ĉar ili kredas ke mem sekvas triumfonton, la Mesion baldaŭ venkontan en Jerusalemo, avertas: ”Se vi...”, kaj puŝas ne al la akceptado pri kruco, ĉar la termino uzata de la evangeliisto estas “se vi ne levu” (la kruco, kiel vi scias, konstituigas el du pecoj: la palo vertikala kiu restis fiksita en la loko de la ekzekutado kaj la transversa ligno kiun la kondamnito estis devigata ŝarĝi sur siajn ŝultrojn). Tiam Jesuo al la disĉiploj, ne do al ĉiuj, estas adresanta sian mesaĝon, kaj vorte informas. “se vi ne prenas sur vin mem tiun suferilon, vi ne kredu ke vi postsekvos min”. Kial? Pro tio ke la kruco estis la torturo rezervita al feĉo de la socio.

Al la disĉiploj lin sekvantaj, entuzismiĝintaj pro ambicio, Jesuo volas lanĉi averton. “Vidu ke sekvi min signifas esti konsiderataj kaj traktataj kiel feĉo de la socio. Se mi estis kvalifikita frenezulo, demonposedito, blasfemulo, trompisto... imagu kiom da similaĵoj oni diros pri vi!” Tio estas la kruco.

La kruco, oni hodiaŭ povas traduki, estas la perdo de la reputacio. La kruco ne estas instrumento por la torturo, sed faktoro de libereco.

Ni estas ĉiuj kondiĉitaj de tio kion opinias aliaj aŭ de nia ambicio

Jesuo serĉas personojn liberajn ĉar nur personoj vere liberaj kapablas plenkore ami kiel li amas.

Tiam Jesuo kiel kondiĉon por lin sekvi - kaj estas tia la signifo de la kruco – postulas: ”rezignu pri via reputacio“. Suferigas tio ĉar ĉiuj emas estimigi sian nomon, sed vidu kiel ebriiĝon de libero la pardon de sia reputacio! Pripensu! Povi ne ŝajnigi konduti iamaniere por eviti ke oni ŝarĝu sur nin malbelajn aferojn: “mi ne diras kion mi pensas ĉar...”, ”mi ne aperas kiel mi estas ĉar...”. Pripensu la liberon akiritan per la kompleta perdo de la reputacio!

Tial la kruco neniel koncernas suferon, malsanojn, malfeliĉaĵojn kaj funebrojn kiun la vivo jam alportas.

La alia ekzemplo jam menciita koncernis la dian volon.

Svarmas proverbo, kiun mi taksas blasfemo kaj kiun ni ĉiuj konas : ”Ne falas folio nevolita de Dio” . Do, se ne falas folio sen decido de Dio, do se mi malbonŝance senatenta, rulfalas laŭŝupare... Tio estas dia volo. Nu, tio sonas blasfeme

Tiu proverbo naskiĝas de nekorekta interpreto pri evangelia ero en Mateo, kie Jesuo celas instrui la kontraŭon.

Jesuo al amaso ĝuste por plenkreskigi ĝian fidon al Dio diras. “Sed vidu la birdojn de la ĉielo...”. Kial li parolas ĝuste pri la birdoj? Pro tio ke ili inter la bestoj estis konsideritaj la plej senutilaj, la plej sensignifaj; do la unusolaj bestoj nebenitaj. Li dir-

as: "El ili eĉ ne unu falas teren" **ne** ja "sen ke la Patro tion volas" **sed** "sencie de la Patro". "Tiom pli, sekve, la Patro prizorgos pri vi". Tio signifas ke Jesuo intencas inokuli: ne faru al vi zorgojn pro io ajn. Plene konfidu en Patro via **kiu prizorgas kaj regas eĉ la plej sensignifajn aferojn de via vivo.**

La dia volo ne koincidas kun la malĝoja eventoj de nia vivo.

Estas unusola volo de Dio kiu emerĝas el la evangelioj kaj estas tute homfavora. Temas pri Dio kiu, male ol la Dio de la religioj ĉiam naŭziĝinta pro la homa konduto, estas Dio tute al homo enamiĝanta kiu diras: Tro etfeliĉa la stato travivata de la homoj, mi ilin volas levi al la pli feliĉa stato. **Tia estas la dia volo. ke homo fariĝu Dio;** ke la homo estu en la dia kondiĉo.

Tial tiuj paganaj dioj malamikaj al la homa feliĉo estas forstrekata de la Dio de Jesuo. Iu Dio kiu urĝas por ke ni estu feliĉaj ĉi tie! Certe, kelkaj sin demandas: kiel ni faru por atingi feliĉon ĉi tie? Jesuo jam tion diris: **la feliĉo ne konsistas en tio kion la aliaj devus fari por vi, sed en tio kion vi povas fari por la aliaj.**

Se mia feliĉo konsistas en tio kion la aliaj devus fari por mi, mi estus ĉiam elreviĝintaj ĉar la aliaj ne povas eniri en mian kapon kaj imagi kiam mi atendas telefon-alvokon aŭ viziton aŭ donacon. Kaj do se la feliĉon ni apogas sur kion la aliaj pretas plenumi por ni, ni restos ĉiam malkontentaj, ĉiam iluziigintaj,

Male Jesuo diras: La feliĉo estas tuja, plena kaj kompleta ĉar knediĝas ne je tio kion la aliaj faras por vi, sed je tio kion vi povas realigi por la aliaj.

Kaj diras Jesuo en la Agoj de la apostoloj: "Estas pli ĝoje donacadi ol ricevadi".

Kaj Jesuo instigas por ke ni atingu la plenecon de la ĝojo. Kiu volonte kaj libere pro amo al la aliaj disponiĝas servi la aliajn trovas ĉi tie, dum tiu ĉi ekzisto, la plenecon de sia feliĉo. Do tiu imago prajmita el la paganaj dioj estas tute malstrekita per la Dio de Jesuo. Purigado, do, pri la dia vizaĝo kiu jam komenciĝis en la paĝoj de la Malnova testamento.

Ni prenu almenaŭ iujn skemojn, iujn ekzemplojn ĉar ni ne povas analizi ĉiujn.

La homoj projekciis en Dion ĉiujn siajn atenditaĵojn kaj kreis, vere laŭ sia bildo kaj similo, iun Dion laŭ tio pri kio ili provis frustraciojn kaj timojn kaj ambiciojn kaj tion farante transdonis en Dion sian senton de justeco. Pro tio ke la justeco de la homoj estas sentata neperfekta aŭ plejofte defektita, la dia justeco konotiĝis per la karakterizo de perfekteco.

Tiam la homoj malkontentigitaj el la homa justeco, diradis ke kuŝas ĉe Dio la vera justeco. En tiu dia justeco, specialaĵo de Dio, grava noto estis la puno. Do Dio punanta la homojn pro ties kulpoj.

Nu, la aŭtoroj de la Malnova Testamento komencas purigi tiun bildon de Dio kaj tion faras per epizodo kiun ni konas tre bone; ĝi estas rakontata en la libro Genezo. Tiutempe ĉiun atmosferan fenomenon oni opiniis kaŭzita de Dio. Tial la fulmo estis bildo de Dio punanta, lumobrilado estis ties averto, tiam la aŭtoro de la Genezo kompreneble priskribas mitologian rakonton pri la universa diluvo ne por diri ke Dio punas la homojn, sed por diri tute la kontraŭon; fakte, ĉe la fino de la diluvo la Sinjoro komunikas ke estonte neniu vivanto estos detruita per la diluva akvo, ne plu la tero estos ruinigita per la diluvo.

Tio estas la aŭtoro intencas komuniki al la homoj: Dio ne punas. Dio mem tiom promesas: antaŭe li prezentas la imagon de tia diluvo, sed ĉe la fino de la sama, Dio vortoplene promesas “ne okazos ankoraŭ tia katastrofo” ĉar Dio ne punas kaj re-pruve de tio brilegas la ĉielarko: la ĉielarko aludis al la arko de la Sinjoro.

La arko estis la simbolo de la batalisto per kiu li pafis siajn sagojn sur la homojn. Nu, diras la Sinjoro “mi metas mian arkon sur la nubojn kaj ĝi estos signo pri mia ligo inter mi kaj la tero”. Ni rajtas diri modernstile ke Dio rezignis sian armilon. Do Dio ne punas, Dio ne skurĝas la morojn, la atmosferaj fenomenoj meritas nur siajn nomojn.

Certe, mirigas ke malgraŭ la interveno de la sankta aŭtoro, (kaj ĉi tie plue en la Malnova Testamento, se ne paroli pri instruoj de Jesuo), mirigas ke antaŭ la renversoj provokitaj de la naturo, kiel lastatempe la martremo en Azio, daŭrigas pluresti personoj aŭdacantaj diri ke tiun provokis la dia punvolo kaj, plejgrave, kiam tiuj uloj estas pastroj.

Necesas memkontrolo antaŭ paroli pri Dio por ne atribui al Li niajn timojn, niajn aspirojn: tiakaze ĉu vi scias kion ni kaŭzas? Ni kaŭzas ateismon.

Se encerbiĝas ke Dio sendas punojn al la homaro pere de martremo, mi al tiu kruela Dio, al tiu Dio senmizerikorda, ne scias kiel adheri. Oni aŭdis okaze de martremo hororajn komentojn interalie pastron - mi apartenas al tiu kategorio, sed en ĝi troviĝas pastroj je diversmensaj - dirantan ke la Sinjoro punis la azianojn pro niaj kulpoj. Kiam bonas la Eterna Patro kiu delikate gardas sian klientojn... kristanajn!

Do pro niaj kulpoj Li punas aliajn. Marŝu laŭ tiu vojo kaj la aferoj funkcios tre taŭge.

Nepras ke ni nin gardu el tro facilaj juĝoj, antaŭ tiuj malbonŝancoj, en la provo interpreti la diajn celojn. Kaj mi memoras, okazis nun la proceso... ĉu vi rememoras pri la bruliĝo de la aviadilo en Linate, ĉe Milano; la kapelano de la laborloko respondante al personoj sin kritike demandantaj “kial Dio permesis tiajn hororaĵojn? - mi raportas laŭ la raportoj de l’ *Corriere della Sera*, esperante ke ĝi eraris; kiel ajn ĝi metis sur la buŝo de tiu kapelano tiun ĉi responsdon: “Ĉar Dio tiutage bezonis 280 personojn en sia Paradizo”.

Do Li ilin mendis: 280! Arostitajn, se eblas. Provu vi tion diri al la parencoj de tiuj viktimoj!

Via filo... sed vian filon la Sinjoro tiutage volis en Paradizo... arostitan.

Vi vidu, necesas sin kritiki ĉar trompa bildo pri Dio fariĝas falŝtono por kredantoj kaj ŝtono per kiu konstruiĝas ateismo. Fakte jam en la Malnova Testamento ekis la procedo de la purigado pri la dia bildo.

Dio ne punas. Ni tion vidos, tion oni ellernos ĉe Jesuo. Tial paroli pri puno de Dio estas kontraŭsence: en la evangelioj neniam renkontiĝas mencio pri Dio kiu punas homojn. La Jesua Dio bildiĝas Dio de Amo kiu al ĉiuj sendistinge, bonaj kaj malbonaj, ekspansas sian amon. Sed tion ni vidos pliposte.

Alia karakterizo de Dio, en la Malnova Testamento, estis ke Li postuladus oferojn, homajn viktimojn. Tiuserve aparte agrablaj estis infanoj kaj plej aparte unuenaskitoj.

En Jerusalemo eĉ hodiaŭ oni indikas valon nomatan Ĝeenna kie iam oni instalas krematoriojn kien religianoj iris oferi siajn gefilojn, la masklojn al la Dio Molok. Tio pro la motivo ke tiam la gefiloj ne havis la gravecon kiun ili havas en niaj socioj.

Gefiloj valoris nenion. La Talmudo, la teksto sankta por la hebreoj, sin demandas ĉu la patro devas nutri sian filon kaj alvenas al la konkludo ke ungo de la patro pli gravas ol la vivo de la filo. Oni konsideru ankaŭ la infanan mortokvanton... la gefiloj ne havis la hodiaŭan valoron.

Estis kutimo ankaŭ inter la israelanoj selekti filon kaj lin oferi al la diecaĵo okaze de io grava plenumenda dum sia ekzisto.

Tiam la sankta aŭtoro enscenigas epizodon en kiu li intencas signifi ke Dio ne toleras homajn viktimojn. Ni ĉiuj konas tiun epizodon: Abrahamo kiu kredas sia devon oferi sian filon Isaakon al la Sinjoro. Bedaŭrinde la Skribo, la Biblio, estas skribata en la hebrea lingvo, niaj tradukoj aparte tiuj en iuj lingvoj, kiuj estas deficitaj, ne transdonas la nuancecon de la rakonto kaj se iu legas tiun rakonton en la traduko kiun oni kutime posedas ne multe komprenas ĉar pri tiu rakonto oni konas nur laŭ la jena senco: estas Dio kiu diras. “Abrahamo, ĉu vi estas kontenta ke fine en via maljuneco vi sukcesis generi filon, la ununaskitan filon?!” kaj Abrahamo: “Mi eksplodas pro tro da feliĉo!”

“Bone, vi estas kontenta? Nun tiun filon vi oferu al mi”

“Sed konsideru ke vi lin ĵus donis al mi...”

“Oferu lin al mi!”

Kaj Abrahamo kaptas la filon kaj supreniras monton, dum estas lin buĉanta Dio intervenas kaj diras: “Ne, mi ŝercis!”. Ne ĝuste tiel li sin esprimas, sed el la vortoj vi komprenas la ideon.

“Ho! Ne ŝercu tro! Ĉu vi fine diru la ĝuston?”

Reale en la biblia rakonto estas du diecaĵoj kiuj intervenas. La unua en la hebrea teksto nomixĝas Eloim kiu estas la pluralo de la hebrea “El” signifanta Dion kaj estas termino uzata por ĉiuj diecaĵoj. Tiam estas Abrahamo kiu opinias laŭ la uzoj kaj kutimoj de tiu teritorio sian devon oferi sian filon al la diecaĵo. Kiam estas okazanta la buĉado, ne agas Eloim, la diecaĵo kiu ordonis, sed Javeo la Dio de Izraelo. Kion intencas la sankta aŭtoro? Meze de la paganaj popoloj la dioj postulas homajn viktimojn, en Israelio Dio ne postulas tiaĵojn. Tial evidentas ke alia procedo de purigado estis elimini la homoferon

Ĝis alvenos, ĉiam laŭ tiu progresiva kresko, la reveliĝo de iu Dio kiu ne nur rifuzas la homoferojn, sed iu Dio kiu rifuzas tute simple la oferojn.

En la Libro de la profeto Hoŝea Dio diras: “Ĉar mi volas amon kaj ne oferon. La kono pri Dio pli valoras ol la holokaŭstoj”.

Tial jam en la Malnova Testamento, kaj poste Jesuo al tiu profeto sin reinspiros, sin prezentas iu Dio kiu diras. “Mi ne volas oferojn (oferoj rilatas nur al Dio), sed volas mizerikordon”. Mizerikordo rilate la homojn. Estas la fino de la religia kulto al Dio.

Tiuj la tri precipaj punktoj de purigado. Kiujn poste Jesuo kritike realvokas en siaj evangelioj. Ili negative ankoraŭ pezas ĉar, kiel ni deklaris ke nia kristana vivo iomete

pro igmoro iomete pro malkorektaj prepariĝo aŭ intepretado pri la tekstoj, igas kunvivantaj en ni iliaj spuraĵoj. Ekzemple, ni jam diris ke la Sinjoro ne punas kaj ne punas per kosmaj distordiĝoj, sed kiom da homoj plu kredas ke estas revelaciita la fino de l'mondo. Tiukaze la kulpo estas tute, aŭ parte, de la malkorekta tradukado de la evangelia teksto. Ĉu vi povas fingrumi tra la CEI-a Biblio? Vi legas ke la finaj vortoj de Jesuo en la evangelio laŭ Mateo estas: "Jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, mi restos kun vi ĝis la mondo-fino". Tion diris Jesuo; do neniu rajtas pridubi ĝin. Se vi povas konsulti la lastan eldonon de la Nova Testamento laŭ CEI - episkopa itala komisiono - de 1997 vi vidos ke ne troviĝas "mondo-fino" sed legiĝas. "maturiĝo de la mondaĝo". Aŭ ankaŭ "finiĝo de la epokoj", dirmaniero per kiu Jesuo certigas sian ĉeeston por ĉiam. Jesuo ne anoncas hipotezan mondo-finion sed diras al sia prupo. "Estu trankvilaj, mi estos kun por ĉiam". Tial la bildo pri Dio punanta, kiu nutris la popolan imagopovon pri iu Dio eklanĉanta la punon detruontan la homaron, estas restaĵo de pagana bildmaniero kiu ne rajtas trovi konsenton ĉe kristanoj.

El Dio nenio timenda, Dio estas amo; eventuale tio kion ni povas timi devenas el homoj. Same koncerne la homajn viktimojn. Klaras ke ni hodiaŭ jam ne oferas homojn al la idoloj: kvankam multas la manieroj oferi sian vivon la ideologioj aŭ idolatrioj nin cirkaŭantaj... sed atentu, povas pluekzisti manieron interpreti la kristanan vivon kiel oferon al Dio.

Temas pri la ideo pri devo oferi sian vivon al Jesuo. Atentiĝu ĉar kiu opinias doni sian vivon al Kristo maltrafas la celon. Ĉar Kristo, Dio, neniam postulas ke la homo donu sian vivon por li ĉar estas li kiu liveras abundon al la homo.

Vi prikonsideru. Antaŭ iuj tagoj en Eŭkaristio ni celebris la figuron de Tomaso, Tomaso nomata Didimo (= Gemelo) kiu estas kontraŭmetita al la alia disĉiplo Petro. Petro dum la lasta vespermanĝo diras al Jesuo. "Mi pretos doni mian vivon por vi". Malmultajn minutojn poste li finiĝas lin perfidante. Ĉar Dio ne postulas ke ni oferu nian vivon por Li. Tio kopiigis el la pagana karakterizo pri Dio, kiu absorbas la energion de la homoj dum la Dio de Jesuo estas Dio kiu potencigas la homon kaj, male, komunikas li mem siajn energiojn.

Jen Tomaso tion komprenas: "Ni iru elspezi la vivon **kun Li**". Kredanto ne oferas la vivon por Jesuo, sed **kun** Jesuo kaj **kiel** Jesuo por la aliaj.

La faroj de kredanto ne estas farataj por Dio ĉar Dio bezonas nenion, sed en Dio por la **aliaj**, Evidente temas pri orientado tute malsama.

Tio gravas ĉar ni jam proklamis ke ni estas responsaj pri la ateismo de homoj. Kiam mi renkontas kristano, kiu asertas, kun ĉiuj la bonaj intencoj eblaj, ke mem min amas aŭ amante tion faras (klasika esprimo) "pro kristana karitato", "se dependus de mi, vi povas senhezite malasperi! Sed pro kristana karitato...", "mi tion faras pro amo al Jesuo! Mi flegas mizerulojn ĉar en la mizeruloj kuŝas la Sinjoro mem - se tia ĉeesto mankus ilin mi lasus ĉiujn al sia pereigi!...)..." Nu, tiaj esprimoj sugestantaj la devon agi por la Sinjoro, por akiri meritojn ĉe la Sinjoro, ni vidos ke eĉ tiaj sugestioj estas eliminataj.

Ne estas ni kiuj bonfaras por Dio sed Dio jam tion faras por ni. Ni devas nur konsente ricevi ilian faron kaj kun Li kaj kiel Li iri helpante al la aliaj. Kaj, krome,

sed laste, ni jam malkovris ke la Sinjoro ne volas oferojn. Tiam, el kie naskiĝis, en la antaŭkoncilia katolikismo, tiu bildo kiu priskribus la esencan virton de la kristana aktivado?

Mi konas bonegajn homojn, serioze virtajn, praktikantaj volontuladon kiuj tamen konfidence konfesas: "Mi sincere engaĝiĝas kaj multe aktivas, tamen tion mi faras sensufere, mi tion faras pro tio ke tio al mi plaĉas. Ĉu tio valoras? Ĉar se ne spertiĝas sufero ŝajnas ke, en la vivo, nia agado fluas senvalore", Tiam mi ĉiam konsilas surmeti ŝuojn je mezuro ununombra pli striktajn kaj tiel la samaj volontulaĵoj farataj kun ofereciento eble gajnu la celatan valoron. Oni vidu: multe, vere multe da tiuj aferoj, bedaŭrinde dependis el la fakto ke antaŭ la ĵusa Konkilio oni ne kutimis apelacii rekte al la originalaj evangeliaj tekstoj, sed pri ties nerektaj tradukaĵoj: antaŭe latina kaj poste itala; trakukaĵoj plurfoje ne precizaj se ne miskorektaj.

Vi pripensu almenaŭ la inviton de Jesuo: "Se vi ne konvertiĝus vi ne enirus la dian region". Konvertiĝi signifas: "se vi ne orientigas malsammaniere la vivon". Tio estas, se vi vivas nur pro vi mem vi finiĝos en neniejon. Se vi vivas por la aliaj, vi vivas. Tia estas la invito de Jesuo. Do li estas pozitiva, sed ĝi, male, estis tradukita "se vi ne faras pentofaron". Jen la motivo pro kiu kelkiuloj obĵetas: "sed tiu sanktulo, tiu samktulino multe pentofaris!". Mi tion kredas pro tio ke la evangelio kiujn ili legis tiuepoke instruadis: "Se vi ne pentofaras". Se oni ne faras penitencaĵojn oni ne estos enkondukita en la dian region. Jen tiam do la motivo de tiom da pentofaraĵoj, de tiom sin suferigado. Mi estas reveninto el tia religia edukado, en kiu ni estis invitataj "fari floreton" (= etan suferagon). Imagu! Mi sesdekjaraĝas, nome mi vivis en postmilita Italio kie certe oni ne ĝuis forelspezaĵojn! Tio tiom veras ke la glaciaĵo entabliĝis unu fojon semajne kaj, jen, aperadis katekistino, fratino aŭ pastro kiu ĝuste kiam vi estis ĝin prenanta: "Ĝin donacu al la Madono!". Kaj mi min demandis: kial tia Madono bezonas mian glaciaĵon, mian oferan rezignon?<sup>3</sup>

Dum la majaj monatoj, la glaciaĵon oni donas al la Madono... vi perdas eĉ tiun ĉi! Ĉu vere la Madono bezonis glaciaĵon kiun oni gustis tiom malofte? Nome la sufero pro Dio. La homo devas ĝin rezigni por plaĉi al Dio.

Kun Jesuo ĉio tio jam finiĝis. Kun Jesuo ne estas la homo kiu devas sin senigi por sin oferi al Dio, por sin maĉi pro Dio, sed estas Dio kiu sin oferas kaj kiu sin donas al la homoj.

Temas evidente pri kompleta ŝanĝo. Jen kial ni anticipis, kaj nun ni ĝi atingos, ke oni ne rajtas savi religion, sed oni devas paroli pri kristana kredo.

Trairinte tiujn procedojn de purigado ĵus aluditajn (kaj morgaŭ kun la tuta tagtempo je nia dispono, ĉe la fino de ĉiu prelego, ni lasos abundan tempospacon por intervenoj kaj demandoj, ĉi-vespere ni procedas rapide)... ni trovas ke venis la horo por enscenigi Jesuon mem.

Jesuo, en la johana evangelio, estas prezentita per tiuj vortoj. "Dion neniuj vidis. La solfilo kiu estas unuenaskito kaj en la sino (nome, intima) de la Patro, estas li kiu al ni

---

<sup>3</sup> (Ndt) Se tio veras, veras ankaŭ, ke tiaj "floretoj" kaj similaĵoj havas aliajn celojn, kiel kutimigi la volon akcepti suferojn en la servo al siaj homaj fratoj.

revelaciis”. Evangelisto Johano ĉe la fino de sia antaŭparolo diras. “Dion neniu vidis”. Eble iu diras ene de si:

Ne veras tio! Moseo ĵan Lin vidis! Ne. Ankaŭ Eliija Lin vidis.

Ne. Dion neniu vidis.

Do ankaŭ Moseo kaj aliaj personuloj, havintaj partan sperton, limigitan, pri Dio, ne povis esprimi la amplekson kaj plenecon de la dia volo. Dion neniu vidis, krom Jesuo. Kaj de tiu momento komenciĝas la evangelio. Pro tio ni celas encentrigi la atenton de la leganto sur la figuron de Jesuo. Kion signifas ke neniu Dion vidis kaj ununure Jesuo estas pri Li la eksplika bildo? En la ĉapitro 14a de tiu evangelio Filipo demandas al Jesuo: “Montru al ni la Patron”. Kaj Jesuo respondas. “Kiu obstaklo malhelpis ke vi komprenu ke kiu min vidas vidas la Patron?”.

Tre interesas tio dirita de Jesuo. Ĝi signifas ke **ne Jesuo estas kiel Dio, sed Dio estas kiel Jesuo**. Tio gravegas. Ĝuste prie ni temos dum la tri tagoj.

Se mi diras ke Jesuo estas kiel Dio, signifas ke mi jam havas bildon pri tiu Dio, bildo veninta el la religio, el superstiĉoj, el la filozofioj... Sed ne Jesuo egala al Dio, kontraŭe Dio egala al Jesuo.

Plue: se ĉio kion ni kredas koncerne Dion, tion ni ne vidas kohera kun tio kion diris kaj faris Jesuo, ĝuste tio eliminendas ĉar nekompleta, mankhava kaj falsa. Kaj multe da krederoj falas. Tial ĉiu bildo pri Dio de ni posedata, se ne adekvata al tio kion ni vidas en Jesuo estas eliminenda. Ĉar Jesuo estas la sola kiu faris sperton pri Dio; ĉiam en la antaŭparolo de Johano oni legas ke la Leĝo estis liverita pere de Moseo, la Graco kaj la Vero alvenis al ni pere de Jesuo Kristo.

Oni vidu ke tio estas la finiĝo de la religio kaj la komenco de la kredo.

Estis jam dirate ke mi uzos la vorton religio por signifi ĉiam ion negativan; por religio oni intencu amason da sintenoj, kondutoj kiujn homoj tenas koncerne Dion por gajni lian bonvolemon.

Jesuo ĉion tion finigas. Per Jesuo elstariĝas la kredo.

**La kredo ne estas tio kion homo faras por Dio sed tio kion Dio faras por la homo kaj kion la homoj konsentite ricevas.**

Kaj ĉi tie dum religio estos uzata ĉiam negativsence, kredo ĉiam tute pozitivsence.

En la religio estis la leĝo. Skribas la evangeliisto ke la leĝo estis donita pere de Moseo. La leĝo estis kio priskribis la rilatojn inter Dio kaj la homoj.

Kuŝis kodo, fremdeca, en libro kie estis precize ordonite ĉion kion homo devas aŭ ne devas plenumi. Kaj homo estis devigita obei tian leĝon. La homoj suferis foje ĉar tiu leĝo, kiu estis kodifita en antaŭaj epokoj kaj en malsamaj kuntekstoj, neeskluzivigite la beduena socio. Kaj krome la leĝo ne povas koni mian personan historion. Sed eĉ tio ne gravas, la homoj devas suferi por respekti la leĝon. Do estas la leĝo kiu determinas la rilatojn de la homoj kun Dio.

Kaj kiu estas kredanto? La kredanto estas kiu obeas al Dio observante liajn leĝojn, Se sekve por observi tiun leĝon homo humiligas sian ekziston, nuligas sian emocion, mutilas sian seksemon, tio al Dio ne interesas. Gravus nur ke Lia leĝo ne estu sapeita. Jesuo venas por inaŭguri novan rilato-sistemon, tute malsaman, kun Dio: ne plu bazita sur la leĝo sed sur la ricevo de Lia amo.

Per Jesuo la rilato kun Dio ne plu baziĝas sur observo de iu dia leĝo. Sed sur praktiko de amo simila al tiu de la Patro. Se, kiel ni jam diris, en religio kredanto estas kiu obeas plenumante liajn leĝojn, en Jesuo kredanto estas kiu similas la Patron praktikante amon similan al tiu Lia. Jen la kialo malpermesanta ke tiu de Jesuo ne povas esti difinita religio de la libro, sed religio de la homo: **en la centro, laŭ Jesuo, ne staras Dio, sed la homo.**

Gravegas tio. Tio fakte determinis la revolucion enkondukitan de Jesuo.

En la religio la celo de la ekzisto de unuopulo estas Dio. Ĉion kion faras la homo, tiu ĉi ĝin faras por Dio. Ni jam diris: ami pro kristana karitato, “mi tion faras pro amo al Jesuo” apartenas al la religio. “Al mi ne interesas vi, al mi interesas Dion, se dependus nur de mi al vi neniel mi provizus, sed mi vin amas, vin flegas, vin pardonas... kial mi tion faras? Ĉar Dio vidas kaj poste min rekompencos”: Dio estas la celo, Dio estas la alvenpinto! Kaj tio en la greka lingvo estis esprimita per la vorto **eros**. Eroto estis la amo kiu havas iumanierie sian kontraŭan partion.

Nu per Jesuo ĉio tio finiĝis. Kun Jesuo Dio ne plu estas la celo de sia ekzisto; kaj se ankoraŭ homo estas orientita al Dio kaj ĉio kion li faras, tion faras por Dio, li preĝas por ke Dio lin rekompencos, amas pro tio ke Dio vidas, nu tio kun Jesuo sanĝiĝas ĉar Jesuo ne metas Dion ĉe alvenpunkto de la homa ekzisto, sed ĉe la komenco<sup>4</sup>.

Ne estis ni la ekamantoj de Dio, sed estis Dio la ekamanto de ni. Estas Dio la iniciantinto. Estas Dio kiu senkondiĉe amas ne meritajn homojn.

Dio kiu nin inundas per sia amo. La homo nenion devas fari ol ricevi tiun amon, sin lasi transporti per tiu ama ondo kaj kun Dio kaj kiel Dio iri renkonten al la aliaj.

Ne plu agi **por** Kristo, **por** Dio, sed **en** Kristo, **en** Dio, **nome kun la sama forto e kaj kun la sama energio kiun komunikas Dio.**

Jesuo kion diris tion eĉ ĝin demonstris renversante la bilbon pri Dio.

Ni finu la paroladon nur per du ekzemploj kiuj revolucie ŝanĝas la rilatojn kun Dio: en la religio la amo de Dio devas esti meritita. La homo devas gajni la dian amon. Kun Jesuo la amo de Dio ne plu konsiderindas konkerebla sed ricevinda kiel senpaga donaco de Lia amo. Jam finiĝis la epoko en kiu la homo strebas meriti la amon de Dio, komenciĝas tiu en kiu la homo akceptas la amon de Dio kiel donaco senpaga kaj nemeritita.

La religio inventis la pekon, inokulis en la homojn la kulposenton tiel ke ili sin sentu ĉiam maldignaj antaŭ Dio. Estis malfacilege sin trovi indaj je Dio ĉar ĉiu aĵo malpurigadis la homon. Tial la homo por fariĝi inda je Dio devis sin submeti al ritoj de purigado

Per Jesuo ĉio tio renversiĝas. Li kiu estas Dio, se Dion neniu vidis escepte de Jesuo, estas per li ke pri Li venas la ĝusta bildo; laŭ la johana evangelio li leviĝas por lavi la piedojn de la disĉiploj. Tio estas la parto pli malpura, pli malmobla en la homo. Ne

---

<sup>4</sup> (Ndt) Ĉar Dio estos la fina punkto gajganta la homon en la transmonda vivo, homo povas senti altiron al Li jam ek del tiu ĉi vivo, per kiu certe pliiĝas ankaŭ la amo al la homoj.

estas la homo kiu devas sin purigi por alproksimiĝi al la Sinjoro sed estas la la Sinjoro kiu lin purigas.

Ho ve, mi vidas ke la tempo jam forfuĝis, morgaŭ ni povos repreni tiun ĉi temon kun aliaj eroj de la evangelioj, ni havos la tutan tempon necesan.

Mi vin dankas pro via atento ĉar post tuttaga laboro ne facilas sekvi preleganton.

La renkontiĝo morgaŭ matene je la 9,30. Mi vin dankas kaj bonan nokton.

## Dua prelego

Eta resumo pri la komenca prelego de hieraŭ vespere, kiu ligiĝas al la hodiaŭa temo. Ni startis enketante pri kiu Dio nia kredo pripensas kaj asertante, ke la bildo pri Dio sin modifas laŭlonge de la tempofluro, ne pro tio ke Dio ŝanĝiĝas, sed ĉar kreske disvolviĝas la kompreno de la homaro kaj la eklezio ĉiam pli - aparte ekde la Dua Vatikana Koncilio - sin ligas al Mesaĝo de Jesuo, none de la bonsciigo; tial la ĉiama vero daŭras esti la sama, sed reformulita novmaniere. Kaj ni vidis tiun procedon de purigado el la paganaj diecaĵoj al Dio de la hebreoj, kaj kiel restaĵoj de krederoj je tiuj diecaĵoj aŭ je la Dio de hebreoj translokiĝis al la kristana Dio. Sekve mi konsideris, ke bildo pri Dio plurestanta en diversaj kristanoj ankoraŭ kredigas je Dio juĝanta, je Dio punanta, je Dio suferiganta, je Dio al kiu nepras doni aŭ oferi aŭ por Li rezigni ĝojojn: jen, ĉio tio kun Jesuo finiĝis. Hieraŭ vespere ni komencis rigardi en la Johanan evangelion. Johano finas sian antaŭparolon per jena esprimo. “Dion neniu vidis; nur Jesuo, kiu staras en la sino (nome, en la intimo) de la Patro, fariĝis la ekspliko pri Li”. Kion celas komuniki la evangeliisto? Ke ĉiuj bildoj, ideoj, doktrinoj pri Dio kiuj ne estas sampensaj kun tio kion Jesuo faras kaj diras eliminendas ĉar falsa aŭ mankhava aŭ ĉiukaze nekompleta. Kaj la Dio prezentiĝanta en Jesuo malsamas el la Dio prezentita de la religio. Jam dekomence de la evangelio, en la interparolo kun Nikodemo, Jesuo demetas tiun tradician ideon pri iu Dio juĝisto de la homoj. Mi memorigas, por la personoj kiuj unuafoje min aŭdas, ke mi uzos la vorton “religio” ĉiam al ĝi atribuanteplicigan sencon, same kiel cetere okazas en la evangelioj; pozitivaj aspektoj mi loĝigas en la termino “kredo”. Por religio, ni jam vidis hieraŭ vespere, estas aludata tio kion homo devas fari por Dio kaj tio per Jesuo finiĝis: per Jesuo komenciĝas la kredo: jam ne plu estimindas tio kion homo faras por Dio por konkeri la dian bonvolemon, la pardonon aŭ la mizerikordon, sed ŝatindas tio kion Dio faras por la homoj; tio kion Dio faras por la homoj ne eniru en la kategorion de la religio, sed en tiun de la kredo.

La kredo ne estas donaco kiun Dio liveras al la homoj: mi tion diras ĉar multaj, kiel alibion pri sia nekredo, diras. “feliĉa vi kiu havas tiom da fido; al mi la Sinjoro ne faris tiun donacon”. Ne estas Dio kiu diskriminacias: al iuj Li donus la kredon, al iuj nenion, al kelkaj duonscion. La kredo ne estas dono de Dio al la homoj, sed estas la respondo de la homoj al la amdone kiun Dio faras al la tuta homaro. Kiuj konsente reagas al tiu dia ago, tiuj konkretigas kredon. Nu, kroma kutimaĵo de la hebrea tradicio estis tiu de la juĝo de Dio. La religio inokulas al la homoj la kulposenton, la

sento pri sia indeco; inventas, la religio, la pekosentemon. Kion signifas ke la religio inventis la pekosenton? La homoj - almenaŭ kiuj uzas la racion - neniam sukcesas kompreni aŭ imagi ke kelkaj kondutoj, kelkaj sintenoj kiuj el si mem estas normalaj, estas gravegaj ofendoj al Dio kaj senkatenantaj la dian koleron; estas la religio la inventanto de la pekosento kaj inokulanto de ĝi en popolojn kaj al ili igas ĝin kredinda. Kompreneble, tia religio kreas senton de malindeco en la homoj, kreas abismon inter Dio kaj homoj kaj, super ĉio, ilin minacas pro la juĝmomento. En hebraisno oni kredis ke ĉiuj agoj de la homoj estas skribitaj ĉe Dio, Dio nome harfendema, minacanta: tiajn bildigaĵojn Jesuo rifuzis - ni tio vidos pliposte - sed, bedaŭrinde, ili transverŝiĝis en la kristanismon. Miaj kungeneraciaĵoj memoras tiun minacan okulon enfermitan en triangulo: ĉu vi memoras? La triangulon kun la okulo de Dio? Policano, vidmaniulo kiu restis rigardanta eĉ en la necesejo por kontroli ĉu ni tuŝas la peniseton (ĉar tiu estis la grava problemo. En la konfeso estis tia la unua demando: ĉu vi vin tuŝis? Ve, ve! Estas tia okulo kiu ĉion de vi kontrolas kaj vin vidas!). Kiu registranta ĉiujn agojn kaj poste ĉion enmetanta en la sumon. Se la malbono superas la plenumitan bonon sparkas la juĝo kaj la kondamno. Nu, neniu Dion vidis, nur Jesuo pri Li havas la klarigon; kaj ni, do, encentrigu tutan nian kredon en Jesuo. Nu Jesuo en la ĉapitro tria de Johano, al Nikodemo (Nikodemo estis fariseo, instiganto de tiu tradicio de la juĝo de Dio) demetas tiun bildon pri Dio: pli klara ol tiele Jesuo ne povis esti; fakte, Dio ne sendis sian filon en la mondo por juĝi la mondon, sed por ke la mondo havu saviĝon pere de li. La Dio de Jesuo ne juĝas, la Dio de Jesuo ne premias kaj ne kondamnas; la Dio de Jesuo estas amo kiu deziras komunikiĝi; jen por kio Jesuo, plena elmonstriĝo de tiu Dio, en la mondon venis, ne por juĝi sed komuniki Lian amon al ĉiuj sendsitinge, La amo de Dio ne estas koncedita al tiu kiu ĝin meritas, sed ĝi estas senpaga donaco, senkondiĉa, kiu etendiĝas al la tuta homaro. Poste, vere, dependos de la homo akcepti kaj konsente reagi al tiu amo.

Vi komprenas - kaj ni tion vidos ĉi matene penetrante en la evangelion de Johano - ke vere tiel staras la afero, tio estas tertremo: la religio, ĉiuj religioj, fondiĝas sur Dio premianta la bonulojn, sed punanta la aĉulojn, alimaniere, kiel ni faru por kontroli la homojn? Se ni ne transdonu en ilin tiun timigilon, tiun religian terurilon de iu Dio juĝisto, ĉe kiu nenio forfuĝas kaj ĉio travideblas.

Mi insistas pri tio ĉar estis generacioj de kredantoj teruritaj pro la antaŭvido pri la dia juĝo, generacioj mi diras ĉar estis generacioj de kredantoj kiuj travivis senserenece ĉar timigitaj pro la juĝa tago.

Tia estas la religio. Dio premias la bonulojn kaj punas la aĉulojn. Nu Jesuo demetigas ĉion tion: la Dio de Jesuo ne premias la bonulojn kaj ne punas la aĉulojn; la Jesua Dio al ĉiuj, sendepende de ilia konduto, komunikas amon. La Jesua Dio estas amo kiu deziras komunikiĝi. Estas tiu amo kiu deziras komunikiĝi, laŭ la evangelio de Johano, tiam komprenata en nekonptebla maniero por la pensmaniero de la tiama epoko. Unu el la celoj de religio emas konvinki la homojn pri ilia sento de indeco: homo, malgraŭ plej grandaj faroj, estas ĉiam en la kondiĉo de peko, de malpureco, kaj tio malhelpas la plenan komuniĝon kun la Sinjoro; por alproksimiĝi al la Sinjoro estas postulite, ke homo sin purigu, ke li faru apartajn penitenciaĵojn kaj eblas, se li volas, komuniki kun

Dio. En la katolikismo de la pasinto ĉio tio translokiĝis en komunaj pratikaĵoj kaj, reale, antaŭ la Koncilio, laŭ la teologio de tiu epoko, ne eblis sin konsideri en plena komunikiĝo kun Dio; la teknika esprimo sonis: “esti en la dia graco”; ĉu vi tion memoras?, esti en la dia graco estis praktike neebla, ĉar se vi strebis plenumi ĉiujn regulojn, praktiki ĉion, se nur vin karesis penso. “Jen, fine mi estas en la dia graco... miamalbonŝance, mi pekis je orgojlo, mi perdis la dian gracon: mi devas ĉion refari de lakomenco”. Tia estas la religio. La religio bezonas, ke la homoj sin sentu ĉiam en kulpo, ĉian malindaj, ĉar Dio aprezas nur la agojn, sed kontrolas ankaŭ la pensojn, do li en vi analizas eĉ la pensojn; imagu kiom da religia teruro, kiom da klientoj por la psikologoj kaj psikiatroj provizis religio. Ĉar se al vi plonĝas penso - kaj kutime la aĉaj pensoj, kiu scias kial, koncentriĝas ĉiam ĉirkaŭ la seksa sfero, ne ĉirkaŭ alio - se sur vi do plonĝas aĉpenso jen okazas, ke Dio vin jam juĝis.

Foje al mi okazas, aparte kun personoj jam iom plurjaraĝantaj, enprizonigitaj en tiu malsano, ke ili konfesas kaj diras: “Patro mi havis aĉpensojn”. “Kaj dankas al la Sinjoro ke malgraŭ via aĝo ankoraŭ tiaĵojn vi havas. Kiom aĉaj tiuj pensoj vi opinias ke ili estu? Nur la agoj kiuj gravas! Danku, oni vidu, ke vi ankoraŭ riĉas je sano”. Nu, religio sukcesas inokuli la kulposenton kaj malindecosenton en homojn. Kun Jesuo ĉio tio jam finiĝis. Jesuo laŭ la johana 13a ĉapitro faras ion neantaŭaŭditan: li kiu estas Dio ne atendas, ke homoj sin purigu por fariĝi indaj esti alproksimigitaj al Li, sed Li, la Sinjoro, fariĝas servisto, por ke tiuj kiujn oni konsideras servistoj havu la sinjorajn kondiĉojn; estas Jesuo kiu leviĝas por lavi la piedojn. Lavi la piedojn estis tasko de malsuperaj uloj rilate al siaj superuloj; estis devigita lavi la piedojn la filo rilate la patron, la edzino rilate la edzon, la disĉiplo rilate sian majstron. Tiuepoke, homoj moviĝis sensue; imagu kiel estis la tiamaj stratoj: polvo, fekaĵoj, kraĉoj; la piedoj estis la plej malpuraj kaj naŭzigaj korperoj de homo. Nu, Jesuo, kiu estas Dio, ne diras al la homoj: vi vin purigu; sed li komencas. Ni jam diris, ke Dio estas amo deziranta komunikiĝi, li komencas purigi la eron plej malpuran, la plej naŭzan kaj forpuŝan de homo. Iu Dio kiu ne hezitas malpurigi siajn manojn, sed tiom estas lia amo ke... “mi ne atendas ke estu vi purigi vin, sed akceptu min, ke estas mi preta vin purigi”.

Tiam, falas tiu bildo, kiun la religio kreis laŭ kiu ni devas nin purigi, fariĝi indaj por nin alproksimiĝi al la Sinjoro, elradike ŝanĝiĝas: ne vi devas indiĝi por alproksimiĝi al la Sinjoro, sed vi akceptu la Sinjoron kiu vin igas inda. Lavi la piedojn - atenton! - ne estas signo de humileco iniciate de Jesuo, sed digno-signo; Jesuo, kiu estas Dio, montras, ke la vera digno de homo, la vera valoro de homo ne konsistas en “esti servita”, sed en “servi”. La personoj, laŭ Jesuo, sin realigas nur kiam, vole, libervole kaj proame elspezas sian vivon je la servo al la aliaj. Servi al la aliaj ne signifas perdi dignon, sed montri tiun veran.

Fine: eta sintezo, kompreneble, pri la evangelio de Johano - fantaziplena ago de la Patro. Ni jam vidis la agon de Jesuo, kaj Dio dum ĉio tio kiel sintenas? Ni citu unusolan versegon de la 15a ĉapitro: se ni sukcesas kompreni tiun eron, sed nur por ke ĝi vere enradikiĝu ene de ni mem, ĝi renversas la rilaton kun Dio, kaj kiam ŝanĝiĝas la rilato kun Dio ŝanĝiĝas ankaŭ la rilato kun la aliaj. Jesuo komparas sian ko-

munumon, la kredantaron, al vitarbo, kies li estas la vitala limfo. Li diras: “Mi estas la limfo, la vitarbo; vi la branĉoj, la Patro estas la agrikulturisto”. Temas pri tri roloj distinktaj; do ni la vitobranĉoj, Jesuo la vitarbo tra kiu fluas la vitala limfo, la Patro la agrikulturisto. Nu, diras Jesuo: ”Se la vitbranĉo donas frukton ĝi estas laŭnorma; la vitbranco suĉante la vitalan limfon tiun ĉi transformas al frukto. Tio estas, la kredanto, suĉante tiun senkondiĉan amon, malavaran, kontinuan kaj pliiĝantan, kiun Jesuo al li transdonas, ĝin li transformas al amo por la aliaj. Hieraŭ vespere ni konsideris kiom da damaĝoj kaŭzis, en la kristana spiritualeco, nekorekta traduko pri la evangelia teksto. Pluraj el tiuj damaĝoj, kiuj nin ankoraŭ trenas en nia eklezio, konsistas en tio, ke la evangeliaj tekstoj, la originaj grekaj tekstoj, ek de la kvara jarcento kaj poste estis anstataŭitaj - kaj fine forlasitaj - per iu latina traduko; kaj la tradukoj, eĉ se ĉiam pli perfektigitaj - kaj ne estis perfekta tiukaza traduko - ne seniĝas je limoj kaj eraroj, kaj multaj miskondutoj en la spiritualeco estas ŝuldigendaj ĝuste al tiuj mistradukaĵoj. Ni prikonsideris hieraŭ vespere la inviton de Jesuo orientigi diversmaniere nian vivon per “pentofaru”: tio estis ruiniga! Ĉi tie, bedaŭrinde, iuj tradukantoj la agon de la Patro tradukis per la vorto “pritondi”; jen do ke kiam okazis malfeliĉaĵo, la devotaj personoj - nin jam vidis hieraŭ vespere, ke ili estas ĉiam la plej riskigantaj se renkontitaj dum malfacilaj situacioj - pretaj per la respondo: “Estas la Sinjoro kiu vin stucas aŭ pritondas”. Tio devenas el la ideo laŭ kiu kiam Dio amas personon, al tiu li provizas stumblojn por konstati ĉu la amo de la amato kreskas. Se vi volus plu trovi tiaĵojn, bonvolu vin sintonizi laŭ “Radio Maria”. Estas totala deliro! Se iu deziras asociiĝi al rapida kurso pri stultiĝo sin radielsende sintonizu al “Radio Maria”. Vere ruiniga; tie estas instruate, ke Dio nin tiom amas ke, por konstati ĉu ni vere lin amas, deprenas, de ni, ekzemple amatan personon. Kiomfoje mi aŭdis el “Radio Maria” personon dirantan: “Mi perdis mian filinon”. “Estas la Sinjoro kiu tion permesas, por vidi ĉu vi lin amas”. Bone, daŭrigu tion, deprenu el mi ankaŭ mian edzon, alian familianon... Oni vidu ĉu oni daŭrigas ami... Nu, tio nomiĝas religia terorismo. Ĝuste, eĉ tio baziĝis sur la imago de pritondado. Nu, la verbo uzata de la evangeliisto ne estas “tondi, stuci”, sed “purigi”, kiu sonas alisence. Kion celas diri la evangeliisto? La sola zorgo de la vitbranĉo estas doni frukton; la sola zorgo, streĉo de la kredanto estas ricevi tiun amon kaj ĝin transformi al samkvanta amo por la aliaj. Se kuŝas en homo negativa elemento, se troviĝas aspektoj kiuj ne estas pozitivaj, se burĝonas ankaŭ neperfektaĵoj, limoj, atentu! Ne li, nek la aliaj vitbranĉoj: la Patro komencas la procedon de purigado, kreskanta kaj kontinua; sed ne la vitbranĉo.

Ĉu vi komprenas ke tio gravas? Kutimiĝinte al konsciencekzameno, per kiu ni devis kontroli: ĉu mi faris tiun, ĉu mi plenumis tiun ĉi?... Nu ĉio tio malaperas. La sola mia zorgo estu ami la aliajn. Se en mi restas io negativa, ne mi, sed la Patro ĝin eliminis. Ĉar se tion faras mi, povas esti ke mi risku tuŝi kelkan el tiuj vitalaj fadenoj kiuj subtenas mian vivon kaj estos ruinigo; ĉar, eble, aferoj kiujn mi taksas negativaj tiaj ili ne estas ĉe la okuloj de Dio; ĉu vi memoras la hieraŭan distingon? Inter la Dio kiun kredis niaj gepatroj kaj tiu kiun kredas niaj filoj estas granda malsamo; kiom da aferoj ili iam taksadis peko kaj hodiaŭ la samaj ne pekoj estas; sekve, povas esti, ke iuj aferoj kiujn ni juĝas negativaj, tiaj ili estas ĉe Dio. Tiam se ni iras labori tie estas

minacata ruino, kaj kiu laboras sur sin mem nenion alian faras ol nutri sian egoismon. La persono sin realigas ne kiam eniras en sin mem, sed kiam eliras el si mem por aliri al la aliaj. Ĉi-rilate Jesuo sugestas: ne zorgu pri io ajn, la ago de la Patro en vi estas plene pozitiva. Se restas en vi aspektoj kiujn vi negative taksas, nu prizorgos Li por la elimino; se Li ĝin ne eliminis oni vidu, ke ĉe Liaj okuloj ĝi ne estas negativa. Jen, tia estas la sintezo de la bonsciigo prezentita en la evangelio de Johano. Sed nun pluiru ĉi-matene al alia evangeliisto, Luko, kiu anticipas tiun instruadon, tiun aktivadon de Jesuo tute rekte ek de la momento de lia naskiĝo. Temas pri epizodo, signifega cele de la komprenado pri la bonsciigo. Ĉi-matene, do, ni legu la ĉapitron duan de Luko, la versegojn koncernantajn la anoncon de Dio al la paŝtistoj, ke naskiĝis Lia filo. Se iu volas sekvi pli atente, tiu vidu la versegon okan; ni faru rapidan analizon pri tiu ero evangelia,

“Estis en tu regiono iuj paŝtistoj”. Altiĝu kaj atentu! Kiam ni legas la evangelion ni devas ĉiam ĝin situigi tra la kulturo de la epoko kaj ne ĝin transporti al la nia. Ni estas revenintaj de la ĵus pasinta Naskiĝfestoj, la paŝtistoj en la kripo estas belaj figuroj: ili estas romantikaj, ĝentilaj, ĉiuj kun agneto beleta; jen, tiuj estis frukto de nia kreemo, sed ili ne estas la paŝtistoj de la Jesua epoko. Kial la evangeliisto elektis la paŝtistojn? Ĉar ili reprezentis la antonomaziajn pekulojn, tiujn kiuj kiam venos la Mesio estos ekstermitaj ĉar la Mesio venas por efektivi la juĝon je la nomo de Dio kaj eliminis la pekulojn. Kial ĝuste la paŝtistojn? Imagu tiujn homojn kiuj vivis fore el la loĝataj centroj; ili estis servistoj neĵuste pagataj, ekspluatataj, kiuj sin aranĝis travivante per perforto, per ŝteloj: konsideritaj la intima esenco de la pekulo, tipa pekulo por kiu ne estas espero pri savo. Ĉar ili estas tiel mergitaj en la malindeco, tiel mergitaj en la malpureco ke por ili, eĉ se ili volus, ne koncepteblas espero: fakte senigitaj el civilaj rajtoj, ili estis konsiderataj kiel bestoj. En Talmudo oni legas: “Se vi trovas paŝtiston falintan en fosaĵon, ne levu lin, ĉar senutilas, ĉar por li ne estas neniu savo”. Tiaj estis la paŝtistoj. Tial la evangeliisto al ni prezentas tiajn ulojn (la paŝtistoj estas sennomaj: ni vidos plurfoje laŭkurse la signifon de la anonimeco): la anonimaj personuloj estas reprezentaj: nome, la evangeliisto invitas ĉiujn kiuj vivas similan situacion identiĝi kun ili: do la paŝtistoj estas personoj vivantaj en situacio el kiu ili ne povas eliri, eĉ se ili tion volus: samigitaj al la publikanoj.

Nu, “estis en tiu regiono iuj paŝtistoj kiuj nokte gardis...”. La nokto ne estas nur kronologia indiko; la nokto en la evangelioj signas la tenebrojn, la pekon: estas la paŝtistoj personoj mergitaj en la peko. Ili gardis sian gregon. Anĝelo de Sinjoro prezentiĝis antaŭ ili. Eventego, kiu finigas epokon! “Anĝelo de la Sinjoro” estas teknika termino uzita en la biblio por indiki Dion kiam Li manifestiĝas al homoj. Hebreoj ŝatis la distancon el Dio kaj evitis uzadi la terminon “Dio” aŭ “Sinjoro” komuniĝanta al homoj. Tiam, por indiki dian agon uzadis le teknikan terminon “Anĝelo de la Sinjoro”, sed Anĝelo de la Sinjoro estas Dio mem; temas pri formulo por indiki Dion manifestiĝantan al homoj. Tiu Anĝelo de la Sinjoro en la Malnova Testamento estas prezentita kiel anĝelo kun la spado tramane, nome ekzekutisto. Ĉu vi memoras pri la Kastelo Sankta Anĝelo kie la Anĝelo elstaras kun la spado tramane? Estas ĝuste tia la Anĝelo de la Sinjoro. Li sin prezentis antaŭ ili: jam farite! Oni sciis, ke Dio estas

faciliganta la vojon al la Mesio: do, vi vin metu en la vestoj de la hebrearo aŭ de la aŭskultantaro nescianta la sekvon de la historio: temas pri paŝtistoj, nome la antonomaziaj pekuloj, alvenas la Dio krimpunanta kaj male ĉiuj ne povas ne esti elreviĝintaj. Kial? Ĉar estis ĝuste tiun kvin ili firmafide atendadis. Vi sciu ke ne estas ularo pli militema ol la religiaj personoj. Ĉu vi provis legi la psalmojn? Ili mergiĝas en perforto. “Mi vin laŭdas, Sinjoro, vin benas, mortigu ĉiujn miajn malamikojn”. Li mortigis ĉiujn la ununaskitojn de Egiptujo. Kiom bonas la Sinjoro!

Ha, klare, se ili estas viaj malamikoj tiam ili meritas esti mortigitaj. Kaj la psalmistoj diradis: “Kiam venos la Sinjoro li bruligos la pekulojn”. La alveno de Dio koincidos kun la ekstermino de la pekuloj por ke Dio malamas la pekulojn. Tiam, la anĝelo sin prezentas al tiuj fihomoj dirante “naskiĝis la filo”, kaj jen la fajro kiu neniigas ĉiujn! Kiu surprizo, kiu ŝoko! “la gloro de la Eternulo brilis ĉirkaŭ ili”. Ve, tiupunkte oni ĉesas kompreni. Kiel? Sed ne estis instruite de la rabenoj, ke Dio abomenas la pekulojn, ke Dio, la Sanktulo de la Sanktuloj, distanciĝas el la pekuloj, ke li al ili sin alproksimas nur por ilin detrui, ĉu ne? Dio unuafoje en la historio **renkontiĝas kun la pekuloj kaj ne nur ilin ne cendrigas per la furoro de sia kolero, sed ili ĉirkunvolvas per sia amo**. Lumo kaj brilo de Dio; en tiu kazo io ne funkcias. Ĉi tie falas la tuta teologio: se estis instruite, ke Dio abomenas la pekulojn, kiel okazas ke nun Dio, renkontante pekulojn ilin li ĉirkunvolvas per sia amo? La evangeliisto anticipas agadon kiu similas al tiu de Jesuo. **Dio, la Dio de Jesuo, ne estas Dio bona, estas Dio unike bona** kiu ne konas alian manieron rilatiĝi kun la personoj ol tiu de la senpaga komunikado, senĉesa kaj kreskanta en la amo. Do la evangeliisto anticipas per tiu sceno tiun kiu estos la agon de Jesuo.

“Kaj ili timis per granda timo”. Kaj mi tion kredas! Ili estas envolvitaj per tia amo sed ili ne scias kiel la afero finiĝos, ĉar en ili subkuŝas plena religia pensmaniero. Ĉi tie la evangeliisto konprenigas kiom malfacilas elradikigi la tradician religian konceptadon. Kiom malfacilas ankaŭ hodiaŭ por kristanoj sin liberigi el la bildo pri la timo antaŭ Dio. Dio estas timenda. Kaj tiuj estas kaptitaj de la granda timo. Sed, al la granda timo kion oni kontraŭmetu? La anĝelodiris al ili: “Ne timu; ĉar mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo”. Al la granda timo jen la granda ĝojo. Unuafoje parolante al pekuloj, Dio ne diras. “Nun vi iru vin purigi; pentu”, sed : “mi al vi venigas grandan ĝojon!

La ago de Dio, kiu ajn estas ilia kulpo, kiu ajn estas ilia konduto, estas la komunikado pri granda ĝojo. Kaj pri kiu ĝojo? “Hodiaŭ naskiĝis por vi, en la urbo de Davido, Savanto”. Savanto: do ne temas pri Dio juĝisto, pekulpunanto; Jesuo estas la Savanto. Sed pri tiu termino “savanto” oni bezonas atingi pli klarajn ideojn, ĉar ke Jesuo estas savanto por ĉiuj ne dubendu, sed mi konstatas, almenaŭ en miaj renkontiĝoj, kiam mi ekenketas pri el kio Jesuo nin savis, iom da konfuzo. Kutime la respondo elmergiĝanta el la katekismaj spuroj estas, ke Jesuo nin savis el la peko. Mi diras: “Ha, jes, por ke vi ne plu pekas?”, kun elrespondo tia: “Indulgu, kelfoje ankoraŭ okazas”. Tiam, el kio nin savis Jesuo? **Jesuo estas alimonata Jesuo ĉar li transigis la homaron el neebila rilato kun Dio, bazita sur la obeo al la leĝo, al ebla rilato en la akceptiĝo kaj praktikado de lia amo**. Jen la savanto, savanto ĉar

“al vi mi venigas grandan ĝojojn”! Ne interesas via sinteno rilate al la Templo, se vi ĝin vizitas aŭ ne, ne gravas ĉu vi preĝas aŭ ne; Jesuo venis por vin liberigi. La rilato kun Dio ne konsistas en la nombro de religiaj praktikaĵoj plenumitaj, sed en la ama sinteno kreiginta helpe de li, ama sinteno kiu poste disvastiĝas tra la aliaj.

Nu, en tiu manifestiĝo estas dirate, ke subite aperis kun la anĝelo multo el la ĉiela regno laŭdanda Dion per jenaj vortoj: “Gloro al Dio en la supera alto”. La gloro estas la videbla manifesto tio kio estas Dio. La evangeliisto diras, ke la gloro de Dio en la supera ĉielo konsistas... ja, en kio konsistas? Ni parolis pri misoj en la tradukado, mistradukaĵoj kiuj ofte devenis el religia ideologio. Vi certe memoras kiel, antaŭ la lasta Koncilio, konkludiĝis la fina frazo de tiu “Gloro en la supera alto de la ĉielo, kaj sur la tero paco al la homoj ... je bona volo”; nome, paco al kiu ĝin meritas. Estis la religia ideologio de la merito: kiu meritas, la homoj de bona volo, havas la pacon, la aliaj ne.

Sed tiu estas en kontraŭdiro kun la mesaĝo de Jesuo. Se vi hodiaŭ posedas novan eldonon ĝisdatigitan de la evangelio laŭ Luko, vi trovos ke ne plu estas nomataj la homoj de bona volo, sed “la homoj kiujn Dio amas”. La paco: “paco” signifas en la samsenca hebrea termino, ĉion kio kontribuas al la pleneco de feliĉo en la homoj. Ĝi estas petata el Dio ne por tiuj kiuj ĝin meritas, sed por la tuta homaro, por ke la tuta homaro estas la celo de Lia amo. La dia gloro kie brilas? Tie kie la homo estas feliĉa. Je, kial Jesuo fore balaas - ni tion vidis hieraŭ vespere - tiun bildon de Dio malamiko de la feliĉo. tiun bildon timigan; ĉar kiam iu bone prosperas, se la Sinjoro tion ekscias, almenaŭ unu krucon, unu kruceton, neniu forigas el li; tiun ideon pri “la plorantaj kaj ĝemantaj en tiu larmo-valo” en kiu ni naĝas tiom bone, Jesuo detruas. Dio ne estas malamiko de la homa ĝojo, Dio ne malamikas al la feliĉo de homoj. Fiksu en la menso, tio gravas, ĉar ekzistas vortoj kiuj estis malpermesitaj al la kristanoj. Oni renkontas personojn kiuj kiam ekgustas plezuron, agante certamaniere, sin sentas trakulpe, ĉar kiam ennestiĝas plezuro Dio ne konsentas. Nu, la volo de Dio pentrita de Jesuo agas por ke la homoj ĉi tie, sur tiu ĉi tero, atingu la plenecon de la feliĉo.

Poste la anĝeloj foriras, la paŝtistoj iras al Betlehemo, anoncas kion ili aŭdis kaj, en la versego 18a la evangeliisto skribas: “Kaj ĉiuj aŭdinte miris pri tio, kion rakontis al ili la paŝtistoj”. Okazas io stranga, laŭ la loĝantoj: falas la tuta instalaĵo de la religia tradicio. Sed kiel eblas, ke paŝtistoj aŭdacis diri, ke mem estis envolvitaj per la dia amo? Kaj per ili, anstataŭ juĝisto, estas anoncite, ke naskiĝis Savanto? Ĉiuj estas konfuzitaj. La evangeliisto ĉi tie priskribas la krizon de sia kristana komunumo nekapabla akcepti la grandiozecon de la novaĵo portita de Jesuo. Maria, la patrino. Maria, eĉ ŝi, miras, sed pripensas en sia menso. Maria ne rifuzas la novaĵon.

Kaj la finaĵo estas sensacia. “Kaj la paŝtistoj revenis glorante kaj laŭdante Dion”. En la imago-deponejo de tiu epoko, Dio loĝas en plej alto komplete envolvita en alono de lumo kaj al Lia servo staras sep anĝeloj, nomataj anĝeloj de la servo, kies tasko estis laŭdi kaj glori Dion senĉese. Nu, la evangeliisto ĉi tie estas diranta ion nekredeblan: se investitaj de la dia amo, se spertintaj la senpagan, senkondiĉan amon de

Dio, ankaŭ la uloj opiniataj foraj el Dio povas plenumi la saman funkcion de la anĝeloj, la estuloj pli proksimaj al Dio,

La paŝtistoj do revenas laŭdante kaj glorante Dion. Tial kiam oni akceptas esti envolvita per tiu amo, jen la vivo ne povas ne ŝanĝiĝi: ne plu daŭras tiu distanco kiun la religio metis inter Dio kaj homoj, tio estas nuligita; kaj ankaŭ la personoj neniel ŝanĝas metion, tiuj paŝtistoj daŭrigas agadi kiel paŝtistoj; ankaŭ konstantaj en aktivado kiun la religio taksas negativa kaj la oficiala moralo peka, oni povas plaĉi al Dio. Tio estas renverso, tio estas la bonsciigo, sed ne por ĉiuj; se ĝi estas bonsciigo por tiuj kiuj vivis flankemetite pro la religio, por tiuj kiuj vivis en la peko, ĝi estas malbonsciigo por la fariseoj, nome la personoj kiuj konstante igis sian vivon daŭra strebo por esti akceptitaj ĉe Dio. Sed haltu! Kiel eblas ke mi faranta tiom da oferoj kaj streboj por akiri ereton da amo ĉe Dio similas tiujn ulojn, kiel eblas, ke Dio amu ankaŭ tiajn malbonŝanculojn? Kaj vidu, miaj aŭskultatoj, ke tio kontaĝis ankaŭ la kristanan pensmanieron. Kiam oni aŭdas, ke Dio ne juĝas, ke Dio ne estas tiu dia justeco kiun la homo kredas, sed ke Dio al ĉiuj donas amon, ke Dio volas ĉiujn savi, la fariseoj, kiuj sin gloras en la temploj, opone reagis; kiam vi parolas pri la amo de Dio vi ilin aŭdas rebati: "Jes, sed Li estas ankaŭ senfina justeco, ĉar ne justas ke mi, kiu oferis la tutan vivon por bone stari ĉe Dio, ricevas la saman traktadon liveritan al tiu malbonŝanculo kiu ne ĉesis vivi kiel porko kaj kiun ĉe la lasta momento la Sinjoro akceptas ĉe si.". Mi imagas la elreviĝon de tiuj personoj kiuj humiligis la tutan sian ekziston kiam ili prezentiĝos antaŭ la Eterna Patro: pro tio ke mi rezignis tion kaj tiun ĉi, pro tio ke mi min humiligis, pro tio ke mi faris tion kaj tion ĉi! Kaj la Eterna Patro respondos: "Sed kiu al vi altrudis tiaĵojn? Kial kongruas kun via pensmaniero ke mi postulas rezignojn? Kiel vi eniris en la opinion, ke al mi plaĉas, ke vi vin humiligu? Mi estas vivo kiu postulas esti akceptita". Kia elreviĝo! Vidu, kia fiasko de la tuta vivo! Vivo farita je rezignoj: troviĝas personoj kiuj ne sin realigas pro miskompreno pri Dio.

Ĝuste Luko prezentas timigan parabolon: ĉu vi konas tiun kiu en la aliaj evangelioj oni parolas pri la talantoj? Mastro kiu lasas senproporcian bonaĵon al siaj subuloj: revenas kaj iu kion faris? Diras: "Sinjoro, mi scias ke vi estas severega, kiu falĉrikoltas kie vi ne semis; kion vi donis al mi, mi subtere kaŝis. Ĉi tie estas uzata la vorto "tuketo" (laŭlitere, 'mortotuko', kaj la mortotuko estas vualo kiun oni metis sur la vizaĝon de mortinto por ne vidi la ekputriĝon): la denunco de la evangeliisto estas timiga: se la vivo, pro trompa bildo pri Dio, ne estas elspezita por favori al la aliaj, ĝi restas sub mortotuko; tuko, kiu estas senmakula nur en la ekstera aspekto. Deprenu la mortotukon: jen la putriĝo de la morto. Evidente estas personoj rezignintaj pliigi kion posedis, nome siaj aktivokapabloj, siaj emocioj, pro misa sento pri Dio, ĉar ili opiniis ke Dio estus malamiko al ilia interna realo. Do ĉio tio gravas.

Sed jen io same grava kaj instrua.

Tiam fariseoj (la termino 'fariseo' signifas 'apartiĝinta': temas pri uloj kiuj, per la praktikado de ĉiuj preceptoj de la leĝo, por meriti la dian amon sin apartigis el la aliaj) plenumas ion nekoncepteblan, ĉar evidente malruzaj: ili naive invitas Jesuon manĝi ĉe ili. Tri fojojn ili lin invitas kaj tri fojojn la manĝo okazigas misordon. Ni konsideru nur la unuan: temas pri epizodo je ruĝaj lumoj, temas pri eble la plej malglata el la

epizodoj de la Luka evangelio, kie la evangeliisto intensigas siajn kolorojn ĝuste por evidenti la kontraston inter religio kaj kredo. En la ĉapitro sepa de la luka evangelio, en la 36a versego, ni trovas ke iu el la fariseoj preĝpetis, ke Jesuo manĝu ĉe li. Fariseoj, ularo obsedata de la purecideo, jam konstituis por si manĝaĵo-koopervon, por eviti, ke io ajn eniru ilian hejmon liberigita el la devo pagi la dekaĵon, ke nenio estu malpura; tiuj personoj - oni strebu superi hororiĝon! - sukcesis ekstrapoli el la leĝo (ke religio - jam ni vidis hieraŭ - kretinigas homojn estas jam sciata, sed religio estas ankaŭ freneza, komika) ĝis 613 preceptojn obeendajn, preskaŭ, laŭkvante, egalaj al la tagoj de la jaro, kaj 248 ordonojn, kvantesimile al la komponantoj de la homa korpo. La vivo de fariseo estis regulita ĉiam, en ĉiuj momentoj de la tago, per preĝoj kaj devotaj agoj. En Talmudo ni legas kiel devis kondukti tia persono: nur unu ekzemplo: matene, ĉe la vekiĝo, oni malfermu la dekstran okulon kaj diru: “Benata la Sinjoro kiu inundis la mondon per la lumo”; poste la maldekstran okulon kaj jen alia beno, poste metu pavimen la dekstran piedon kaj poste la maldekstran, ktp: ili estis estimataj inter la sanktuloj plej sanktaj, ili ĝuis je granda admiro ĉe homoj pro ilia vivo interplektitaj tra devotaĵoj. Kaj ĉar - ni jam diris - religio estas ankaŭ komika, troviĝas preĝo kiu el si mem meritas aprezon, sed per ĝi senvualiĝas la pinto de la komikeco en religio. Fakte ĝi frapas: kiuj vivas mergitaj trareligie, tiuj ne konsciiĝas pri la ridindeco el ili emananta; nepras eviti tiun kontakton por tion vidi. La preĝo tiel diras: “Mi Vin benas, Sinjoro Kreinto, kiu laŭ via ĉiopovo perfekta kreis la homon: fakte iuj truoj en la homo estas fermitaj, aliaj malfermitaj. Se la malfermitaj fermiĝus kaj la fermitaj malfermiĝus, la homo ne vivus”. Tia estas la fariseo: obsedata de la purecideo.

Kial ili invitas Jesuon manĝi ĉe ili? Ĉar ili volas altiri tiun homon, tiun homon kiun ili vidas karismplena, tiun homon kiu fascinas homamason, tiun ili provas klasi inter la siajn. Kaj Jesuo? Jesuo estas amo kiu neniun rifuzas kaj al ĉiuj sin donas. Jesuo eniras la domon de la fariseo; gravas jena apartaĵo en tiu epizodo: tiujn tempojn, en oficialaj manĝoj, oni manĝis - kaj malkomfortege estis! - en kuŝa pozicio sur porlitoj, sur litetoj entute; do Jesuo sin poziciis kuŝe. (Oni sin apogis sur la dekstra kubuto, oni prenis nutraĵon per la maldekstra mano el granda plato centre metita. Kaj la evangeliisto enrompas kun granda surprizo. “Kaj jen”, tiam la evangeliisto altiras la leganton al io neniam anatŭe aŭdita: **“iu virino”**. Virino kiu eniras la domon de fariseo. Por kompreni tiun epizodon necesas rememori, ke en la tiama socio la virinoj malĉeestis, la virinoj estis ritirigitaj en la kuirejo por pretigi la manĝon, sed neniam virino sin miksu inter viroj dum bankedo. La virinoj, estante pro sia naturo subhomaj kreaĵoj kaj ĉiame malpuraj, evitas ĉiun ajn kontakton kun viroj. Nu, en tiu manĝosalono de la fariseo eniras virino. Sed ne nur: **pekantino en la urbo**. En la domo de la fariseo, kies sojlon nenio ol pura trapasas, eniras prostituitino. Sciiĝinte ke li kuŝmanĝe gastas en la domo de la fariseo - Oj ve, kion skribas Luko - ŝi kunportas alabstran vazon profumplenan. Por evitigi, ke oni konfuzu la prostituitinon de la evangelio kun la aktuala prostituicio, ni iru malkovri kiuj estis la prostituitinoj de la jesuaj tempoj.

Kiam en familio ekzistis unu aŭ du knabinoj, la aliajn oni eliminis ekde la naskiĝo - tio ne estis konsiderita krimo - aŭ ili estis forlasitaj ĉe vojkruciĝoj. Pasas sklavko-

mercisto, prenas tiujn kreaĵojn kaj do la knabinoj ekedukiĝas al la rito de la prostitucio. Ni havas historiajn dokumentojn montrantajn, ke je la aĝo de kvin jaroj tiuj virinoj jam komencis la praktikadon de la prostituicio kaj okjaraĝaj knabinoj estis jam ekipitaj por kompleta seksrilato. Ne okazis ke virino dirus: “hodiaŭ mi iras min prostitui”; estis kondiĉo kiu oni akiris praktike ek de la naskigo. Ankaŭ tiu prostituitino estas anonima kaj ne konfuzenda kun aliaj personuloj de la evangelio. Estis papo Gregorio la Granda kiu faris - povrulo! - grandan konfuzon kaj identigis en tiu prostituitino eĉ tri personulojn de la evangelio: Maria el Magdalo kaj Maria el Betanio kaj tiu ĉi anonima.

Jen tiu prostituitino troviĝas nur en la evangelio laŭ Luko kaj do nemiksenda kun Maria Magdalena, la fama Magdalena pentinta. Magdalena devas penti pri nenio, kaj estis lidero en la komunumo.

Tiu prostituitino estas anonima ĉar per tiu prostituitino la evangeliisto emas signali la situacion de personoj vivantaj en malŝatata situacio ĉe la socio, kiu taksas ĝin nemorala, kaj kondamnita de la religio juĝanta ĝin pekeca. Tial ĉiuj personoj kiuj sin sentas rifuzitaj, flankemetitaj de la socio kaj ekskluzivitaj de la religio povas identiĝi kun tiu persono.

Ŝi portas vazon je parfumita unĝento; la prostituitino eniras salonmanĝon kun la armiloj de sia profesio. Ŝi estis edukita ek de la infanaĝo plaĉi al la viroj, kontentigi virojn, kaj ne scias fari ion ajn ol tion al kio ŝi estis edukita.. Tial ŝi eniras kun la parfumita unĝento. Al kio servu tiu unĝento? Por masaĝi kaj eksciti la klientojn; jen la utilo de la unĝento. Pro tio ŝi eniras kun la profesiaj armiloj; kaj sin poziciante malantaŭ, ĉe liaj piedoj, larme plorante ŝi komencas bani la piedojn kaj sekigi ilin per siaj kapharoj. Vi scias ke en la hebrea religio la knabinoj, ekde la momento de la pubereco, sin kapvualigis kaj daŭrigis esti tiaj laŭlonge de la tuta vivo; nur hejme la edzo, fratoj kaj gefiloj povas ŝin vidi senvualita. Se la viro trovas laŭvoje la edzinon senvualita, li povas ŝin repudii; nur la prostituitinoj rajtis travoje promeni senvuale ĉar la kapharoj estas nerezistebla armilo seksalloga. Ĉu vi konas la epizodon de Judita kaj Oloferno? Judita sin pezentis antaŭ li, sin senvualigis kaj Oloferno perdis la kapon: fakte Judita ĝin al li tranĉis! La kapharoj estis nekreble allogiga ilo, kaj do estis granda forto en la prostituitinoj. Tiu ĉi prostituitino, do, volas danki al la Sinjoro kaj tion efektivigas laŭ maniero en kiu ŝi kutime sukcesas: la arto al kiu ŝi estis edukita; kaj do, ne nur ŝi per larmoj banas la piedojn de Jesuo, sed per la kapharoj - jen la momento de la erotika allogo - al li ilin sekigas, kaj - ŝi estas prostituitino - per la buŝo malsekigadis la piedojn kaj ilin ŝmiradis per la unĝenta parfumo. Vere temas pri sceno je ruĝlumo, ĝi skandalas; kaj la fariseo, lin invitinta, ne plu rezistas: “Sed tion vidinte, la fariseo lin invitinta, diras ene de si: ‘**Tiu** ...’ - vi notu la malŝaton: li evitas nomi Jesuon; en tiu notiĝas granda malŝato: li, la homo de la pureco antaŭ tiu ĉi homo ‘se estus profeto’ do temas pri ne profeto, ‘scius’ - kaj oni rimarku per kiu sinteno li aludas la virinon! ‘kiu kaj kia virino estas tiu ĉi’. Konsideru: ‘**tiu**’ kaj ‘**kiu**’: Jesuo kaj la prostituitino akumulitaj en la sama malŝato; ‘kiu lin tuŝas!’ La religiaj personoj estas ĉiam malicetaj: ili vidas pekon tie kie ĝi ne estas. La verbo ”tuŝi” uzita

de la fariseo signifas “fingrumi, palpi”; do, dum Jesuo tion vidas kiel dankaĵon, la fariseo tion vidas kiel ekscitaĵon, inviton al peko: kial? Ĉar ŝi estas pekulino.

En tiu epizodo kolizias du sintenoj: la fariseo, kutimiĝinta juĝi laŭ religiaj parametroj, kaj Jesuo kiu estas la videbla maninifetacio de la amo de la Patro, tiu Jesuo kiu - ni jam diris - ne venis por juĝi, sed por savi tion kio estis perdita. Tial la fariseo juĝas laŭmaniere de la religio kaj vidas pekantaron kiu estas tentanta Jesuon al peko. Reagante, Jesuo al li diras “Simono, mi havas ion por diri al vi”. Kaj Simono respondas per la kurieca lingvaĵo, nome falsa: “Majstro, diru...”; jen la falseco de la religianoj! Kaj Jesuo al li eldiras malgrandan parabolon pri iu Sinjoro kiu havis du ŝuldantojn. Unu al li devis 500 denarojn (denaro estas la taga pago, do li ŝuldiĝas al li per pli ol unu jaro kaj duono da laboro) kaj alia 50. La nenion havantojn por redoni, li indulgis ambaŭ. Kiu do el la du lin amu pli intense? Anstataŭ uzi la vorton ‘pardoni’, la evangeliisto por indiki la agon de Dio (de tiu kreditoro) uzas la verbon ‘indulgi’. Unu al li devis unu jaron kaj duonon da laboro, la alia iom pli ol unu monaton. Kiu el la du estos la plej dankema? Simono respindas malvole. “Mi supozas ke estas tiu al kiu estis pli indulgita” kaj Jesuo komentas “Vi bone juĝis”. Jesuo pozicias kiel majstro liveranta poentojn al la lernanto!

Kaj jen la sceno plej grava: Turniĝinte al la virino, Jesuo ne vidas la prostituĵon. La fariseo jam ŝin difinis “pekantaron en tiu ĉi urbo”. Jesuo ne vidas la pekantaron. Jesuo vidas la virinon. Jesuo ne rigardas per la okuloj de la religio, per moralaj kategorioj, sed rigardas per la rigardo de Dio. Li vidas virinon kaj diras al Simono: “Ĉu vi vidas ĉi tiun virinon?” Jesuo invitas Simonon ne konsideri la prostituĵon, sed konsideri la virinon, “Al mi eniranta vian domon, vi ne akvolavis la piedojn. Ŝi male per larmoj banis miajn piedojn kaj per siaj kapharoj ŝi ilin sekigis”. Kion intencas reveli la evangeliisto? Nun Jesuo kontraŭmetas la tri amagojn de la dankema virino al la akceptomankoj de la fariseo, kiuj montriĝas el la faktoj. Jen la virino jen la fariseo jam estis pardonitaj rilate iliajn pekojn. Pri tio nur la virino konsciiĝas, la fariseo ne. Kion signifas tio? Temas pri la novaĵo portita de Jesuo. En la hebrea mondo, samkiel en la religio, oni kredis, ke pekanto devas penti, konvertiĝi por sekve havigi al si la dian pardonon. Jesuo renversas ĉion tion. Jesuo estas amo kiu pardonas la personojn anticipante. Konvertiĝo, ŝanĝiĝo estas eventuale konsekvo. Tiam - mi esperas tion diri laŭ la ĝusta maniero ĉar ĝi povas ŝajni, al iu havanta religiajn orelojn, renverseca - jen kial en la evangelioj **neniam** Jesuo invitas la pekulojn pardonpeti al Dio. En religio okazas kontinua tondrado kontraŭ la pekuloj. “Pardonpetu al Dio”. Neniu en la evangelio! - Ni havas kvar evangeliojn - neniam Jesuo diras al la pekuloj “pardonpetu al Dio”. Neniu! Kial? Pardonpeti al Dio estas la afero plej senutila inter la troveblaj, ĉar Dio neniam pardonas ĉar neniam sin sentas ofendita. **Dio estas amo kiu deziras komunikiĝi al homo kaj en tia amo estas inkluzivita la pardono kiu fariĝos sekve agema kaj efika kiam ĝi transformiĝas en samkvantan pardonon al la aliuloj.** Tiam Jesuo komprenigas, ke la pardono estas jam koncedita, do neniam invitas la pekulojn pardonpeti, sed ĉiam kaj konstante pardoni al la aliuloj.

Se mi nun dirus al vi: ”La Sinjoro nun pardonas ĉiujn miajn pekojn”, ĉu vi rajtas strebi por kredi al mi? Mi tion ne povas pruvi. Vi devas kredi je mia parolo. Kiel mi

faru por montri, ke ĉiuj miaj pekoj estis pardonitaj? Mi ne kapablas tion fari! Kaj mi diras, ke mi pardonis ŝin pro tio ke ni estis en malakordo, tio pruveblas ĉar videblas el la rilato, el la komunikado. Jen kial Jesuo pardonas anticipe ĉiun personojn. Tiam ĉi tie Jesuo per tiu ĉi parabolo diras, ke jen la virino jen la fariseo jam havas pardonitaj iliajn kulpojn: minimumaj tiuj de la fariseo, egaj tiuj de la virino. Kiu estis pli dankema? Kaj Jesuo daŭras, ostentante la diferencon inter la du sintenoj: “Kison vi ne donis, dum, ŝi male ne ĉesis kisi miajn piedojn; oleon sur la kapo vi ne surŝutis, ŝi male per parfumo ŝmiris miajn piedojn”.

Kaj aŭdiĝas la fina sentenco: “Pro tiu motivo: mi al vi diras: al ŝi estas formetitaj ŝiaj pekoj, eĉ se multaj, ĉar multe ŝi amis. Al kiu malmulte estas pardonita, almenaŭ jomete amas. Jesuo estas renversanta, demuntanta la tutan teologian kastelon konstruitan de la religio ĉirkaŭ la fakto de la pardono. **Oni ne atingas la pardonon per la meritoj de la homoj, sed kiel libervola iniciato de Dio.** Jes, Jesuo ne uzas la verbon ‘pardonu’, sed la verbon ‘formeti’. ‘Pardonu’ signifas agon plenumitan de homoj: “Mi pentas, plenumas apartajn pentagojn kaj akiras la pardonon”. Jesuo ne pardonas, Jesuo formetas. Temas pri iniciato kiu startas el la amo de Dio. **Forstreki la kulpojn de la homoj ne dependas de la sinteno de la homoj, sed de la iniciato de Dio.** Tial Jesuo estas senrezerve ŝanĝanta la strukturon de la religio rilate la pardonon. Li diras al ŝi: “Al vi estas **forstrekitaj** la pekoj”. Sed kion faris tiu virino por akiri la forstrekon de la pekoj? Kial Jesuo ne diras: “nun metiŝanĝu, poste dum certa tempo agu puriĝe kaj pentofare kaj al vi estu pardonitaj la pekoj”? Ekscitas skandalon tiu evangelia epizodo ĉar Jesuo ne invitas la prostititinon ŝanĝi metion. Oni devas antaŭmeti al si demnadon, eĉ se maltrankviligan: ĉu tiam licas daŭrigi vivadon tra situacio kiun la religio kondamnas kiel pekon, kiun nome la socio juĝas malbono kaj samtempe resti akceptite ĉe Dio?

Kial Johano la Baptano kiam al li prezentiĝis la publikanoj, aliaj malpuruloj de la epoko, ilin ne invitis ŝanĝi metion, sed sugestis ke ili daŭru en sia aktivado pretendante tamen nur laŭjuste? Nun, por parafrazi la epizodon, okazas kvazaŭ Jesuo dirus al la prostituitino. “Daŭru, sed elpoŝigu el la klientoj nur laŭ justa kotizo”. Tio skandalas. Kial Jesuo forstrekas la pekojn de tiu virino? Jesuo al la adoltulino ĉe la templo diros: Iru kaj ne plu peku”. Al tiu virino ne. Kial Jesuo al la prostituitino ne diras: “Iru kaj ne plu peku”? Jesuo kun ŝi tutekurte diras: “Al vi estas forstrekitaj viaj pekoj”. Kaj kompreneble tio ekscitis malkontenton. Ni jam diris, ke se tiu de Jesuo estas bonsciigo por tiuj kiuj vivas elskluditaj pro religio, estas malbonsciigo por tiuj kiuj forte strebas por esti akceptitaj ĉe Dio. Kaj fakte eksplodas ŝtormo kaj la kunbankedantoj komencis grumbli: “Kiu estas tiu ulo?” Bonvolu rimarki ankaŭ ĉi-loke la malŝaton rilate al Jesuon. “Kiu estas **tiu ulo** kiu forstrekas ankaŭ la pekojn? Nur Dio rajtas forstreki la pekojn”. Kia aŭdaco por tion fari? Kaj jen la konkludo renversiga: li diras al la virino: “via fido vin savis”. Kio ĉe la okuloj de la religio estas sakrilegio, tio ĉe la okuloj de Jesuo estas kredo-esprimo. Tiu ĉi prostituitino, estante maplpura, ne rajtis alproksimiĝi al viro: el la prostititinoj - ordonis la Talmudo, libro tre sankta ĉe la hebreoj - oni bezonas teni minimuman distancon de du metroj, ĉar se vi malpliigis tiun spacon ŝi kontaĝas al vi malpuron. Nu, Jesuo lasis sin tuŝi. Tiu kiu laŭ la

okuloj de la religio konsideratas grava sakrilegio, laŭ la okuloj de Jesuo estis kredago; komplete ŝanĝiĝas la orientiĝo: laŭ la fariseo la konduto de la virino estas klara incito al la peko, laŭ Jesuo ĝi estas danko-esprimo pro lia amo. Ne nur li diras: “Via kreda vin savis”; sed ankaŭ la finaj paroloj, kiuj lasas senrevigaj moralistojn: “Iru en paco”.

Kaj kien ŝi iru? Kion vi volas, ke faru tiu vivino kiu ekde la plej frua aĝo estis edukita al la prostituigo? Al edziniĝo si ne povas aspiri, la origina familio ŝin ne reprenas, eĉ se oni sciis el kiu familio ŝi venas. Kion ŝi faru? Ĉu ŝi elektu morti pro malsato? Ni ne scias. Ni scias nur ke, la evangeliisto informas, ke pliposte kuniĝis al grupo de Jesuo iuj virinoj kiuj estis liberigitaj el malignaj spiritoj kaj de malsasnoj. Tiun epokon la virinoj neniam promenis trastrate kun sia edzo: estus okazaĵo horora. Imagu la skandalon, la renversigan agon de Jesuo kiu sin prezentas kun ereĉto da disĉiploj, kun sekvantaro de virinoj ne tro fidindaj. Tiuepoke ne svarmis ĵurnaloj, sed mi imagas la titolojn... Diras la evangeliisto ke inter tiuj virinoj estis Johana, la edzino de Kuzo. Kuzo estis la ministro pri ekonomio kaj financoj de la reĝo Herodo. ‘La edzino de tiu ministro forlasis la edzon por sin kunigi al tiu grupo da prostituitinoj, pekuloj, al Mesio duonfreneza!’ Imagu skandalon kiun portis Jesuo per sia mesaĝo.

Jen ni finas tiun unuan parton kaj poste daŭru konsiderante la alian novaĵon semitan de Jesuo. Tio kion Jesuo estas montranta estas: **Dio Amo, Dio kiu deziras komunikiĝi**, kiu rompas la skemojn de religio. Kutimiĝis, la religianoj, taksu laŭ la moralecaj kategorioj de peko kaj ne peko... Jesuo rompas ĉion tion, **li vidas nur personojn bezonajn je amo**. Kaj kio por la okuloj de la religio povas esti konsiderata sakrilegio, ĉe la okuloj de Jesuo estas nur kredago. Ni vidos la epizodon de la virino suferanta je sangoflugo, la virino kiu vivas en malpureco, kiu, se apenaŭ ŝi trovu la kuraĝon transgresi la leĝon kaj alproksimiĝi al la Sinjoro, tiu ĉi ne ŝin forigas, sed diras: “Fine vi venis, mia filino”. Kiom da personoj vivis separataj el Dio kaj ne havis kuraĝon alproksimiĝi al la Sinjoro ĉar oipniantaj ke tio estas peko, ke estas sakrilegio; ĵus apenaŭ ili kuraĝas rompi tiun malpermeson, transpasi tiun tabuon, ne nur ili ne trafas la rifuzon de Dio, sed Dion kiu diras. “Fine vi venis, filino mia; kiomlonge vi malfruis; kuraĝon, via fido vin savis, Iru en paco”.

## TRIA PRELEGO

Malmulte da aludoj pri la agado kaj instruoj de Jesuo.

Oni komprenas ke lia aktivado ruiniga por la religia institucio kiu tuj kuras al sindefendo provante kunteni lian iniciatemon kaj super ĉio bremsi hemoragion kaŭzitan inter la popolo, ĉar la amaso sentas, ke en Jesuo estas tia novaĵo, tiu vero kiu venas el Dio. Kaj tial la aŭtoritatuloj ĉiuaranĝe provos bari kaj, kiam ili konstatos, ke tio ne eblas, decidus lin elimini. Ke Jesuo estis mortigita ne povas surprizi; kio surprizas estas kiel li sukcesis vivi tiomlonge, ĉar tiaspecaj homoj devas esti senmalfrue eliminataj. Kaj ni nun vidos, en la proksima epizodo, la reagon de la farisearo, de la religia institucio kontraŭ Jesuo kaj, en iu parabolo, nome en tiu de la Samariano - Lk

10,25 - ni vidos ke Jesuo modifas du konceptojn kiuj estas la fundamentoj de la religio: tiu pri kredanto kaj tiu pri proksimularo. Por kompreni la agaron kaj la instruajon de Jesuo ni devas ilin enŝovi en la kontekston en kiu aktivadis Jesuo.

Jesuo iam sendis la dekdu anonci la Regnon kaj estis kompleta fiasko. Kial? La dekdu estas animataj je ambicio, je antaŭjuĝo, kaj ne estante liberaj ili ne sukcesas liberigi el demonposedo. Tial, la sendo de la dekdu - la dekdu signifas la devenantojn el Israelo - estis kompleta fiasko. Jesuo ne ekaltas kaj tiun fojon sendas - skribas la evangeliisto - sendas aliajn sepdekdu. Se la dekdu estas la nombro kiu reprezentas Israelon, faritan el dekdu triboj, la nombro 72 reprezentas la tutan homaron. En la Genezo, ĉapitro 10a, la nacioj de la tero estis reprezentitaj per la nombro 72. Kaj do Jesuo, sendante 72 disĉiplojn, volas signifi, ke ili ne originas el Israelo, sed el aliaj realoj. Nu, senkatenitaj el la ideo de supereco super la aliaj popoloj, liberigitaj el tiu ambicio, ili sukcesas laŭ lia intenco. Ili revenas al Jesuo ĝojoplenaj dirantaj: “Sinjoro, eĉ la demonoj sin submetis al ni en via nomo”. Sub la voĉo ‘demonoj’ senciĝas ĉio kio malhelpis. ke la homoj estus liberaj, La mesaĝo de Jesuo havas tioman potencon, ke se ĝin homo akceptas al li ĝi rompas la katenojn kiuj lin enprizonigas kaj al li liveras plenan liberon. Nu, tiurilate Jesuo esklamas, kaj tio gravas: “Mi vidis Satanon fali el la ĉielo kiel fulmo”. Atentu eskplkon pri tiu imago, pri tiuj terminoj. Ni kristanoj iom komplikis la aferojn, iom malbonigis tiun Satanon.

Kiu estis Satano? Satano konceptiĝis kiel funkciulo de la dia korto, estis generala inspektoro kiu plenumis taskon: li ĉielstaris ĉe ĉiela kortego, li malsupreniris al la tero, rigardadis la konduton de personoj kaj kiam li konstatis plenumanton de kulpo supreniradis al Dio dirante: “Tiu ulo plenumis kulpon. Ĉu lin mi povas puni? Ĉu mi povas lin elimini?”. Do li generale inspektoris taskite de Dio. Tion vi trovas priskribita tre konige en la libro de Jobo kie Dio ricevas sian kortegon kaj prezentiĝas ankaŭ Satano, la Satano kiu inspektore trakuras la tutan teron. Nu, kun Jesuo la povra Satano iras en “salajrohela kaso”. Kial? Satano supreniras al Dio por akuzi por ilin po-vi puni, sed Jesuo prezentis Dion Amon en kiu nek estas rekompenco, nek puno. Nek premio, nek malpremio. Al ĉiuj li liveras amon. Tiam la povra Satano ne scias kion plu fari: senutilas, ke li iru raporti al Dio “vidu, tiu ulo plenumis kulpon” ĉar tio al Dio ne interesas. Dio daŭrigas tiun pekulon ami. Tiam Satano prenas “baton ĉe la postaĵo” kaj malsupreniras sur la teron. Estas la finiĝo de la diabla domino: “Nun plenumiĝis la savo, la forto kaj la regno de nia Dio kaj la potenco de Lia Kristo. Tiom veras ke en la Apokalipso oni legas la saman esprimon.: “Nun plenumiĝis la savo, la forto kaj la regno de nia Dio kaj la potenco de Lia Kristo ĉar estis faligita la akuzanton de siaj fratoj”. Satano estis la publika leĝakuzanto, sed estante Dio ne plu juĝisto, sed Dio de amo, ĉio tio finiĝas. Tiam Jesuo sciinte tion kaj vidinte unufojon, ke ero da homoj sukcesis efike anonci la bonsciigon, eksplodas en ĝojo-esprimon. Estas la unua kaj la sola fojo kie estas parolate pri ĝojo en Jesuo. en la evangelio. Kaj benas al la Sinjoro ĉar li diras. “Vi kaŝis tiaĵojn al la saĝuloj kaj scienculoj - li estas parolanta pri la reprezentantoj de la religia institucio kiu tiam, ni vidos, ankoraŭ regis - kaj tiaĵojn vi revelaciis al la etuloj”. Tio estas netolerebla!.

Tiam ĉe la ĉapitro 10a v. 25°: “Kaj jen leĝdoktoro (leĝdoktoroj estis la spertuloj pri la leĝo, per dia investo, aŭ sininvesto, similis skribistojn, estis la solaj ŝargitaj interpreti la dian leĝon), leviĝis (Luko estas terura... mi opinias ke Luko anstataŭ trempi la plumon en inkon tiun trempis en la vetriolo!) por lin tenti” (Tiu verbo en lia evangelio troviĝas nur du fojojn, rilate la agon de la diablo kaj rilate la agon de tiu doktoro). La reprezentantoj de religiaj oficiale instruantoj, nome kiuj devis komuniki al la popolo la dian volon, laŭ Luko reale ili estas aranĝilo de la diablo. Kaj al li pripetas. “Majstro kion mi faru por gajni la eternan vivon?”. Jesuo neniam parolas siainiciate pri la eterna vivo, ĉar tio al li ne interesas. Jesuo venis ne por indiki la plej sekuran vojon por atingi la eternan vivon. Jesuo venis por ŝanĝi la vivon de ĉi tie. La solaj interesitaj pri la eterna vivo estas la riĉuloj kaj piuloj, la personoj kiuj tiom bone ĝuas ĉi tie ke ili provas sekurigi la samon ankaŭ en la alia vivo. Jesuo ne parolas pri la eterna vivo: al Jesuo interesas, ke oni povu vivi bone ĉi tie.<sup>5</sup>

Jesuo respondas: “En la leĝo kio estas skribite?” Tiu estas leĝdoktoro, Jesuo al li demandas. “Ĉu vi ne legis la leĝon?”, kaj per tiu demando li lin traktas kiel nescianton. “Kion vi komprenas?” Ĉar ne sufiĉas legi la leĝon, necesas ĝin kompreni. Tio estas indiko tre grava kiun ni devas konsideri tre atente: se ne estas en homoj kiel antaŭa kondiĉo amo al homoj, al la homaro, la leĝo, la Parolo de Dio restas nekomprenata”. Tial por kompreni la dian vorton necesas sinteno de simpatio, sinteno de granda amo al la homoj. Tiu doktoro estas kutimiĝinta domini kaj ne komprenas. Fakte Jesuo diras: “Kion vi komprenas?” Kaj li respondas. “Vi amu la Sinjoron Dio per la tuta via koro, per la tuta via vivo, per la tuta via forto - estas kaptaĵo el la Readmono, la kredo de Israelo, al kiu li aldonas pasaĵo de l’ Levidoj - kaj la proksimularon kiel vin mem”.

Laŭ tiu doktoro por akiri la eternan vivon helpas amo al Dio senrezerva kaj amo al la proksimularo kondiĉita kaj limigita. Amo al Dio, **per tuta sia memo**, al la proksimularo **kiel al sia memo**. Estas pene vidi, ke tiu respondo de la leĝdoktoro estas identa al tiu de multaj kristanoj kiam al ili estas enketataj pri tio: kiel Jesuo nin instruis kaj devigis ami. Tio adresindas al la hebrea popolo, ne al la kristana popolo. La hebrea spiritualeco atingis sian kulminon tra la jena formulado: senkondiĉe ami Dio, kondiĉe ami la proksimularon. Mi amas vin kiel mi amas min mem, kaj ĉar mia amo estas limigita, mia amo al la proksimularo estas limigita. Atentu pri la vorton “proksimularo”: per “proksimularo” en la hebrea mondo oni intencis la apartenantaron de la familia klano, la apartenanton de la tribo aŭ de la israela popolo, nenion pli. Kiam Jesuo parolos pri amo en sia komunumo li ne referencos al tio, sed diros: “Mi al vi lasas ordonon novan”, kvalite novan, kiu anstataŭas ĉiujn aliajn: “Amu inter vi kiel mi vin amas”. La modelo de tiu amo ne plu estas “ami vian proksimularon kiel vin mem”, sed ĝin ami kiel **mi** amas vin, nome laŭmezura senmezura, senlima, plenforta. Ĉiukaze Jesuo akceptas kiel adekvata la doktora respondo kaj rebatas: “La respondo

---

<sup>5</sup> (NdT) Tamen la “eterna vivo” estas foje aludata same kiel kiam Jesuo promesas al la apostoloj ke Li estos ĉiam kun ili.

estas ortodoksa. Faru tion kaj vi vivos” (do ne “havos la eternan vivon”). Al Jesuo - mi tion ripetas - ne interesas la transan vivon, al li interesas la tiean.

La areo de la proksimularo estis malvasta kiel montras tiama debato: ĝis kia limo etendiĝas la koncepto de proksimularo? Kaj reale **kiu** estas mia proksimulo? Ĉu la samfamiliano, ĉu la samtribano, ĉu la samreligiano? Iuj rabenoj respondis, ke proksimulo estas ankaŭ fremdulo loĝanta ene de Israellando. Estis vera debato. Tiu leĝdoktoro favoras al la malvasta koncepto. ‘Kiu estas mia proksomulo?’ Nu, per tiu malmultvorta parabolo Jesuo indikas novan manieron por indiki kiu estas la kredanto kaj novan koncepton pri proksimulo. Jesuo, eble, referecante al epizodo por kroniko, diras, ke homo malsupreniris el Jerussalemo al Jeriko (Jerussalemo altis, sur marnive-lo, 800 metrojn, Jeriko 250 sub la marnivelo, do estas granda niveldiferenco ene de malmultaj kilometroj, en strato kiun ankaŭ hodiaŭ oni povas trapasi, strato tiam horo-ra), trafis rabistojn kiuj lin senvestigis kaj batis kaj poste foriris lin lasante duonmortintan. Tiu zono, inter Jerusalemo kaj Jeriko, trakureblas penegre ankaŭ por bonfartulo pro manko de spirebla aero (mi ripetas: pli ol 1000 metrojn de niveldiferenco) kun sufoksenso, kaj tiu vundito estas destinata al morto. Providence “sacerdoto malsupreniris laŭ la sama vojo - la aŭkultantoj diras: ‘li estas bonŝanca, estas lia savo, se lin oni vidas...’ - sed la pasanto sin turnis al alia parto”. La surprizo estas sangofrostiga! La sacerdoto malsupreniras; Jerusalemo estis sacerdota urbo, la sacerdotoj iris al Jerusalemo por servi en la templo. Tiu estas sacerdoto, kiu laŭ unu semajno rite servis en la templo, do li estas en la stato de leĝa pureco: malsupreniras, vidas la malbonŝanculon, sed pasas al la alia stratflanko. En la greka teksto, tio kion ni tradukas al “pasis al alia stratflanko” estas esprimita per unu sola vorto: mi tion difinas la tomboŝtono de la religio.

Kial la sacerdoto pasis al alia flanko de la strato? Ĉar la dia leĝo “Amu la proksimularon per la tuta via animo kaj ĉiuj fortoj”, estas pli grava ol la amo al la alia. Estas la leĝo kiu priskribas, ke sacerdoto kiu estas en stato de pureco povas alproksimiĝi nek al kadavro nek al persono vunditaj por ne altiri sur sin malpurigon. Laŭ tuta semajnon tiu ĝenito faris diservajn ritojn, purigajn, li estas tute pura, kaj nun li riskas taŭzi sian decon! Tiam la dilemo antaŭ Jesuo estas: inter la leĝo de Dio kaj la bono de la homo, kiu el la du pli valoras? La leĝdoktoro ne havas dubojn, li jam elektis; tutkora amo al Dio, tiu al proksimulo estas relativa. Do, tiu sacerdoto kiu pasas al la alia stratflanko ne estas persono kruela, li ne estas sensentema, estas persono religia! Tiuj personoj estas la plej danĝeraj se renkontataj dum malfacilaj situacioj. Tiuj personoj tute orientitaj al Dio estas pereigaj. Ĉu al vi neniam okazis troviĝi en malfacila situacio kaj bezona je helpo, kaj renkonti tiajn piulojn? “Mi diros Avemarian por vi”: kaj vi restas en la merdo kiel antaŭe. “Mi vin memorigos en miaj preĝoj”. ‘Dankon, dankon, tion mi kapablis fari mem’. Sed ili ne movas fingron por vin levi el tiu situacio. Ili estas tiom okupitaj en tia rilato kun Dio, en ilia kontemplado pri

Dio ke por la alia ili ne havas elspezindan tempon. Antaŭe venas Dio, kiu absorbas la tutan lian ekzistadon<sup>6</sup>.

Tia, do, religia persono reprezentas la leĝobeanton. La leĝo kreas personojn nekapablajn ami, tiom absorbitaj en la tasko luli Dion, ke ili ne plu sukcesas ami la aliajn. Kaj vidu, ke ne nur la literaturo, kaj vi vidas ke la personoj intense religiaj ĉiam estas bildigitaj kruelaj, senindulgaj<sup>7</sup>. Kial tio eblas? Ĉar ili estas tiom abstratigitaj el Dio, ke ili trovas nek tempon nek volon por sin dediĉi al la aliaj. Jarojn antaŭe - mi raportas memoraĵon - dum kurso pri spiritaĵoj iu fratino kiu ĉion komprenis: "Patro Alberto tio tiom veras, ke mi tiom ĝojas kunstari ĉe la Sinjoro, ke mi ne eltenas resti kun la kunfratinoj".

"Simile ankaŭ levido" - La levidoj, en reduktita maniero, se tiel diri, estis la sakristianoj de la templo: ili ne estis sacerdotoj, sed ili taskiĝis pri ĉiuj liturgiaj ritoj kaj ankaŭ ili devis traagi en kondiĉoj de pureco - "apudiĝinte al tiu loko lin vidis (nun la vundito ekesperas, temas pri homo de Dio!) kaj pasis al la alia stratflanko". La denunco de la evangeliisto estas horore aluda: la rabistoj vundis la malbonŝanculon, la religiaj personuloj lin mortigas! Pli pereigaj estas la religiaj personoj ol la rabistoj. Kiam al la komforto de homo estas preferita la respekto de la leĝo - eĉ se pri leĝo dia - tiu ĉi fariĝas senutila kaj nocia. Tial la dilemo kiun Jesuo estas prezentanta al leĝdoktoro estas: kio estas pli grava, la honoro al Dio aŭ la honoro al la homo? Kio pli urĝas, la leĝo de Dio aŭ la bonfarado al homo?

Por tiu ĝemanta homo jam ne estas espero, li perdis du okazaĵojn kiuj povis lin levi el sia situacio, nun li devas atendi la morton. Sed la morto ŝajnas plirapdigita de la vortoj de Jesuo. Fakte skribas la evangeliisto. "Iu samariano, male, vojaĝante tratiuloken, alproksimiĝis al li". Ni nin metu en la pensmaniero de la aŭskultantoj de Jesuo. Inter samarianoj kaj hebreoj brilis mortiga malamo, antikva malamikeco. Kiam eblis senpiece buĉi reciproke, ĉiam je la nomo de Dio (neniam oni tiom buĉas kiom buĉas la ŝirmitoj sub la nomo de Dio). Ĉiu okazaĵo estas taŭga; pro tio, se samariano trafas judon duonmortan, kion li faru? Al li rezervu la finan baton! Por la malbonŝanculo estas la fino. La samarianoj estis konsideritaj herezaj, malpuraj. Imagu, se judo insultis alian personon per la vorto "samariano", tio estis taksata krimo tiom grava, ke la puno estis 39 batoj. Do, samariano estas persono kiu hororigas la aŭskultantojn. Nur ekzemplo: imagu ke mi ekzemplas tiel: okazas ke infano falis el biciklo, vunde kuŝas tere, kaj proksime de li pasas pedofilo albana... Jen io por pentrigi la situacion, ĉar hodiaŭ la albanoj estas la emblemo de la krimuleco; pedofila kaj albana: povra infano, estas la fino. Tiu estis la imago kiun Jesuo elvokis. Samariano alvenas: li mortigas, lin buĉe batas. Kaj jen la skandalega novaĵo portita de Jesuo: "kaj lin vidinte". Jam lin vidis la sacerdoto, jam lin vidis la levido, homoj de Dio: ili forpasis al alia stratflanko. "Kaj lin vidinte"...nun Jesuo ŝajnas sakri ĉar li estas uzanta la esprimon "li provis kompaton". Tiu esprimo estas teknika verbo en la Malnova Testamento

---

<sup>6</sup> (Ndt) Tamen ĉio tio ne forgesu ke Jesuo, la modelo pro kristano, pasis nokton en preĝado kaj ĝuste li igas simpatia la homon, kies digno estas konata el la revelacio..

<sup>7</sup> (Ndt). Ĉu necesas distingi piecon el pieco?... ĉar eĉ la socialaj sanktuloj estis piaj.

ekskluzive rezervita al Dio. Kompati estas ago dia per kiu Dio komunikas vivon al kiu ĝin ne havas. En la evangelio de Luko ĝi aperas tri fojojn. Kiam Jesuo revenigas al vivo la filon de la vidvino de Naino kaj en la parabolo de la filo perdiĝinta: temas ĉiam pri dia ago. Nu, homo ignorita de la religio, la samariano, iugata malpura, hereza, demonposedata, plenumas la saman agon de Dio. Tion ne faris la sacerdoto, ne faris la levido, sed tion faras la persono malpli tia imagebla.

Tiam Jesuo estas ŝanĝanta la koncepton de kredanto. Ni jam vidis ke, laŭ la religio, kredanto estis kiu obeas al Dio praktikante ties leĝojn; **por Jesuo kredanto estas kiu similas la Patron praktikante amon samkiel la Patro mem.** La samariano plenumas la saman agon de Dio. Li ne vizitas la templon ĉar li ĝin ne povas eniri, li ne estas religia persono, estas persono malpura, tamen li estas la sola persono kiu kondukas imitante Dion. Kiu amas, kiu metas sian vivon je servo de aliuloj plenumas la saman agon de Dio, se poste tiu partoprenas en la kulto, en la templo, pri tio Jesuo indifereblas: do Jesuo uzas por tiu samariano la saman verbon de la dia ago, kaj faras la kontraŭon de tio kion faris la rabistoj kaj la sacerdotoj: al li alproksimiĝas dum la sacerdoto kaj la levido preterpasis tra la alia straflanko; la rabistoj lin senvestigis, li male vindas liajn vundojn, sur ilin verŝas vinon kaj oleon kaj, lin ŝarĝinte sur sian rajdobeston, lin portas al la gastejo kaj zorgas pri li.

Trakureblas ankoraŭ la strato por iri el Jerusalemo al Jeriko, strato kiu jam en normalaj kondiĉoj penigas, Tiu samariano havis rajdobeston por vojaĝi, sed, sur la rajdobeston metas tiun nekonaton: malamiko nekonata! kaj lin kondukas; nome, li preta sian rajdobeston kaj mem preferas alfronti malfacilaĵojn por ilin evitigi al la vundito same kiel la servistoj rilate al sia Sinjoro. **Tia estas la ago de Dio kun la homoj; estas Dio kiu sin faras servisto por ke kiuj estas konsiderataj servistoj tiuj sin konsideru sinjoroj.** Kaj la morgaŭan tagon, elpoŝiginte la denarojn, ilin donas al la gastejestro kaj diras: “zorgu pri li, kaj kion vi plue elspezos por li, tion mi kompensas ĉe mia reveno”.

Fininte la parabolon, Jesuo demandas la leĝdoktoron: “Kiu, el tiuj tri, ŝajnas al vi...?” kaj ĉi tie Jesuo modifas la demandon. Ĉu vi memoras la inican demandon de leĝdoktoro. “Kiu estas mia proksimularo?”, nome, ĝis kien mi devas ami? La klanon, la tribon, israelon? Jesuo ne indikas kiu estas la proksimulo, sed renversas la demandon: “kiu al vi ŝajnas esti la proksimulo de tiu kiu trafis rabistojn? La leĝdoktoro celis scii ĝis kia punkto devas iri sian amon, Jesuo al li diras: el kiu punkto starti? Proksimularo estis tiam koncepto limigita al klano, al tribo, al israelidoj, kaj Jesuo kiu estas portanto de universala amo diras, ke la proksimulo ne estas la ago de iu kiu sin direktas al iu bezonanta, sed la ago kiu eliras el Dio, amo kiu komenciĝas el Dio en la direkton de ĉiuj homoj. Do la proksimulo ne estas objekto amenda por obteni la dian rekompencan, sed kiu amas kiel Dio amas. **Do ne estas, proksimulo, la persono bezona je amo, sed mi kiu min faras proksimulo al ĉiuj personoj de mi renkontitaj.**

Tiam Jesuo demandas: “Kiu el tiuj tri laŭ vi estis la proksimulo de tiu kiu trafis rabistojn?” Kaj la respondo facilus: videblas sacerdoto, levido kaj samariano. Por esprimi la hororon de la Jesua propono sufiĉas analizi la respondon de la leĝdoktoro. Li devintus respondi: LA SAMARIANO. Neniam tio okazu, imagi tian respondon signi-

fas agigi la legdoktoron kontraŭ sia pensmaniero kaj florigi el liaj lipoj sakrilegian vorton. “Tiu” pri kiu krome Jesuo estis dirinta: ”**kompatis**”. Sed la leĝdoktoro ne kapablas rekoni ke iu ajn homo, des pli se temas pri samariano, plenumas la saman agon de Dio, kaj anstataŭ diri: ‘Tiu kiu kompatis’, li uzas ‘**havis mizerikordon**’; se kompatis estis ago ekanta el Dio, nome dia ago, havi mizerikordon estas kio koncernas la homojn; la leĝdoktoro ne eltenas, ne akceptas ke homo tia povas agi imitante Dion. Male la mesaĝo de Jesuo estas, ke, dum la religio kreis fosaĵon inter Dio kaj la homaron, fosaĵo plena je sentoj de malindeco, de kulpo, de peko, Jesuo venis ĝuste por tion elimini kaj diras, ke la homoj kapablas plenumi agojn diajn. La homoj kapablas ami kiel Dio amas. En aliaj evangelioj, en tiu Matea, Jesuo diras: ”Estu perfektaj” ne kiel Dio sed (jen la nova bildo de la dia perfekteco) “estu perfektaj kiel la Patro via estas perfekta”. Kaj kiu estas la perfekteco de la Patro? La Patro estas kiel la suno kiu brilas sur la bonaj kaj la malbonaj, simila al la pluvo kiu malsupreniras sur la maldankulojn kaj justulojn. La suno kaj pluvo ne distingas la unujn de la aliaj, sed etendiĝas sur ĉiujn. Tiam Jesuo en tiu evangeliero estas diranta, ke homo ne estas fora el Dio, sed en homo kuŝas la kapablo fariĝi Dio, ami kiel Dio amas. Tia estas la Jesua Dio. Anticipas kion en la evangelio de Johano esprimiĝas per la formulo: “Al tiuj kiuj lin akceptis li donis la rajton fariĝi filoj de Dio”. Tia estas la evangelio de Jesuo; do, ne la Dio de la religio, nek la ofendiĝinta Dio de la religio, sed iu Dio tiom enamiĝinta al la homoj, ke al ili volas donaci sian saman kapablon ami. Tia estas la ago de Jesuo, bapti en la Sankta Spirito, por igi la homojn similajn al li; homo estas alvokata al kreskiĝo, al progresiva maturiĝo, kaj kiam li kapabliĝas doni sian ekziston al la aliaj, tiam li atingas la dian kondiĉon.

Dio kaj la homo fariĝas unuecaĵo. Tio alarmigas la religiajn aŭtoritatulojn. Ili estis konstruintaj senmankan religian strukturon en kiu la homo ne povis sin adresi al Dio, sed devis pasi tra la sacerdoteca zorgo en rigide ĝustaj tagoj, en fiksita loko, en la templo; ili estis sukcesintaj lin konvinki, ke mem estas ĉiam en kulpo. Kial tiu insisto de la sacerdotoj rilate la pekon de la homoj? Ĉar ili meritas la denuncon de la profetoj: Dio adresiĝas kontraŭ la sacerdotoj dirante. “Vi ĉiam havas sur la buŝo la termino ‘peko’, vi ĉiam kondamnas la pekojn, sed vi vivas per la peko de homoj kaj en via koro vi deziras ke homoj peku pli intense”. Ĉar tiuepoke la pardono pri la kulpoj ne akireblis per eta sumo de tri patronia, avemaria kaj gloro, sed necesis tri kapoj, tri kokinoj kaj anseroj. La sacerdotoj manipulis la leĝon de Dio tiamaniere, ke la homoj, eĉ se aliĝintaj, sin sentu ĉiam en kulpo kaj bezono oferi al Dio, nome al la... ventro de la sacerdotoj, ofertojn. Se hazarde, malbonŝance, homoj ne plu pekus - tio ne eblas - aŭ venas iu por diri, ke tio ne plu bezonatas, okazas frakaso; por certigi kreskiĝon de tiuj oferaĵ ofertoj, la sacerdotaro igis ĉiam pli malfacila kaj neatingebla la obeo al la leĝo. Jen do la krimo de la religia aŭtoritato: ĝi misformis la dian vizaĝon pro siaj avantaĝoj. Dio per la profeto Jeremio diras al la skribistoj. “La leĝo estas la leĝo”. Sed kiu leĝo? “Tiu mensoga kreita de viaj ruzaĵoj”. La religiaj aŭtoritatuloj transformis, pro sia soifo de domino kaj prestiĝo sur homoj, la dian leĝon al pezo neeltenebla. Kaj tiam alvenas Jesuo diranta: ‘forlasu tiun jugon de la leĝo, kaj prenu la mian kiu estas leĝera kaj dolĉa kaj ĝi fariĝos via spiro’.

La rilato kun Dio, per Jesuo ne plu baziĝas sur obeo al leĝo, sed sur akcepto de lia amo; jen kial Jesuo proponis novan interligon. En la malnova interligo Moseo, servisto de Dio, proponis ligon inter servistoj kaj ties Sinjoro; Jesuo, la Difilo, proponas ligon inter gefiloj kaj ties Patro. Dum servisto ne havas rilaton kun sia sinjoro, la filo amikece rilatas kun sia patro; dum servisto vivas forhejme de sia sinjoro, la filo vivas en la hejmo de la patro: estas tertremo! La pileroj subtenantaj la religian institucion - sacerdotaro, leĝo, templo, kulto - unu post la alia falas, ĉar kun la Dio de Jesuo neniu el tiaĵoj estas bezonata. La rilato kun la homoj, kun la Patro estas senpera, plena, kompleta; kiu ajn situacio intermetiĝinta estas diafragmo, estas obstaklo al la plena komunikado inter Dio kaj la homoj. Tiapunkte, Jesuon, oni bezonas mortigi. Fakte eliras la mortosentenco.

Tiam, ĉi-matene ni jam faris rajdadon tra la evangelio de Luko; ĉi-tagmeze ni iros vidi la novaĵaron en la evangelio de Marko kaj morgaŭmatene ni revenos al la evangelio de Luko, analizante unu el la plej amata kaj eble malpli komprenata parabolo: tiu la perdiĝinta filo. Tiukoncerne jan alvenis al mi demando: laŭ tiu via religivizio kie situigi pekconfeson kaj preĝon? Mi ne respondas ĉar morgaŭ matene, per la parabolo de la perdiĝinta filo, klariĝos la respondo al tiu demando. Ekde trideko da jaroj mi faras tiun servo de la vorto en tuta Italio kaj ĉie leviĝas tiu demando: **sed la konfeso?** Ĉu eblas ke tiun, kiun oni difinas sakramento kaj sakramento signifas infuzon de la dia graco, ni transformis al la sakramento plej malŝatata ĉe la kristanoj? Kian krimon ni pastroj plenumis per la aliformigo de gesto komunikanta la dian vivon al la homoj al situacio kiun oni provas eviti? Mi certe tion provis; dum infanaĝo - ĉu vi ne memoras? - oni elektadis la konfesprenanton iom maljunan kaj bonŝance iom surda ĉar tiel plejbone funkcias. Sed kial eblas ke oni malproksimiĝas el la ricevado de tiu sakramento foje pli ruinigite? Foje alproksimigi certajn konfesprenantojn similas iri pro ginekologia vizito ĉe seksmaniulo: oni eliras komplete ruinigite. Kiel kreiĝis tio? Kiel eblas ke sakramento, tiu kiu komunikas al la homoj la dian vivon kaj pro tio devus saltigi pro ĝojo kaj gajo, tiel finiĝis? Jen, morgaŭ matene, en la aludata parabolo, ĉio tio emerĝos.

Tiam, jen rilate kion jam eksponitan hieraŭ vespere, jen rilate kion diritan ĉi matene, vi povas antaŭdiri demandojn.

## KVARA PRELEGO

### Kritikaj Intervenoj de la aŭskultantaro

Bonan tagon... por rompi la froston.

Mi devas konfesi ke mi estas sufiĉe perpleksa pro tio kion oni trakomentis, mi tenas multajn demandojn kiuj mi eble devas metaboli antaŭ respondi. Jen unuaj hazarde aŭditaj kaj taŭze kunigitaj objetoj kaj komentoj.

La unua konsidero prezentita al mia menso, krom la sakramento de la repacigo, estas ke, se el la konklavo elirus lia (oni aludas al mi!) nomo kiel papo, la unua tasko

estus la forstreko de la kontemplaj ordenoj, eble, mi ne scias...Kaj kion nivele de Dio juĝisto kiu de ĉiam karakterizas kurantan konceptadon pri Dio...? Ni pasis el dekoj da "timor Dei". "dies irae" kaj plue, al hodiaŭ... Hodiaŭ (pensas alia) ni havas Dion nure tute bonan, morgaŭ mi esperas ke ni havu Dion vage erotikan, ĉar el la biblio fontas ankaŭ gravaj aspektoj ĉirilate, kiuj konstante estas kastritaj, forgesigitaj, forstrekitaj kaj la sankta familio de Maria ĉiam virga... sume ĉio komplikiĝas...! Sed ne estis televido kaj la kino kaj mi enketas ĉe mi kion oni faris vespere: kaj estis eĉ ne la rozario kaj, do, gravas tiuj demandoj. Ankaŭ en la Nova Testamento, ne nur en la Malnova kie estis Jobo, la diluvo, la fuĝo el Egiptujo... Entute pentriĝas iu Dio kruela...En la Nova Testamento Dio aperas tre malmulte. Dio Patro diras nur: "Aŭskultu mian filon"; nervoziĝas post la morto sur la kruco, igas fine sentitaj siajn prezenton kaj malkontenton, sed kio senkompare min skuas estas la preĝo en Getsemano, kie Dio restas muta (ĉiukaze oni lin ne aŭdas) kaj Jesuo diras: "Forigu el mi tiun kalikon, tamen fariĝu via volo, ne la mia": do tio, rilate al la hieraŭa prelego, en kiu ĉiukaze la centro estas la homo kaj la valoro de la ofero kaj de la sufero spertita eĉ en pozitiva maniero kaj ne celo de si mem, tio klaras. Tamen por ni katolikoj ĉiam konstituiĝis grava afero, ke pro tia nova koncepto el la krederoj oni devas forstreki, aŭ ĉiukaze peze revizii... Ni volus kompreni pli konvinkige tiujn aspektojn.

### **Klarigaj respondoj de MAGGI**

Jes kiu estas via nomo?

"Petropaŭlo".

Petropaŭlo, vi bezonas pli da klarigoj pri la Dio nejuĝisto kaj pri la dia volo.

Tiam almenaŭ du elementojn ni eltiras kaj tuj ilin ni pliklare eksplikas, tiu pri Dio juĝisto, nome pri la dia justeco, kaj tiu pri la volo de Dio, pri kiu - kiel aludis Petropaŭlo - Jesuo en Getsemano petis ke ĝi estu farita, sed, se eblas, iom malfruigita.

a) Ni diris, ke ni havas problemon en la tradukado de la hebrea biblio al la latina biblio kaj poste al tiu itala: problemo de tradukado estas la koncepto pri la dia justeco, ĉar la termino "justeco" de la hebrea lingvo, estis tradukita per la termino "giustizia" en la itala. Sed por ni en okcidento la termino "giustizia" referencas al tiu 'salajra' kaj 'kompensa' (retributiva), al tiu, por krei kompreniĝon, de la tribunalaj, sed la senco de justo, de justeco en la Malnova Testamento ne identas kun tiu nia.

Kiam oni parolas pri Dio menciante, ke Li estas justa kaj traktas laŭ justeco, ĉi tie justeco signifas: "Fideleco". Kiu estas la justulo? Estas kiu estas fidela al Dio. Se Dio estas justa signifas ke Dio estas fidela. Fidela al kiu? Ne al si mem.

Dio estas "justa" kaj ties justeco koncernas la fidelecon al la homoj kun kiuj li faris interligon, tial la signifo de la dia justeco estas plene pozitiva. La sanktaj aŭtoroj volas diri: "ankaŭ se vi perfidus tiun Dion, lin sakrus, lin rifuzus, Li restos ĉiam fidela": tio estas la dia justeco. Sed ni, en okcidento, al Li atribuis la justecon de la roma pena juro: la premio kaj la puno, sed en la biblio la ideo pri Dio justa kaj justeco de Dio referencas ĉiam al Lia fideleco al la homoj. Sekve, en la evangelioj ne troviĝas la bildo de Dio juĝanta, ĉar ni aŭdis Jesuon mem: "Dio min sendis ne por juĝi, sed por savi la homojn".

El kie naskiĝas tiam tiu imago pri Dio juĝisto? Ĝi devenas el malkorekta legado de la 25a ĉapitro de la evangelio de Mateo, tiu kiu poste inspiris la pentristojn. Sufiĉas pensi al la universala juĝo de la Sistina Kapelo aŭ al similaj konceptaĵoj: pri iu Dio premianta la bonulojn kaj punanta la malbonulojn, sed tio ŝuldiĝas al malkorekta traduko de la greka teksto kaj al malĝusta interpreto de la termino kiun la evangeliisto Mateo uzis en tiu loko.

Kial Mateo, la sola evangeliisto, entenas tiun parabolon de la juĝo? Ĉu vi konas la parabolon de la juĝo? La homoj dividitaj kiel ŝafoj kaj kaproj kun la demando: “Ĉu mi soifis, mi malsatis ktp”? Mateo celas korekti ideon, laŭ kiu la hebreoj estis certaj ke pro sia posteuleco el Abrahamo mem trafos neniun juĝon.

La komenca kristana komunumo de Mateo, kiu originas el judismo, estis konvinkita, ke mem evitos ĉiun jan juĝon.

La hebreoj sin demandis: “Kian la sorton de paganoj?” En la Talmudo kuŝas paĝo el kiu Mateo sin inspiras: estas imagita Dio en trono kun la libro kaj marŝas antaŭ li la paganaj popoloj. Ĉu vi observis la leĝon? Venu, benato, en la dian regnon, Ĉu vi ne obeis la leĝon? Foriru el mi!”. Tiam Jesuo okazigas tiun parabolon, sed la signifo ne ŝanĝiĝas: **ne plu estas la oboe al la leĝo kiu dekretas la savon aŭ ne, sed la respondo al la elementaj bezonoj de la homoj**, tia estas la mezuro por ĉiuj “gentoj”. La greka termino uzita de la evangeliisto estas *etne*, el kiu devenas la vorto ‘etno, etnologio’ per kiu oni indikis la paganajn naciojn, tial ne temas pri unversata juĝo. Estas la komunumo kiu sin demandas: Ni pro la fakto, ke ni adheris al Jesuo, ni ne alfrontas iun ajn juĝon, sed por tiuj kiuj lin neniam konis, kiuj eĉ lin rifuzis, kia la juĝo?” Nu, la juĝo ne koncernas kion ili kredis aŭ ne, ĉu preĝis aŭ ne, sed la respondon al la elementaj bezonoj de la homoj: “Mi soifis kaj vi min sensoifigis, mi malsatis kaj vi min satis”.

Al tiuj kiuj tion faris, malgraŭ ke ili ne konis Dion, li diras. “Venu benataj de la Patro mia”: la ago de Dio estas pozitiva. Al tiuj kiuj tion ne faris li diras. “Forigu el mi, malbenataj”, ne de la Patro. Dio nur benas! Vi iru vidi tiun tekston, belegan! “Venu, benataj de la Patro mia”: la dia ago nur pozitiva povas esti, “Forigu for malbenataj”: ne ilin malbenis Dio. “Vi mem malbenis vin”

Se vi ne kapablis respondi al la elementaj bezonoj de la homo, vi ne havas en vi mem la vivon. Estas tiu kiun en la Nova Testamento estas difinita morto dua.

Anonciĝas morto - la unua morto - al kiu ĉiuj estas submetitaj: la fizika morto, ĝi alvenas certamamente de nia ekzisto, sed Jesuo nin garantias ke jen ni, kiuj lin akceptis kiel modelo de konduto, jen tiuj kiuj, kvankam lin ne havantaj kiel modelon, zorgis pri la ambezonoj de la aliaj, kultivis ene de si altkvalitan vivon, ne faras sper-ton pri tia morto. Daŭras ilia ekzisto: estu klare, mortas la grasaĵo, sed tio ne estas ni. Hodiaŭ en ni mortis milionoj da celuloj sen nia averto. Iun tagon mortos la tuta fizika parto, sed tio ne estas ni. La homo daŭrigas sian ekziston, sen alfronti iun ajn juĝon. Estas, male, la risko ke persono, kiu ĉiam rifuzis la vivproponon, kiu sin enfermigis en si mem, atrofizis la vivon kiu estis jam deponita en li; kiam alvenas la fizika morto troviĝas nenio, troviĝas nur energisenegita korpo. Temas pri totala nuligo de la individuo: la dua morto. Tio koncernas la dian juĝon. Do, la kredanto alfrontas neniun ju-

ĝon, sed pasis el la morto al la vivo. Kiuj ne konis la Sinjoron estos juĝataj sur la bazo de ilia servista amo al la aliaj.

b) Jesuo en la evangeliaj rakontoj ne estas prezentita kiel viktimo, kiu estas trenita al la buĉejo, sed kiel ĉampiono de la amo, kiu ardas vidi la horon montri, sur la kruco, kiom granda estas la amo de la Patro al la homaro.

Ni distingu la devotaĵojn, en kiuj ni projekciis niajn timojn kaj niajn bezonojn, el la evangelia instruo. La krucvojo, se vi volas ĝin praktiki, vi ĝin faru, sed ĝin ne konfuzu kun la evangelioj. Estas dum la krucvojo, ke Jesuo falas trifoje sub la peza kruco, sed laŭ evangelioj neniam, Jesuo falas neniam, Tamen ni, pro la tro malmulta scio pri evangelioj kaj la konfuzo enradikiĝinta en nia kapo, pri tio konvinkiĝas (pasinte dum kurso de spiritaĵ ekzercoj, pastro min kontentis dirante. “patro, trifoje ne, sed sendube almenaŭ unufojon li falis” kaj tiu ulo estas ankoraŭ serĉanta tiun falon de Jesuo, kiu ne volas troviĝi!). Estas ni kiuj proekcias en Kristo niajn bezonojn kaj ni lin faligas trifoje... Jesuo neniam falas, kaptas sian martirilon kaj ne venas prezentita kiel viktimo trenita al la ekzekutejo, sed kiel amo deziras la horon manifesti sur la kruco la potencon de la amo kiun li ricevis. Jesuo estas preezentita en la evangelioj tiel.

Tiam kiel eksplikis, ne en Johano, sed en Mateo kaj Marko kaj Luko, tiun petpreĝon de Jesuo: “Patro malproksimigu el mi tiun kalikon”? Ke li estos metita al morto, Jesuo tion scias ekde la komenco, ke de kiam li transgresas ĉiujn ordonojn al kiuj la homoj vidis lin malobei, inkluzive de tiu de la sabato, kiel ni vidos posttagmeze.

Jesuo ne estas martiro fanatika, ne alfrontas la morton kun fanatismo. Jesuo mortas ne pro la volo de Dio, sed pro utileco de supera sacerdoto. Jesuo restis fidela al la Patro kaj, pro tiu fideleco, alfrontas la mortigon. Tiam kial li diras. “Patro, fariĝu via volo”? Por Jesuo fari la volon de Dio ne estas frukto de strebo. En la evangelio de Johano Jesuo diras. “Por mi plenumi la volon de la Patro estas mia nutro”: temas pri tio kio lin tenas en la vivo. La volo de Jesuo estas identa al tiu de la Patro: montri al amon al la homaro. Sed Jesuo estas tristigita pro la ruinigo de Jerusalemo kaj de la popolo israela, kiuj rifuzis la Mesion liverantan pacon, kaj opinias: “blinduloj kaj frenezuloj”, ili elektis la mortiganton kiu liveras morton. Anstataŭ Jesuon, filon de la Patro, ili elektis Bar-abba(n), Bar-abbà(n): aramea esprimo - “bar” signifas filon, “Abbà” signifas patron -. Do elektis la perfortulon, la mortiganton, kaj jen la detruo.

Tiam Jesuo en la preĝo ploras, plendas pro la fino de ne malpaca kondiĉo de sia popolo. Li komplete fiaskis ĉe sia popolo. Diros Johano: “Li venis inter la siaj kaj la siaj lin ne akceptis”, kio ne estas riproĉa plendado kontraŭ la hebrea mondo, sed admono kiun la kristana komununo devas teni ĉiam antaŭ si, ĉar Dio sin manifestas ĉiam, sed en formoj ĉiam novaj, kaj persistas la risko, ke pro la korinklino al la Dio de la patroj oni persekutu, kiel faris Saŭlo, la Dion kiu sin prezentas en niaj vivmomentoj.

La hebreaj religianoj ne estas malbonaj uloj, ili estas religianoj: alligitaj al iu Dio enbalzamigita, ili ne perceptis la oskarnan Dion, kiu ili havis antaŭ si. Tiam Jesuo preĝas al la Patro por ke pasu tiu horo, ne rilate sian morton - sed la horo de la

detruigo de Jerusalemo. La morto de Jesuo kunportos la detruon de Jerusalemo ĉar ĝiaj loĝantoj rifuzis la Mesion liverantan pacon kaj elektis perfortulon.

Ni revenas el la Paska festo - mi ne scias kiel vi celebris la palmdimanĉon - ĉu vi neniam enketis: “Kiel eblis ke kiuj akceptis Jesuon per hosano al la filo de Davido... tiuj post kelkaj horoj krias: “Krucumu lin”?. Ĉu ili frezeziĝis? Kiel tio eblis? Ili hosanis al la erara persono! La hosano al la filo de Davido; **sed Jesuo ne estas “filo de Davido”**.”

“Filo”, en la hebrea mondo, signifas. “tiu kiu similas la patron” kaj Davido estis la granda perforta reĝo, murdisto, senindulganto, kiu, per perforto, estis altrudinta la regnon de Israelo. Estis tiutipa la Mesio atendata, Mesio, kiu per la violento, akiru la povon”. Kiam oni ekvidas ke Jesuo ne estas la “filo de Davido” sed la “filo de la Dio vivanta”, ne kiu rabas la vivon al la malamiko sed kiu pretas por ĝin oferi eĉ por ili, nu pri tiu Mesio ili plu ne scias kiel utiligi al si. “Lin kucumu!” oni krias kaj elektis Baraban!. Estas la fino. Ene de malmultaj jaroj venos la romianoj kaj pri Jerusalemo ne restos ŝtono sur ŝtono.

Ankoraŭ demandoj?

### **Demandoj de la aŭskultoj**

*Aŭskultanto:* Mi, krom vin danki, volus vin demandi pri la origino de la malbono en la homo, origino de la malbono kiel krueleco, malvarma aĉeco... mi ne scias kiel tion esprimi. De kie ĝi naskiĝas konsiderinte, ke en la johana prologo estas proklamate ke “ĉio estis farita pere de li”.

*Respondo de Maggi*

Memoru ke ni hieraŭ vespere encentrigis nian atenton sur la paganaj dioj...nu en la pagana mondo ĉio statas klare. Ekzistas kaj agas unu Dio bona, kiu kreas la vivon kaj alia Dio malbona kiu kreas malsanojn, ruinojn kaj la morton ktp.

Kiam tra hebraismo oni komencis purigi la vizaĝon de Dio, dekomence en Dio kunekzistis du aspektoj: Li estis bona, sed ankaŭ sufiĉe “maliceta”, do Li aktivadis por la bono sed ankaŭ por la malbono, ĉar ne eblis akcepti en hebraismo - kiu ne tute rapide avancadis al ideo de unusola Dio - la ideo pri alia dio, diaĵo negativa.

Nu, per la alveno de Jesuo ĉio tio malaperis. Dio estas amo kaj de li povas veni nur amo.

El Dio, la Patro de Jesuo Kristo, nenio negativa descendas. Sed tiam, se Dio estas ĉiopova, kial ni spertas la malbonon? Se li estas ĉiopova, li ne estas tutbona; kaj se estas tutbona, li ne estas ĉiopova. La infaneca solvo kiu ofte estis proponita tielas: “Dio ne volas la malbonon, ĝin Li nur permesas”. Krimulo subtila! Se mi patro diras al mio filo: “Ne trairu la straton ĉar alvenas aŭtomobiloj kaj vi povas finiĝi sub iliaj radoj”, kaj mia filo, malobeas, trairas la straton kaj mi vidas ke alvenas veturilo... Mi lin avertis, mi ne volas la suferon, sed mi ĝin permesas: pasas la aŭto kaj lin buĉpremas. Sed kia patro ne ĵetas sin, riskante finiĝi sub la veturilo, por savi la vivon de la filo? Por pravigi la malbonon en la mondo, oni fimiĝis por akriĝi ankoraŭ pli la bildon pri Dio... senkompata, malbona.

Tiu problema samis eĉ en la jesua epoko. Dum en la hebrea tradicio oni kredis, ke Dio estis kreinta la mondon perfekta kaj ke la sepan tagon Li ripozis (poste, damne! tiuj du kombinis la taŭzaĵon, ĉion ruinigis kaj jen tiam la malsanoj, la morto, kiu antaŭe ne estis, kaj ĉiuj malbonŝancoj). Jesuo malkonfirmis tian interpreton pri la libro Genezo, li ofertas alian respondon: **la rakonto pri la kreado ne estas la bedaŭro pri paradizo definitive perdita, sed la profetio pri paradizo konstruenda.**

La ordono de la sabato signifus, do, rekoni, ke Dio ripozas ĉar li aranĝis bela sian kreaĵaron: pro la kulpo de tiuj du “aĉuloj” ĉio ruiniĝis!

Kiam Jesuo ignoras la sabaton kaj la aŭtoritatuloj al li diras: “Kion vi faras?”, li respondas. “La Patro mia laboras kaj ankaŭ mi daŭrigas labori”. Simple: la kreado ankoraŭ ne estas finita, ne estas kompletata. La Patro pluas en la kreado kaj havas kiel planon tiun de la Genezo, nome: **plena harmonio inter viro kaj virino, plena harmonio inter homo kaj kreaĵaro. Sed tio estas profetio, nome projekto realigenda, ne la bedaŭro pro io nerepareble perdita.**

Tiam Jesuo diras: “La Patro mia laboras kaj ankaŭ mi laboras” kaj li nin asociigas al sia kreago. Troviĝas en Sankta Paŭlo, en la letero al la Romanoj, tiu ĉi krio. “Ĉu vi ne avertis, ke la kreaĵaro ĝemas en la atendo, ke vi fariĝu filoj de Dio?”

Tial la malbonoj ĉeestaj en la socio, la malbonoj svarmantaj tra la homaro estas parto de tiu malrapida procezo al kreskiĝo kaj maturiĝo. Tiom pli la homo fariĝas filo de Dio des pli li sukcesos marŝi sintonie kun la kreaĵaro kaj la malbonoj progresive komenciĝos malaperi kaj eliminiĝi kaj almenaŭ fariĝi iom pli elteneblaj.

Tial la malbonoj haladzigantaj la mondon siamaniere kontribuas al kresko de la homaro, kiu estas kontrastata de la fortoj de la “povoj”, kiuj, anstataŭ la vivon, celas la morton.

Pripensu nur se kio estas konsumata por detruiri, por mortigi, estus uzata en la sci-enca priserĉo por protekti la vivon, kiom malpli da malsanoj, kiom mapli da suferoj.

Sed ĝis kiam en la socio viglas egoismo de la akumulo de mono - kaj por tio utilas eksciti malordojn, militojn, detruojn - ĝis kiam nia ekonomio (ne nur tiu itala) ŝuldas sian prosperon al la enspezo el la armila produkado, nome kiu produktas morton kaj detruon, jen kial la kreemo restas paralizita. Do la Jesua invito leviĝi kaj labori ĉiuj kune por ŝanĝi ĉi tie, en la profundoj, tiun socion.<sup>8</sup>

### **Alia demando**

*Aŭskultanto:* Mia demando emas iomete provoki esprimante koleron kiu min persekutas. Aŭskultante vian interpreton, plonĝas sur min neceso demandi, kiel eblas, ke tiom da personoj; religiuloj, pastroj, personoj kiuj dediĉis tutan sian vivon por studi la vorton de la evangelio, daŭrigas ankoraŭ nun, en la Eklezio, la diversaj parokestroj, anonci mesaĝon kiu ne estas tiu via. Vi ekplikis tiujn parabolojn per granda simpleco... kaj nun fariĝas simplaj ankaŭ por la leganto! Kiel okazas ke evangelia mesaĝo ne estas tiel anoncita?

---

<sup>8</sup> (Ndet). Certe la homo “laboranta” kiel la Patro kaj Jesuo povas malpliigi la suferon en la mondo, tamen kial la suferoj niaj kaj de niaj antaŭuloj?

Klarigo kiu estas fontanta el mia profundo estas ke, se veras ke iu Dio kiu ŝanĝiĝas tra la tempo, ankaŭ la nuna konceptado pri Dio estas ŝanĝanta; vi jam eksukesas ĝin ŝanĝi la bildon pri Dio al kiu mi kutimiĝas...

Tamen iomete kontraŭdiras ankaŭ tio, ĉar Dio estas vere brakumanto en amo, kiel eblas ke, en la evangelio tio ne estas esprimata tia por ke ni ne misinterpretu? Kial la evangelio ne malhelpis ke ni faru Dion fonto de puno, de suferoj? Mi estas katekisme instruanta infanojn kiuj la venontan aprilon ricevos la unuan komunion, kaj jam pritraktis la temon de la konfeso. Bedaŭrinde malfacilas kaj tamen ni transdonis per alia konotacio, ne certe laŭ via interpreto. Ni nun falas iomete en krizon. Mi min demandas. Kia la sinteno de la pastroj, de la eklezio, kiu certe posedas dokumentojn, tempon por studi kaj por kritike reviziti ĉion?

### **Respondo de Maggi**

Renata (ĉu iu via nomo?) metis fingron en la sanga vundo.

Dio jam en la Malnova Testamento riproĉas pastrojn, diras ke sia popolo pereas por manko de scio kaj la responsuloj estas sacerdotoj.

Mi kredas ke ĉi tie estas kuracistoj... se kuracisto vin kuracas same kiel oni kuracis laŭmetode de la tempo en kiu li magistriĝis ĉar li enmanigis nek sciencajn revuon nek partoprenis kunvenojn kaj ĝisdatigajn kongresojn; se jam pasis jaroj, la kuracilo kiu tridek jarojn sanigis, hodiaŭ povas sendi al la alia mondo. Danĝerigas kuracisto kiu ne sin ĝisdatigas, li evitindas ĉar riskas damaĝi. La konssciencviglaj kuracistoj konstante renovigas sian kuracistan arton.... Sed tridek jarojn antaŭe ĝi sanigis! ... Koncedite! Sed tridek jarojn antaŭe!

Nu pastroj estas pli danĝeraj ol kuracistoj, ĉar pastro kiu ekde sia ordiniĝo ne malfarmas libron, nek profitis sciencajn revuojn, nek sintonias kun la renoviĝo konstanta en la eklezio... tiu estas danĝeriga, estas evitenda.

Tiajn pastrojn, se vi ilin konas, vi evitu. Bedaŭrinde difino pri pastroj stariĝas en tio: ili prizogas ĉiam pri aferoj plej urĝaj kaj neniam pri la plej gravaj. Kion mi al vi komunikas ne falas senmotive el la alto, ĝi estas багаĵo de studoj kiujn la eklezio, eĉ la hierarkio, akceptas, kaj tamen oni ĝin ne konigas al la homoj.

Eta noto biografia: mi kun aliaj kunfratuloj inaŭguris jam dek jarojn antaŭe centron por pribibliaj studoj en la regiono Markoj, ĉar estis mia sufero vidi ke en la biblia kampo eferveskas eldonaĵoj kun ennovigaj interpretoj, kiuj tamen restas ĉe la nivelo de studemuloj, je nivelo de la hierarkio, sed ne atingas la publikon. Al la publiko malsupreniras - se tamen malsupreniras - eretoj malpuriĝantaj; tiam stariĝis antaŭ mi demando: Ĉu ne eblas, ke tiu trezoro posedata de la eklezio semiĝu inter la publiko? Tiam ni kreis tiun centron, kie ni studas en maniero rigore laŭscienca, eĉ furioze, sed poste ni populare disvastigas ĝuste kiel vi aŭdis ĉi tie, eĉ per kelkaj vortoj skuantaj piajn orelojn... religiajn... sed iom da ŝoko utilas.

Vi konstatis, ke en tiuj niaj renkontiĝoj ĝermis nenia teknika vorto, nek klerika nek malfacila. Ni studas tiujn novaĵojn kaj ilin disvastigas popularnivele. Same kiel tion faras ni, tion povus fari la pastroj. La invito kiun ni faras: ni ĉesu provi timon antaŭ la pastroj. Kiam pastro en prediko montras ke ĝi havas nek kapon nek voston, oni be-

zonas trovi la kuraĝon tion al li konigi: “Hodiaŭ vi diris grandajn stultaĵojn”. Foriru el la preĝejo kiam la prediko sensencas, estas prava defendo, sed ĝis la pastroj trovos la preĝejon plena, ili neniel ŝanĝiĝos. Kiam ili ĝin vidos malpleniĝinta, fine ili diros: “Eble io ne funkcias...”. Tial hodiaŭ ni havas ĉiuj gradon pli altan de instrado ol en la pasinto, ni havas la eblecon aĉeti librojn aŭ informiĝi, ĝisdatiĝi pri religio kaj, se tion ne posedas niaj pastroj, tion akiru ni meme. Ĉu vi konprenis, Renata?

### **Alia interveno**

*Aŭskultanto:* Jes tio kuras, sed stariĝu alia stimulo: Ĉu vi povas iom diri pri la Eŭkaristio?

### **Respondo de Maggi:**

Ĉu vi povu partopreni morgaŭ?

“Ne. Bedaŭrinde hodiaŭ estas la sola tago...”

### **Maggi:**

Mallonge tiam ĉar morgaŭ ni celebros Eŭkaristion. Pri kio temas? Ni malkovris, ke per la Dio de Jesuo finiĝis la kulto rilate tian Dion. Tiutempa homo devis sin senigi el pano por ĝin oferi al Dio, nun instrue de Jesuo, **estas Dio kiu sin faras pano kaj sin oferas al la homoj.**

Morgaŭ, kiam ni celebros Eŭkaristion, ĉio tio estos reprezentata. Ne estos momenta kulto adrese de la Sinjoro, sed nova bildo tre bela, rezultigita de la evangelio de Luko, ĝuste rilate Eŭkaristion; fakte estas dirate: “Imagu mastron kiu revenas nokttempe hejmen; trovante la servistojn ankoraŭ nedormantaj, kion li faru?” Normale: li faru sin servi!”. “Ne! Li sidiĝas kaj ekkomencas ilin servi”: Tio estas Eŭkaristio. Eŭkaristio estas **priviligia momento** kaj grava **en kiu ni servistoj** - (ne de Dio ĉar laŭ Jesuo ni ne estas servistoj sed filoj) - **volontaj servistoj de niaj fratoj, estas devigitaj ripozi. Ĉar la Sinjoro pasas al nia servo**, nome Li al ni komunikas la saman sian kapablon de amo, por donaci al ni novajn energiojn por ami: tion signifas Eŭkaristio. Do aktualiĝas grava kaj altvalora cirkonstanco dum kiu la komunumo estas, por tion diri per modernaj konceptoj, reŝargita je energio pere de la Sinjoro Jesuo por ke kun li kaj kiel li ni povu adresiĝi al la aliaj: tion signifas Euzkaristio.

Do Jesuo fariĝas pano, Jesuo la Difilo fariĝas pano por tiuj kiuj Lin akceptas kaj fariĝas pano por ke la aliaj fariĝu eĉ ili filoj de Dio. Ĉu alia demando?

*Aŭskultato:* Mi havas nur dubeto ligita ĉiam al tio supre”.

### **Maggi:**

Se temas pri nur unu dubo ni sukcesis ĉi matene.

*Aŭskultato:* Unua dubo spontane fluanta el ĉio de vi dirita estas, ke ankoraŭas en la eklezio kaj en la hierarkio io da volo pluteni la situacion tia kia ĝi estas”.

### **Maggi:**

Tion diras vi.

### **Moderatoro:**

Patro Alberto ne povas aprobi hazarde kompromitigajn juĝojn.

### **Maggi:**

Ne, ne: tiom pli la popolo estas nescia des pli oni mastras bone, ĉiu diktaturo la unua afero kiun ĝi entreprenas konsistas el la elimino de la intelektulaj klasoj, kiuj povas igi rezignantaj la personojn.

*Aŭskultanto:* Jes, sed oni atendus ke en la eklezio, esprimo de la Korpo de Kristo, la rezonado estus alidirekta. Pripensante tion, mi reelvokas: “Kiu malsoifigis kaj malsatis, tiu venu al mi, sendepende de ilia origino...”. Kaj min demandas kiel eblis, ke dum la Koncilio de Florenco en la dekkvina jarcento, post 1400 jaroj de kristanismo, oni diris, ke la neapartenanto al katolika eklezio ne havis esperon pri savo. Entute kiel la eklszio povis tion aserti? Tio similas forkonfeson pri la evangelio.

### **Maggi:**

Do: iom da malfido, iom da ignoro, ŝuldebla al la manko de aliro al la originalaj tekstoj. (Ni, en nia ekipo, estas tradukantaj ekde antaŭ dek jaroj la evangelion de Mateo kaj ankoraŭ estas laborantaj).

Traduki estas afero tre delikata, ĉar se mi modelas mian vivon sur la evangelio kaj tio estas erare tradukita, mia vivo rezultos ruinigita. Tiam la origina teksto estis greka : kial la greka? Ĉar ĝi estis la angla de tiu epoko. La evangeliistoj elektis la komercan lingvon sed ili erare kalkulis ĉar apenaŭ unu jarcenton poste, la greka komenciĝis malfortiĝi kaj ĉe ni en okcidento subvenis la latina, el kio la neceso traduki el la greka al la latina.

Nu, papo Damaso en 384a sargis Sanktan Hieronimon kontroli la diversajn tradukaĵojn kurantaj kaj eltiri el ili unusola kiu prave kontentigu. Hieronimo entreprenis kolosan verkon, ne senan je eraroj tamen kaj la plej granda el tiuj troviĝas en la ĉapitro deka de la johana evangelio. Li interpretis “ŝafejon” por “ĉirkaŭbaraĵo”... Estas dirate, ke Jesuo eniras la ĉirkaŭbaraĵon kaj forigas la ŝafojn. Male per Jesuo okazas la finiĝo de ĉiu ĉirkaŭbaraĵo, eĉ la plej sankta. Kio estas ĉirkaŭbaraĵo? Estas tio kio eltrovis religio. Ĝi rabas al vi la liberon, malgraŭ ke ĝi liveras sekurecon. Kiu estas sekureco? Ke vi ne plu rajtas pensi per via kapo, vi havos ĉiam superulon kiu diras kion vi faru. Ekzistas personoj kiuj pro sia psikologia naturo, pro sia mensa strukturo timas la liberon, tiam ili sin konfidigas al institucio kie estas ĉefo kiu decidas anstataŭ vi; mi rezignas liberon, tamen mi trovas sekurecon: mi neniam eraras ĉar, eventuale, eraras kiu min ordonis. Jesuo forigas la ŝafojn el ĉirkaŭbaraĵo, ĉar li venas por porti la liberon senan je ĉiu ajn sekureco. Jesuo ne bezonas infanecajn estulojn, kiuj ĉiam bezonas pastron kiu al ili diras kion ili faru, sed personojn maturajn, kapablajn marŝi per siaj piedoj. Komforte pri tio Jesuo dirintus “kaj estos unusola ŝafejo kun unu sola paŝtisto”.

Ĉar kiuj estas liberigitaj de Jesuo formas komunumon.

Hieronimo, eble trompita de la termino “ŝafejo”, kiu legeblis en la antaŭa lineo, tradukis, anstataŭ “estos unusola ŝafaro (grego)”, “estos unusola ŝafejo”.

Jesuo jam eliminis la ŝafejon. Sankta Hieronimo skribas: “estos unusola ŝafejo”. El tio la interpreto: estos unusola eklezio.

La slogano reganta ankoraŭ ĵus antaŭ la Dua Vatikana Koncilio estis: “Ekstere de la katolika eklezio nenio savas” ĉar Jesuo diris (laŭ tiu tradukaĵo): “estos unusola ŝafejo<sup>9</sup>”.

Okazis religiaj luktoj, religiaj militoj inter la diversaj eklezioj por fariĝi unusola eklezio. La religio absolute plej krima, kiu influis sur la tera surfaco estas la kristanismo.

La mortintoj kiuj kuŝas en la konscienco de kristanismo, neniu religio samkvante havas. Ĉio por kulpeli personojn eniri la ĉirkaŭbaraĵon. Kuris la misiistoj kun la krucifikso: “Ĉu vi kredas?” - “Ne” kaj bato sur la kapo, ĉiukaze necesas ilin mortigi. En la nomo de Dio, de la Dio de Jesuo, estis plenumitaj hororaj genocidoj. Vi pripensu nur pri la malapero de popoloj en la Latinameriko, de la Maja popolo, de la Azktekoj, sed ne nur, ene de la sama kristanismo ĉu vi scias ke ankoraŭ hodiaŭ ne estas serioze konata la nombro de virinoj bruligitaj en la brulŝtiparo? Oni kalkulas de 3000-4000 ĝis sep milionoj...

Je la nomo de Dio kristanoj reciproke disŝiriĝi, boliĝi, aroŝtiĝi, amputigi, por enirigi unusolan ŝafejon, kiu estis la dia regno. Do vi vidu kiel nekorekta traduko kuntrenis katasstrofajn ruinigojn. Hodiaŭ ne plu ekzistas tiu “ŝafejo” kaj “unusola paŝtisto”.

Bone, mi opinias ke ni povas konkludi, hodiaŭ posttagmeze je la 16 kun la evangelio de Marko, ĉar ni devas pasi al alia evangeliisto.

## KVINA PRELEGO

Diras la Talmudo. Kiam vi vin trovos en kontrasto inter la vorto de Dio kaj la vorto de la skribisto, aŭskultu tiun ĉi lastan. La skribistoj estis la oficialaj interpretistoj de la sanktaj skriboj kaj la deponantoj de la dia volo. Ilia povo sur la amasoj estis enorma. Kiam parolas skribisto parolas Dio mem.

Nu kiam Jesuo parolas la homoj reagis kaj diras: “Tiu Jesuo, mi sentas, ke li venas el Dio, ne kiel niaj skribistoj”. Kiu estas la instruo de la skribistoj? Ni havas ilian instruadojn en la transskribaĵoj de ilia predikoj. Estis tuta amaso de devoj antaŭ Dio, estis konstante pliigo de la pezoj sur pezojn tiamaniere, ke homo estu kontinue subpremita kaj super ĉio tiuj uloj tiamaniere interpretis (kaj tio estas la krimo de la religio) por sukcesi kapti ĉiun personon per la sento de “indeco” rilate Dion, ĉe kiu ne eblas sperti plenan intimecon kaj komunikiĝon kun Li. Tia estis la instruo de la skribistoj: “La biblio diras tiel. Profeto, rabeno je fama nomo tiel komentis, kaj ni al vi diras ke: ktp, ktp...”, kaj la popolo estis premita sub neeltenebla pezo de tiu leĝamaso obeenda, tiel ke, kiel diros Petro, “sukcesis nek ni nek niaj patroj obei tiun nekred-eblan amason da leĝoj...”.

Tiam Jesuo eniras sinagogon, “Tuj” komencas instrui kaj tuj naskiĝas reago el laĉestantoj, laŭ kiuj li portas malestimon al la instruo de skribistoj kaj jen - estas uzata la sama vorto - “tuj” okazas la incidento. En ilia sinagogo, - oni notu ke la evangeliisto prenas distancojn el ili: estas la **ilia** sinagogo -, estis homo, (temas pri anonimo, do li

---

<sup>9</sup> (NdT) Oni sciu, ke la unueco de ŝafejo ne postulas kaj rajtigas militon aŭ ion ajn perforton. Se tiu unueco de ŝafejo estus devenebla el aliaj skriberoj, tio ankoraŭ ne rajtigus militon.

estas reprezentanto de ĉiuj kiuj sin trovas en la sinagogo), havanta spiriton malpuran, kiu senhezite ekkriis. La denunco enŝtelita de la evangeliisto gravas. La unika personulo troviĝanta en tiu sinagogo estas homo posedata de malpura demono. Kion signifas homo kun malpura spirito? Spirito aludas vitalan forton, vivan energion; kiam tiu forto devenas el Dio ĝi estas nomata “Sanktulo”, ne nur pro intrinseka kvalito, sed pro aktiveco kiu separas tiun homon, akceptintan tiun spiriton, el la sfero de la malbono. Kaj aktiveco de Jesuo, la homo sur kiun descendis la Sankta Spirito, nome la pleneco de la forto de la dia amo, estos bapti en la Sankta Spirito, anonci la vivon de Dio, kiu laŭ la mezuro de akceptado ĉe la personoj, tiujn ĉi separas de la sfero de la malbono. Kiam tia forto ne venas de Dio, sed el realaĵoj al li kontraŭaj, estas difinita malpura, ĉar blokas la personojn en la premega kitelo de la malpureco. Nu, en la sinagogo, denuncas la evangeliisto, ĉeestas malpura ulo La evangeliisto intencas denunci la hebrean religian institucion, kiu, per sia instruo malproksimigas la homon el Dio anstataŭ al Li lin proksimigi. Skribistoj, ĝuste ili, kiuj manie provas individuigi kaj kaj igi ordonaj rigorajn leĝojn pri purigado, ne perceptas ke tia malpurigo kuŝas ĝuste ene de ilia sinagogo. De nun la religiaj lokoj riskas malpurigi. Pie vizitanto kontaĝiĝas per malpuro ĝuste en sinagogo. - Ĉu vi komprenas kiel oni mortigis Jesuon? - Mi, legante la evangeliujojn (kaj en tio mi elspezis la tutan vivon), ne ĉesas miri ne pri la fakto ke li estis mortigita, sed pro la fakto ke Li sukcesis vivi tiomlonge! Tia predikanto estas ulo eliminenda tuj kaj tute! Ulo kiu aŭdacas diri, ke viziti lokojn religiajn ne nur ne enkondukas al la komunikado kun Dio, sed ili estas lokoj infektitaj je malpureco... tiu meritas esti mortigita tuj. Fakte la venontan fojon ke li eniros sinagogon oni decidis lin murdi.

Kion signifas homo havanta malpuran spiriton? Estas ulo kiu kutime adheris al valorsistemo aŭ al religia ideologio kiu lin igas ne nur rezista sed malamika al Jesuo. Dum la amasoj reagis pozitive, tiu ĉi reagis negative, kontraŭstaras kaj ekkrias kaj, rimarku strangaĵon: estas individuo sola sed parolas plurale kaj diras. “Kion vi volas de ni?”. Strangas la afero: unuopulo kiu parolas kiel plurulo: “Jesuo Nazareta”, li lin konsciigas pri la origino la nekonatan Nazareton. “Ĉu vi venis por nin pereigi?” Sed ĉu Jesuo per sia instruo kiun pereigas? Popolanoj pozitive reagis. Jesuo estas ruiniganta la estimon, la aŭtoritatecon de la skribistoj, kiuj kontrabandis kiel dian volon tiujn kiuj reale estis homaj eltrovaĵoj.

:Jesuo per Sia instruado estas damaĝanta la instruadon de la skribistoj. Do kiu estas tiu ulo demonhavavanta? Li stas homo kiu bazis tutan sian fidon sur la instruado de la skribistoj. Tuj kiam li ekvidas cxion endanĝerigita, li sentas damaĝita eĉ sian religiecon, sian kredon, sian ekzistadon mem, jen kial li reagas.

La homo posedata de la malpura spirito reprezentas la aliĝinto al iu religio.

(rememoru, ĉi matene, ni parolis pri la efiko de la religio). La religio forprenas de vi la liberon, tamen ĝi donas al vi la sekurecon, ĝi forprenas de vi la liberon, ĉar vi ne plu kapablas agi laŭ via cerbo, sed vi agas laŭ aŭtoritatulo de vi konata, tio forpelas de vi respondecon: Vi agas laŭ la diroj de aliuloj. “Kio estas bona, kio estas malbona” tion ne decidu vi, sed estas ĉiam iu homo kiu estas via superulo, kiu vin diras kio estas bona kaj kio estas malbona en via vivo. La homo kiu tiel agas neniam respondecas pri siaj agoj. Nu, tiu ulo sentas sin minacata de la instruado de Jesuo kaj li diras:” Ĉu vi venis por min ruinigi? Li rememoras ke Li estas La Dibenato. La “Dibenato” estas esprimo indikanta la Mesion atendata de la tradicio, kiu devis esti la perfekta observanto de la Leĝo kaj la perfekta interpretisto de la Leĝo mem. Li rememoras al Jesuo kiu estas lia celo:”Vi ne devas detrui la Leĝon, Vi devas respektigi Ĝin” Kaj Jesuo lin riproĉis dirante: “Eksilentu”- La vorto de Jesuo silentigas tiun de la skribistoj- “Foriru de li”. Jesuo ne akceptas la dialogon kaj trude ordonas al li silenti.”Kaj la malpura estaĵo lin deŝirante kaj forte ekkriante, foriris de li”.

Kiam la Evangeliistoj prezentas al ni tiujn epizodojn, ili ne rakontas historiaĵojn, sed teologiaĵojn. Tiuj ĉi epizodoj ne rilatas historion, sed fidon.

Tie la Evangeliisto volas prezenti la korŝiron de homo kiu, je iu momento de sia vivo, malkovras ke ĉion kion oni instruis al li por lin enirigi en komunio kun Dio, ne nur malfavoras la komunion mem sed estas ĝuste kio ĝin malhelpas. Li malkovras ke ĉion kion li opiniis sanktaĵo, ne nur ne estas tia sed naskigas malpuraĵojn, tio estas malhelpas lin raportigi kun Dio. Jen kial la korŝiro estas granda. La liberigo de la individuo ne estas sendolora. Atingi iun momenton de la vivo kaj trafi en la Evangelio de Jesuo kaj malkovri ke oni tute eraris pri la orientigo de sia vivo estas drameca afero kaj korŝiro, sed tiu estas korŝiro kiu kondukas al libereco.

Ĉiuj estis mirigitaj tiel ke oni petis laŭvice”: Kiu estas ja tiu ĉi ulo?” Estas iu surprizo, iu miro. “Nova instruo”. En la greka lingvo “nova” povas esprimiĝi per du vortoj: unu kiu signifas aldonita en la tempo, do: ni havas multajn instruojn, estas nova instruo. Tiu vorto nomiĝas “nov”, ni ĝin uzas ankaŭ en la itala. La alia vorto, male, indikas plej bonan kvaliton, kiu anstataŭas ĉion alian.

La homamaso sentas en la mesaĝo de Jesuo kvaliton kiu nuligas ĉiun instruon de la skribistoj, oni rekonas en ĝi la dian originon, “donita per aŭtoritateco”, “Li eĉ ordonas al la malpuraj spiritoj, kaj, mirindaĵo, ili obeas al Li.”Estas strange: Jesuo agis kun iu malpura estaĵo, sed la homoj plivastigas la aktivadon de Jesuo al ĉiuj malbonaj spiritoj. Lia famo disvastiĝis tuj ĉie en la tuta Juda regiono. Kaj nun ni vidos la sekvojn de tiu famo, sed antaŭe mi volus substreki gravan aspekton: tiun de la malpureco kiun ni vidis loĝantan en la sinagogo mem.

Ĉu vi rememoras? Ekde la unua vespero ni diris ke la religio mem estas la inventinto de la peko..

La rezonantaj homoj neniam alvenas al eltrovo en iuj situacioj, en iuj agoj, en iuj kondutoj de tiel grava krimo kaŭzanta la diajn minacojn. Estas la religio kiu konceptas la pekon kaj ĝi sukcesas ĝin encerbigi al la homaro, kaj estas la religio kiu kreis la kategoriojn de la puraĵo kaj de la malpuraĵo. Dio situigas en la sfero de la pureco, la homo situigas en tiu de la malpureco. Ĉio kio rilatas la vivon de la homo li malpurigas. Nur tri vidpunktoj rilate la malpurecon: la nasko mem de filo malpurigas la patrinon. Ni diris ke la religio estas malamiko de la vivo. Mi opinias ke, se ekzistas momento kiam oni povas tuŝi per sia propra mano la miraklon de la kreado tiu estas la naskiĝo de bebo. Ne tiel estas por la religio. Tiam la religio, - Levidoj, vorto de Dio-diras ke, kiam virino naskas ŝi estas malpura dum 33 tagoj, dum 66 kiam ŝi naskas ne filon sed filinon. Post tiuj 33 tagoj dum unu semajno ŝi ne povas eniri templon se li naskis infanon, dum 14 tagoj ŝi ne povas eniri templon se ŝi naskis infaninon ĉar infanino duoble malpurigas la patrinon: Sed eblas ke la naskiĝo de bebo malpurigas la patrinon? Vidu, ni ridas, sed ĝis antaŭ la II Vatikana Koncilio la patrinoj, kiam ili naskis, ne povis eniri preĝejon sen antaŭa beno de la paroĥestro, ĉar la akuŝo farid ilin malpurajn.

Homo rezonanta per sia propra cerbo kiel povas kredi ke la naskiĝo de bebo malpurigas?

Malpura signifas ke finis la kontakto kun Dio, ĉar Dio akceptas la preĝojn kaj oni povas agordiĝi kun Li nur kiam oni estas pura. Sed, ĉu povas la naskiĝo de bebo malpurigi homon? Estas la religio kiu inventas tion....Alia sinteno kiu malpurigas homon estis la seksa vivo. La virino pro menstrua ciklo ĉiam estis malpura: Ŝi povis seksumi kun la edzo nur kiam ŝi ne havis menstruaĵon sed tiu ĉi faris la virinon malpura, do la virino ĉiam estis konsiderata malpura. La religio tiel faris, ke eĉ la plej normaj vivrilatoj oni vivis kun kulpo kaj honto sentoj. Kiom da geedzoj, eĉ en nia kristanismo, estis ŝokitaj ĉar la nura ideo plezuriĝi per geedza rilato sentigis ilin kulpaj. Ke ĉio kio rilatas al la seksa rilato parencigas kun la peko devenas ĝuste de tiuj hebreaj kredoj. Kaj fine, jen la manĝaĵoj. La libro de la Levidoj enhavas ĉapitrojn en kiu ĝi apartigas la manĝojn kiuj vin purigas disde la manĝoj kiuj vin malpurigas kaj se oni legas oni trovas ke la porko estas malpura manĝo sed ne la lokustoj. La lokustoj min naŭzas, mi ŝatas ŝinkon. "Ne! se vi manĝas porkaĵon vi estas malpura". Tiam kiam mi diras ke estas la religio kiu inventas la pekon, vi komprenas al kio mi rilatas. Mi ne estas malpliiganta la pekan senton, sed Jesuo redonis al ĝi ĝian veran signifon. **La peko por Jesuo ne estas malobeo al iu regulo,, al iu dia ordono, sed ĝi estas la malbono kiu intence iu homo faras al alia homo.** Kiam Jesuo parolas pri peko- kaj ĝuste en tiu evangelio- Li deklaras ĉiujn manĝaĵojn puraj: do la libro de la Levidoj estas malvera. Sed kiel?: Ĉu estas malvera la vorto de Dio?" Ne veras ke ekzistas malpurigantaj manĝaĵoj. La peko ne kuŝas ekstere de vi, ĝi kuŝas ene de vi. Ĝi estas la malboneco kuŝanta en vi kaj kiu transformiĝas en sinteno domaĝanta la aliulo. En la listo de pekoj kiun Jesuo faras neniun rilatas Dion. La peko ne estas ne partopreni en diservo, ne preĝi kaj eĉ ne kredi. Kio estas la peko?

Ĝi estas rabi, envii, malami; ĝi estas ĉio kio kontribuas damaĝi la alian. Ekzistas peko kiun mi en ĉiu mia pastra aktiveco jam tridekjara. neniam aŭdis konfesi, tamen Jesuo ĝin metas lastloke, ne ĉar ĝi estas la plej malgrava, sed ĝuste por ĝin reliefigi: t.e. **la stulteco**. Esti stultaj estas lukso kiun ni ne povas permesi al ni; **ĝi estas peko!** Ĉar stulteco malpermesas al ni kompreni la agado de Dio en nia vivo. Jen do la lidberigo farita de Jesuo. La peko ne estas tio kion oni instruis al vi; la peko estas la malboneco kiun oni entenas en si mem kaj kiun oni transformas en konkretaj agoj damaĝantaj la aliuloj. “Por la homoj estas granda libereco”. do, ĉu mi povas amori kun mia edzino sen devi, poste, min purigi? Kaj. do. faru ĝin, faru ĝin fantazie, sed faru ĝin”. Do ĉu mi povas manĝi ŝinkon? “Jes, ja! “ La rilato kun Dio ne baziĝas sur tiaj aferoj. La raporto kun Dio baziĝas sur via rilato kun la aliaj homoj; “Kaj se mi pekas? Ĉu mi devas eniri la templon kunporti kokinon? ” ” Nepe ne”, tiu iros rekte en la ventro de sacerdotoj, ĝi ne iros al Dio. Se vi pekas pardonu la pekojn de la aliaj kaj viaj kulpoj estos forviŝitaj de vi” Oni alarmiĝas.

Se la instruado de Jesuo disvastiĝas alvenas la fino de la templo! La templo de Jeruzalemo pludaŭris per la elspezoj pro la favorigaj oferoj. Se la homamaso vere komprenas ke oni ne plu bezonas kunporti kaprinon por havigi al si la pardonon de la pekoj tuj la eniroj malaltiĝas. Jen por doni al vi ideon pri kiom multe transformiĝis tiam la religio: la ĉefsacerdoto posedis mem la bredejon ĉe la olivarba monto kie povis esti aĉetitaj la bestojn por la ofero, ĉar ne eblis ke oni povis preni unu el siaj kokinoj aŭ kaprinoj. Tute ne! devis temi pri apartaj bestoj. Faru hipotezon; imagu ke mi el Nazareto iru al Jeruzalemo, mi ne povu certe iri 100 kilometrojn kune kun besto,, Tiam mi iras ĉe la ĉefsacerdoto, kiu posedas la bretejon, mi aĉetas la beston kaj ĝin kunportas al la templo, la sacerdoto ĝin buĉoferas, li spruĉetas iom da ĝia sango sur mi. Poste li prenas kaj la felon (tio estis grava afero) kaj la viando. Tiuepoke kompreneble oni ne faris irrevenajn vojaĝojn, minimume oni restis en Jeruzalemo dum tri tagoj. Se mi volis tiam manĝi biftekton de la ŝafido aŭ de la kaprino, mi iris ĉe la buĉisto.

Vi jam komprenis al kiu apartenis la buĉejojn de Jerusalemo? nu, vidu, ili apartenis al la familio de la ĉefsacerdoto: Nun ni povas prave diri: “vi aĉetas unu kaj vi trioble pagas”.

Mi ĝin aĉetis, ĝin mi oferdonis kaj se mi volas manĝi biftekon el ĝi mi devas denove ĝin aĉeti.

Vi komprenas ke en la templo svarmas alarmo. Tiu alarmo ne estas nur ekonomia, sed estas pri aŭtoritateco kaj pri prestiĝo. kaj jen la sinsekvoj: ni vidis ke la homoj, entuziasmaj pri itiu mesaĝo, disvastigas la famon de Jesuo ĉie kaj jen la reagoj, la sinsekvoj de tia disvastigado de la mesaĝo.

Ni iru al versego 39:”:::Li iris predikante en iliaj sinagogoj- ( mi ripetas, Jesuo neniam partoprenas en la sinagogaj ritoj, Li eniras sinagogojn por instrui, por liberigi la homojn)- tra la tuta Galileo kaj forpelante la demonojn..

Ĉu vi volas trovi demonojn? Eniru la sinagogojn. Estas la lokoj de dikulto tiuj pli rezistaj kaj malamikaj kaj la rifuĝejoj de malpuraĵoj, ĉar estas la religio kiu kreas mem la malpurecon kaj kreas la demonojn...

Tiam Jesuo eniras tiujn lokojn de dikulto por liberigi la homojn el la leĝa sklaveco.” Alkuris al Li,- kaj estas surprizo- leprulon”. Leprulo kiu alkuras al Jesuo! Tiutempe la lepro ne estis konsiderata kiel malsanon, hida tiom kiom vi volas, sed ĝi estis konsiderata kiel malbeno lanĉita de Dio kontraŭ difinitaj pekoj aŭ pekuloj. Tiu leprulo estas anonima. Nun jam ni fariĝis ĉiuj spertuloj pri interpretado de la Evangelioj, kiam rolanto estas anonima tio signifas ke li estas simbola. tion kion nun la Evangeliisto estas rakontonta al ni ne estas epizodo por kroniko, sed estas fidealaĵo, kiu ne rilatas historion, sed teologion, do estas grava afero ke ni ĝin komprenu. Nu, la leprulo estis konsiderita kiel malbenata de Dio pro difinitaj pekoj. Lia resaniĝo estis, praktike, nebla. Kvankam tiutempe la lepro estis tre grava kaj disvastiginta malsano, en la tuta Biblio troviĝas nur du kazoj de resaniĝintaj lepruloj. La unua ekzemplo estas Maria, fratino de Moseo, resaniĝita rekte de Dio, kiu nature sendis ĝin al ŝi, kaj la dua la pagana oficiro Nahaman la Siro, resaniĝita de Elizeo. Nur du kazoj de resaniĝo inter ĉiuj lepruloj vivantaj en Israelo, do estis praktike neeble resaniĝi el lepro. La leprulo devas vivi for de la vilaĝo, li ne povas alproksimiĝi nek alproksimigi iun ajn, kiam li vidas homojn de fore li devas fuĝi kaj ekkrii:”Nepura, Nepura”, por la lepruloj ne ekzistas esperon, ili estis konsiderataj kiel mortvivantajn. La leprulo tie simbolas la homojn vivatajn en situacio el kiu, eĉ volante, ili ne povas foriri, ĉar la nura kiu povis ilin resanigi estas Dio, sed ili, ĝis kiam ili estas lepruloj, ne povas sin turni al Li, do ili estas senesperaj. La nura kiu povas min savi estas Dio, sed mi ne povas min turni al Li ĉar mi estas leprulo. Por la lepruloj ne ekzistas iun ajn saveblecon, ĉar kiel instruas la religio, al Dio ne povas sin turni malpurulo kaj Dio ne sin turnas al malpurulo. Do li estas simbolo de homoj vivantaj religian, moralan, situacion kiu oni konsideras pekon. La nura kiu ilin povus eltiri el tiu situacio estas Dio, sed ili ne povas alproksimiĝi al Li ĝis kiam ili vivas tian situacion. Ne estas espero! Nu, tiu leprulo alkuras al Li, estas malobeo. Kiel faras tiu leprulo alkuri al Jesuo? Estas la famo de Jesuo kiu plilarĝiĝis. Li aŭdis ke Dio estas amo, ke Dio ne toleras kiam eĉ unu nura homo estas flankenmetita kaj izolita en Lia nomo. Ni plurfoje diris ke Dio estas amo kiu deziras komunikiĝi al ĉuj homoj sendepende de iliaj konduto kaj sinteno. Tiam la leprulo esperas aŭ iluziĝas ke estu iu espero ankaŭ por li kaj, do, li alkuras, malobeas. Mi ripetas, la leprulo devis fuĝi kaj, male, li alkuras al Jesuo kaj Lin propetas....., sed li surgenuiĝas, li scias ke li malobeis la leĝon, li scias ke li estas kulpa kaj surgenuiĝas, li pretas, akcepti, eventuale, la rifuzon kaj ankaŭ la punon, tamen li provas. Li diras:” Se vi volas”- li ne certas, li tute ne certas ke tiu homo kiun li aŭdis paroli pri la amo de Dio, povu manifesti la amon de Dio ankaŭ al li, kiu estas pekulo-

“Se vi volas, vi povas...” Li ne petas esti resaniĝinta, nur Dio povis lin resanigi. Li petas esti purigita ke oni forpeli de li la malpurecon, por povi, poste, sin turni al Dio. Nu, ni diris du resaniĝoj de lepruloj en la Malnova Testamento, unu el Dio, la alia el Elizeo. Kiam la leprulo sin prezentis al Elizeo, kiu estis homo de Dio, li eĉ ne volis lin vidi, li diris al li; iru, iru, iru, plonĝu vin sep fojojn en la fluvo Jordano kaj vi resaniĝos, sed Jesuo, kiu bonŝance ne estas religiulo, kion Li faras? Sentante kompaton – tiu ĉi greka vorto signifas ekscitiĝo de la patrinaj internaĵoj kaj indikas

la amo kiun Dio havas por la homoj-Fronte de tiu leprulo, se Jesuo estintus piulo, religiulo, Li povintus fari tian riproĉon kiun ofte oni aŭdas: “ĉu vi mem serĉis tiun, ĉu tiun vi volis? Nun vi ĝin tenu. Nun vi ekkonscias pri la Sinjoro. Ĉu vi ne povis pripensi tion antaŭe? Vi estas kulpa pri via situacio” Kontraŭe Jesuo fronte al la situacio de tiu ulo, eksentas kompaton al li, tio estas ekscitiĝon de la patrinaj internaĵoj, kaj” Li etendis sian manon kal lin tuŝis”. Kial Jesuo etendas la manon? tio tute ne necesis. Kiom da resanigoj faris Jesuo nur per la forto de sia vorto mem. Kial ĉi foje Jesuo etendas Sian manon kaj lin tuŝas. La Biblio malpermesis tuŝi leprulon, ĉar :se vi, kiu estas pura, tuŝas malpurulon, lia infekto transiras al vi. Tiu esprimo “etendi la manon” estis ĉiam uzata por priskribi la detruigajn agojn de Dio kaj de Moseo:”Li etendis la manon sur la faraono, Li etendis la manon sur la egiptanoj....” Tiuj estas agoj alportantaj morton al la malamikoj de Dio,. Nu , Jesuo, kiu manifestas la plenton de la dieco, etendas la manon kaj ne punas la pekulon, ne lin cindrigas. “Li tuŝis lin”por ekmontri la falsaĵo de leĝaro kiun oni atribuis al Dio kaj kiu kontraŭe, ne esprimis la volon de Dio. Do, Li tuŝas lin- eĉ se tio estis malpermesita- dirante:”Mi tion volas”.

La volo de Dio estas la bono de la homo. “Mi volas tion, estu purigita”.

Per tiu ordono de Jesuo, dispeciĝas ĉiu la teologia fortikaĵo konstruita fare de la skribistoj sur la malpureco de la homo kaj precipe- kaj tio estas grava afero- Dirante: “Mi volas tion, estu purigita”, Jesuo intencas ke Dio ne toleras iun ajn homan diskriminacion farita Sianome, en la nomo de la religio, ke homojn oni povu elpuŝi, ekskludigi el sia amo el la komuneco kun Li. “Mi tion volas, estu purigita”.

Kion faris tiu leprulo por esti puriĝita. Li ne povis plenigi iun ajn geston petata por la purigado: eniri la templon (li ne povas!), buĉoferi beston, preĝi.... La purigo ne okazas pro la meritoj de la homo, sed ĝi okazas kiel esprimo de la amo de Dio. Ni vidis tion ĉi matene: tio ne estas kiel instruas la religio, ke la homo devas esti pura por ricevi la Sinjoron, sed: **akceptu la Sinjoron sed estos Lin kiu vin donos la purigon.** Sed vi komprenas ke, faliĝinte eĉ tiu baro, estas zorgoj ĉe la religiuloj. Se ni ne bremsas, se vere ĉiuj sin sentas amataj de la Sinjoro, sed kie ni celos? Ni celos ke la amo al Dio disvastiĝas tra la tuta homaro!

“Kaj tuj la lepro lasis lin kaj li estis puriĝinta” Li nur petis esti puriĝinta, ne! Li estas puriĝinta kaj ankaŭ la leporo forlasis lin. La Evangeliisto volas diri ke Jesuo ne estas profeto, ne estas homo de Dio, sed li volas diri ke en Li manifestigas la plenecon de la dia vivo kaj do estas Li kiu resanigas el la leporo.

Kaj nun venas la stranga sinsekvo, ni vidis ke Jesuo estas plena je mizerikordo kaj kompatato, ĉe la versego 43 ni trovas: “Li riproĉis lin”. Kial ajn Jesuo pasis dum momenteto el kompatato al riproĉo? “Li riproĉis lin kaj tuj lin forpelas.Ha, jen ni ne diris ke oni estis en la interno. De kie Li lin forpelas? Ankaŭ se li ne ĉeestas fizike,, Li forpelas lin el la sinagogo! Kiu estas la riproĉo de Jesuo? “Sed kiel vi povis kredi ke Dio vin rifuzu? Sed kiel vi povis kredi ke Dio ne amu vin? Sed Kiel vi povis kredi esti ekskludita el la amo de Dio? Estas la sinagogo kiu tiun instruis al vi! Tiam oni devas foriri.

La apartenantoj al la religia institucio, al tiu ĉi religia mondo certe ne povas percepti la amon de Dio, ĉar la religio ne havas intereson priparoli **amon** de Dio, sed ĝi interesiĝas paroli pri **timo** al Dio, ĉar Dio devas esti timata, tiel ke oni timu ankaŭ mi, kiu estas Lia reprezentanto. Jen kial estas rifuzo fare de religiaj aŭtoritatuloj al Dio de Jesuo.

Ili scias ke la Dio de Jesuo estas tiu vera, sed eĉ scias ke Jesuo prezentis Dion kiu ne superregas la homaron, sed kiu sin metas je la servo de la homoj. Do, se mi postulas Lin reprezenti, ankaŭ mi devas min meti je la servo anstataŭ min servigi. Do, jen la rifuzo.

“Tiam Jesuo lin riproĉis kaj lin tuj forpelis dirante al li”: Aŭskultu, nenion diru al iu ajn”- la leprulo devas ekkonscii, li devas sperti je tiu libero- “kontraŭe ekzaenigu vin de la sacerdoto kaj oferdonu por via purigo kion ordonas Moseon, kiel pruvo kontraŭ ili.”

Tiutempe, per la nomo de lepro oni eĉ nomis: ekzemon, psoriazon, kaj ĉiujn aliajn haŭtmalsanojn kaj, se el lepro oni ne povis resaniĝi, el kelkaj haŭtmalsanoj oni jes ja resanuĝis, tiam por esti reakceptita en la vilaĝo, en sia familio, oni devis sin prezenti ĉe tiu kiun ni nun nomus sanitaran oficejon de la templo, kie la sacerdoto vin ekzamenis kaj, post pago de du ŝafidoj, li liveris al vi la sanitaran atestilon per kiu vi povis reiri hejmen.

Tiam Jesuo volas ke tiu viro konvinkiĝu kaj vidu la malsamecon inter Li, la Dio kiu amas senpage kaj senkondiĉe kaj la Dio de la templo, la Dio avida, kiu postulas esti pagata kaj kiu flankenmetas la homojn, kaj Li diras: “kiel pruvo kontraŭ ili”. Do, kiam fine la viro estis liberiĝita de Jesuo, li devas mem liberiĝi el la religia institucio kiu lin subpremis. Resti ankoraŭ en la sinagogo, resti en la cirkaŭbaro, signifus ankoraŭoje akcepti esti trouzita kaj rezigni la liberon.

La peko konsistas en la vola akcepto de superregado flanke de la institucio, konfirmante per sia submetiĝo la regadon de maljusteco de la religia institucio.

Se iu, post la malkovro de la libereco, daŭrigas resti en la sankta cirkaŭbaro, por li ne plu ekzistas esperon. Jen kial Jesuo lin riproĉas: “Kiel vi povis kredi ke Dio vin flankenpuŝu!” Li lin retrovas kaj poste lin forpuŝas al la agado de la libereco.

Do, per tiu ĉi grava epizodo, por Jesuo **tiuĵ ordonoj kiujn la skribistoj instruas ne estas de Dio, sed estas de Moseo, ili ne esprimas** la dian volon, sed ili estas homaj inventaĵoj. Tiam Jesuo venis purigi ĉiun tiun galimation je dekretoj cirkuligita en la nomo de Dio, por revalorigi la unuan ordonon de Dio, kiu estas tiu de senĉesa, kreskanta amo al la tuta homaro.

*Ni finas la epizodon pri la leprulo poste ni aldonos al ĝi la egalvaloran virinan epizodon.*

Ni vidis ke Jesuo diras al leprulo ke li iru ĉe la sacerdotoj por vidigi al ili la malsamecon kaj, skribas la Evangeliisto, “li, la leprulo komencis prediki”.

Pripensu la evangeliisto uzas por la eksa-leprulo la saman verbon jam uzata por Jesuo.

**Kiam oni spertas la senkondiĉan amon de Dio oni estas kiel Jesuo, disvastigantoj de la bona novaĵo.** Ĉu vi rememoras, en Luko la paŝtistoj kiuj laudas kaj glorigas Dion kiel la estaĵoj la plej proksimaj al Dio? Kiam oni mergigas en la amo de Dio, kiel Jesuo, oni estas portanto de la **“bona novaĵo”**, kio ne tiom konsistas en la transdono de parola mesaĝo, sed en la transdono de vivospertoj kaj fakte li diras: li komencis prediki kaj senlace disvastigi la novaĵon”. La sperto de la amo de Dio, de la pleneco de la amo de Dio, el kiu la leprulo opiniis esti ekskludita pro sia peko kaj pro sia kulpo kaj la tuta libero finfine akirita okazigas en la viro iun ĝojon kiun li ne povas reteni, kaj la evangeliisto ĝin esprimas amasigante verbon kun verbo: prediki, senlace disvastigi... La viro transformigas en predikiston kaj li ne anoncas la nuran fakton lin koncernanta, do li ne limiĝas rakonti la sperton de li havitan, sed:”Li komencis disvastigi la novaĵon”, kaj kiu estas la novaĵo? Dio ne estas tia kia al li oni Lin prezentis, Li ne diskriminacias la homojn, Li oferdonas al ĉiuj Sian amon sendepende de ilia konduto kaj de ilia sinteno. Do tiu viro kiu sin opiniis flankenmetita de Dio, post kiam li vidis ke Dio ĉiam lin amis kaj kiu estis la religio kiu lin kredigis ke li estas flankenpuŝita, kiel Jesuo, pro la ĝojo, li disvastigas la “bonan novaĵon”, tio estas ke **Dio estas amo kiu deziras komunikiĝi al ĉiuj homoj** sendepende de ilia konduto kaj de ilia sinteno. La kulpo pri la flankenpuŝo de li eltenita ne estis de Dio, sed nur de la mensoganta religia institucio kiu sin metis sur la loko de Dio. Kaj sekve Jesuo ne plu povis eniri en iu ajn urbo: Li restis for en senhomaj lokoj, sed oni alkuradis al Li el ĉiuj regionoj. Jesuo tuŝis malpurulon kaj, laŭ la juda religio la malpureco de la leprulo transdoniĝis al li, do, Jesuo fariĝis leprulo, li fariĝis malpurulo, jen kial li ne plu povas eniri urbon. Jesuo por oferdoni vivon al iu leprulo akceptas perdi Sian vivon mem. La Jesuo kiu forviŝas la malpurecon fariĝis Li mem la malpura laŭ la leĝo, flankenpuŝito de la religio kaj de la socio, sed ja fine la konkludo estas farita. La homoj alkuras al li de ĉiuj lokoj, la homoj deziras plenecon de vivo kaj, eĉ se Jesuo komencas esti Li mem diskriminaciita, komdamnita de la religia institucio, la homoj ne dubas, estas el Jesuo kiu devenas la vivo.

Kaj ni finas do la hodiaŭan renkontiĝon per epizodo kiu similas al tiu ĉi, sed kiu havas kiel ĉefrolanton virinon kies situacio estas eĉ pli malbona ol tiu de la leprulo ĉar ŝi estas virino. **En la ĉapitro 5, versego 24**, oni legas ke granda popolamaso Lin sekvis, ja fine estas alarmo ĉe la religia institucio; la baroj rompiĝis kaj la homoj sekvas Jesuon; estas kiel Moseo kiam li liberigis la Ebreoj el la egipta sklaveco por ilin porti en la promesitan teron, nun la promesita tero fariĝis tero de sklaveco el kiu Jesuo devas foririgi ilin por ilin konduki en la mondon de la fido. Tiu ne estas vojaĝo el topografia sed el teologia vidpunkto. Jesuo transveturigas la homojn el la religio al la fido. El tiu kiun la homoj opiniis ke ili devas fari por Dio al kion Jesuo faras por la homoj. Kaj multe da homamaso lin sekvas. Ene de tiu ĉi homamaso okazas ion neatendita: la ĉefrolulo estas virino. Ni vidis ke la virino estis konsiderata suhoma kreitaĵo, Ŝi estis flankenpuŝita. Eĉ nuntempe, en la ĉiutaga triobla preĝo la Ebreoj diras: “Mi Vin dankas, Sinioro, kiu ne min kreis virinon” kaj la virino diras:”Mi Vin dankas, Sinjoro, kiu min kreis laŭ via volo”. Kiam naskiĝas virino tio signifas ke la

viro ne estis sufiĉe vireca, ke la semo estis difektita. La virino estas konsiderata subhoma kreitaĵo. Kaj rememoru ke en Italio eĉ ĝis antaŭ malmulte da tempo kiel bondeziro al la geedzoj oni diris: Bondezirojn kaj viraj filoj”. La virinoj ĉiam estas malbonŝanco kaj ĉiukaze tiu diskriminacio resaltis eĉ ĉe la religia sfero

Dio, asertas la Talmudo, neniam parolis al iu virino. Poste la aŭtoro ŝajnas opiniŝangi kaj li agnoskas:”Jes Li faris tion nur unufoje, sed poste Li sin pentis kaj neniam plu Li alparolis virinojn. Fakte kiam ni esploras la Malnovan Testamenton, ni legas ke Dio parolis al ununura virino, al Sara, la edzino de Abramo, kaj ĉar tiu ĉi ekridegis kiam Dio diris al ŝi ke la maljuna edzo kaj ŝi nun jam velkinta, ili naskos filon. Dio demandis al ŝi: “Ĉu vi ridis?” kaj tiu povrulino “Ne! diris. Temis pri eta mensogo. Dio sufiĉe “ofendiĝema”, ekde tiam neniam plu alparolis iun ajn virinon. Pro tiu ĉi okazaĵo de Sara la virinoj neniam plu estis taksataj kiel kredeblaj kaj ilia atesto ne validis.

Ĉi tie ni havas virinon kiu malsanas ekde 12 jaroj- la indiko gravas.

Ni diris ke la evangeliisto ne estas donanta al ni ĵurnalisman historion, ĉi tiuj ne estas epizodoj por kroniko, sed ja por fido. Kial la numero 12? Ĉar en la situacio de tiu ĉi virino la evangeliisto vidas la situacion de Israelo, kiu estis prezentita de la numero 12 kiomaj estis la triboj ĝin komponantaj.

De antaŭ 12 jaroj ŝi havis sangofluon. La evangeliisto priskribas la virinon kiel trafita, de ĉiama utersangado kiel klinike oni nomas la daŭrigantan menstruan ciklon. Tiu malsano metis ŝin en necerta situacio ĉar la sango en la ebra medio estas la vivo kaj do ŝi estas perdonta la vivon kaj la sango igas ŝin malpura. Se ŝi ne estas edziniĝinta ŝi ne povas trovi edzon, se ŝi estas edziniĝinta ŝi ne povas amori kun sia edzo kaj, do, ŝi ne povas naski filojn. Virinon trafitan de tiu malsano oni konsideras kiel malpuran egaligitan al leprulino. Si povas nek alproksimigi mek esti alproksimiĝinta. Ni diris ke se ŝi estas edziniĝinta ŝi ne povas amori kun sia dzo kaj ŝi estas, antonomazie, la malpura. Si ne povas eniri la templon kaj ŝi ne povas sin turni al la diservantoj. La religio ŝin kondamnas al sterileco pro sia situacio. La nehaltigebla sangofluo, kiu daŭras jam nun de antaŭ multe da tempo kondukas ŝin al morto. La virino,do, havas neniun esperon, neniun elirvojon krom la atendo de la morto . La leĝo de Dio priskribas: kiam virino suferas je tiuj kondicoj ŝi estas malpura kaj, kiel ni vidis antaŭe por la leprulo, la nura kiu povus ŝin savi estas Dio, sed la virino, ĝis kiam ŝi estas malpura, ne povas sin turni al Dio, kaj do, tiu virino, eĉ tiu ĉi anonima, kiel la leprulo, simbolas homojn kiuj vivas situacion kiu laŭ la religio kaj la moralo estas sen alirvojoj.

“”Kaj kiu multe suferis pere de multaj kuracistoj elspezante ĉiujn siajn avaĵojn, sen iu ajn avantaĝo, male,plivere malsaniĝante eĉ pli”.

Tiutempe por konsultoj oni alvokis kiel eble plej multe da kuracistoj. La kuracistoj en la Biblio ne ĝuas bonan renomon. En la libro de la Sentencoj oni legas:- la malsano estas longa kaj la kuracisto priridas ĝin. En la Talmudo estas eĉ pli malbone:”La plej bona kuracisto estas inda je la geheno”je la kremaciforno.

Ekaŭdinte paroli pri Jesuo, ŝi eniris la popolamason, ni vidis ke la voĉo de Jesuo disvastiĝas, disvastiĝas amkaŭ la anonco pri tiu ĉi bona novaĵo,ĝi atingas eĉ la

virinon kaj tiu ĉi, freneza faras vere frenezaĵon:”Ŝi eniris inter la homanaso- sed ŝi ne povas, virino, sin turni al la homo de Dio, ŝi, malpura, ne povas sin turni al la sankta homo. Tiam, de malantaŭe, ŝi tuŝas lian mantelon, ĉar ŝi scias ke estas malpermesite al virino en siaj kondicoj tuŝi iun ajn ulon tiom pli rabbin, kiel estis konsiderita Jesuo, ĉar ŝi fariĝos li malpura.

Kial ŝi tion faras?” Ŝi fakte diradis: se mi sukcesos eĉ nur tuŝi Lian mantelon, tiam mi estos savita”.

La leĝo de Dio malpermesas al ŝi tuŝi iun ajn, sed la vivdeziro estas pli forta ol ĉiu morala kaj religia tabuo. Ne ekzistas tiel forta puŝo kiel la vivdeziro, la deziro de feliĉo! Unuvorte: la amo. Estas tio kiu kapablas transpaŝi moralajn kaj religiajn tabuojn.

Cetere, se ŝi daŭrigas observi la leĝon, la virino ne pekas, sed ŝi mortas, se ŝi provas malobei ĝin, ŝi havas esperon je vivo. Do, la virino, kiu havas neniun plian esperon, aŭdacas- plej malbone ol ŝia situacio ne povis okazi al ŝi- do, el malantaŭe ŝi tuŝas Jesuon. Senpere la sangofluo haltis kaj ŝi sentis en sia korpo ke ŝi resaniĝis el la turmenta malsano. La efiko de la ago estas senpera. La kontakto kun la mantelo de Jesuo,- tio estas la aliĝo la fido al Jesuo, disrompante la baron de la leĝo ŝin kuracas- (ĉar ŝi kuraĝis malobei la leĝon). Kiel senpere ŝi estis kuracita, “senpere Jesuo konsciiĝinte je la forto kiu eliris el ŝi, sin turnis al la homamaso dirante: kiu tuŝis mian mantelon?” Jesuo kuracis senvole, sed ne senkonscie. Jesuo estas portanto de vivo je ĉies dispono kaj la minimuma fidkontakto kun Jesuo komunikas la vivon. Aŭdu nun la reagon de iliaj disĉiploj: ili lin konsideras frenezulon. La disĉiploj diras:”vi vidas la omamason kiu kunpremiĝas cirkaŭ vi kaj vi diras: kiu min tuŝis?” La akuzo de la evangeliisto estas tre grava: la disĉiploj **ne sekvas** Jesuon, ili **akompanas lin**. Kia estas la diverseco? Sekvi Jesuon signifas akcepti Jesuon kiel modelon de konduto kaj lian mesaĝon kiel vivofonton. Ili ne sekvas Jesuon, ili Lin akompanas: jen kial ili estas apud Li, Lin tuŝas, sed ili ne sensas tiun dian vivofluon, tiun energion kiu travidiĝas el Li. Tiu estas la risko por la religiuloj, por la homoj tiom ensorbitaj en la sanktaĵo: ili tiom al kutimiĝas al sakraĵo kiu sensensigas ĝin.

Jen kial kiam Dio devas interveni en la historion Li evitas religiajn lokojn kaj homojn, ĉar Li scias ke ili estas sensensaj kaj malamikaj al Li.

“Li rigardadis cirkaŭe por vidi tiun inon kiu faris tion...”

Marko atentigas pri la konscio de Jesuo asertante ke Li ne serĉas iun ajn homon, sed tiun inon kiu Lin tuŝis.

Tiam la virino timema kaj tremblanta, ĉar ŝi konscias ke ŝin atendas puno; iu virino kun tiu venerea malsano kiu iras tuŝi viron, tiom pli ke tiu viro havas sanktecan renomon, renomon de Rabbi, de profeto de Dio, malpurigis Lin kaj kiel tia ŝi meritas punon( ekestis eĉ mortopuno por la virino kiu vole en tiuj kondicoj infektis iun) kaj, do, tiam “la virino timema kaj tremblanta, sciante kio okazis al ŝi venis, sin ĵetis antaŭ Li kaj diris al Li la tutan veron”.

La virino faris teruran malsaĝaĵon kaj nun ŝi atendas la publikan umiligon kaj la punon, sed ĉio tio ne forportos de ŝi la ĝojon esti finfine resaniĝinta kaj renaskiĝinta kaj tiel ŝi konfesas la malobeon kaj sin kuraĝigas kaj Li diris al ŝi.... (Se Jesuo

estintus religiulo, vidante la virinon kiu lin tuŝis kaj do, laŭleĝe kontaĝis al li ŝian malpurecon, li devintus fari al ŝi riproĉegon: vi fia virinaĉo kun tiu malsano, vi kuraĝis tuŝi min, la Difilo, sed kiel vi permesis al vi tion fari?).

Jesuo kiu, bonŝnce estis nek piulo nek religiulo, diris al ŝi: "filino".

La esprimo de Jesuo plenas per korinklino. Jesuo nomas filinon tiun ĉi virinon malproksima al Dio kaj tio kio vidalvide de la religio estis malpiaĵo, malobeco, vidalvide de Jesuo estas fidesprimo. **"Filino via fido vin savis"**.

En la evangelio laŭ Mateo, Jesuo eĉ diras: "Kuraĝu" tio estas: "kion vi atendis" "Sed mi ne povis ĉar la religio asertadis ke mi ne povis alproksimiĝi al vi".

Kiam la homoj, kiuj estas flankenmetitaj de Dio je la nomo de la religio, kuraĝas rompi tiun tabuon, kiam ili kuraĝas malobservi malpermesojn kaj antaŭjuĝojn kaj ili alproksimiĝas al la Sinjoro, ili ne nur renkontas neniujn ajn minacojn nek punojn, sed ili trovas la Sinjoron kiu diras al ili: "Jam estis tempo! Ekde kiom da tempo mi atendis vin, kuraĝu!" "Mi sakrilegiis" Ne, tiu estas fido". Kio por la religio estas malobeco, por Jesuo estas fida ago kaj Jesuo finas dirante: "Iru en paco", tio estas "daŭrigu en la pleneco de la ĝojo kaj estu resaniĝita de via malsano". Unu fojon kiam la virino spertis la resaniĝon fare de Jesuo, ŝi ne estas invitita eniri la templon por oferedoni la fiksitajn dankoferojn sed ŝi estas invitita iri en paco. Oni ne plu bezonas oferi ion al Dio ĉar estas Dio kiu sin oferdonas al la homoj.

### **Demandoj:**

\_ Tiu estas serena kaj liberiga vido. Kiel ĝin akordigi kun la aserto de la pasintdimanĉa Evangelio laŭ Johano.20: kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estas pardonitaj; kies vi retenos, ili estas retenitaj:"

### **Maggi:**

Jesuo aperas al la disĉiploj, kiuj estas enfermitaj pro timo finiĝi kiel Li, Li ne riproĉas ilin, Li invitas ilin al pleneco de paco, Li elspiras sur ilin tio estas Li komunikas al ili sian vivenergion kaj diras tiun frazon: Al kiu vi **pardonos**(formetos) la pekojn..."Oni devas vidi kion oni intencas diri per la vorto pekoj.

En la greka lingvo estas eĉ 10 vortoj kiu enhavas la malsamajn nuancojn de la vorto peko.

Tiu vorto uzata de la evangeliisto ne indikas la homajn kulpojn, sed maljustan vivdirekton.

En la evangelioj oni tre bone distingas la du vortojn:

- Antaŭ la renkonto kun Jesuo ekzistas tiu kiu propredirite oni nomas pekon, kiu estas maljusta vivdirekto.

- Kiam oni renkontas unuafoje Jesuon kaj oni alimaniere direktas sian vivon mem, tiu peko estas tute formetita.

Poste, kompreneble, per niaj limoj, per niaj malperfektaĵoj, ni ankoraŭ ne havas la kapablon ami kiel Dio amas nin, do ni pekas, ni eraras kaj kulpas; ĉio estas formetita laŭmezure ke ni kapablas pardoni alies kulpojn kaj erarojn.

Do tiu distingo devas esti klara:- la peko, en la evangelioj ekzistas ĉiam antaŭ la renkontiĝo kun Jesuo.

Post la renkontiĝo kun Jesuo oni ne plu parolas pri peko, ĉar la peko estis malĝusta orientiĝo de la vivo, “mi vivis por mi mem” kaj mi estis detruiginta, mi ne komprenis ke mi realiĝas kiam mi vivas por la aliaj”. Ekde kiam mi direktas alimaniere mian vivon:”mi vivas por la aliaj”, ne plu aperas la pekon sed la aliajn vortojn.

Tiam la vorto uzata ĉi tie de la evangeliisto estas, se iu volas min sekvi, , en la greka lingvo, **”amantia”** kiu signifas malĝustan vivo-direkton.

Kion estas diranta Jesuo? Jesuo ne estas donanta povon al sia komunumo, sed Li estas donanta grandegan respondecon al ĝi. Li “Lumo de la mondo” invitis la siajn esti disvastigantoj de tiu lumo; la lumo kiu venis en la mallumon. Tiu Lumo devas disversiĝi. Kiuj vivas en la peko, tio estas en malĝusta vivo-direkto kaj eniras sub la haloo de tiu lumo, ili la malĝustan kaj pekan pasintecon tute havas forviŝitan. Kiom da homoj eĉ vidante brili tiun lumon sin kaŝas eĉ plie en la mallumo, ili restas sub la kovraĵo de la peko. Ĉar kiel diris Jesuo en la 3<sup>a</sup> ĉapitro:”Kiu malbonfaras malamas la lumon. Krimulo timas la lumon, la krimulo bezonas mallumon por agi. La bonfaranto estas altirita al la lumo, la malbonfaranto timas la lumon kaj sin kaŝas en la mallumo.

Do, tiu estas respondeco de la komunumo:”Briligu la lumon de la amo de Dio tiel ke vi altiru la homojn kiuj eraris la vivdirekton”.

Kiuj eniras tiun aerfluron, tiun lumfluron havas pasintecon tute pardonitan.

## **Demando**

-Kiel povas homo kiel vi integriĝi en religia ordeno kie la libero estas limigita de la oboe eĉ se libere elektita? mi tion demandas sen polemiko, sed por kompreni la hodiaŭa valideco de tiu institucio ene de la eklezio.

Ĉu tiaj paroladoj oni faros en la seminarioj?

## **Maggi**

Do mi estas frato , frato ĉe la ordeno de la Servistoj de Maria, tiuj al kiuj apartenis Turolfo kaj kiam mi elektis tiun ordenon kaj petis informon, oni min donis tiun belan respondon kiu restis en mia menso: “Tiu estas ordeno kie kelkaj laboras por la Sankta Ofico kaj aliaj laborigas la Sanktan Oficon”. Ĉar estis frato, Patro Gariele Rotondi kiu estis inkviziciisto ĉe la Sankta Ofico kaj Davide Maria Turolfo kiu estis prienketita de la Sankta Ofico.

Bone ĝin mi ŝatis kaj nature mi komprenis ĉe kiu parto esti en tiu Ordeno.

En la Evangelioj Jesuo neniam invitas obej al Li mem kaj eĉ al Dio. Neniam vi trovos en la Evangelioj la invito de Jesuo “obeu al Dio, obeu al mi”. Imagu ĉu li petas obej al la homoj. La patro de Jesuo ne petas obeon, sed petas similecon. Dum la oboe

ĉiam supozas malproksimecon inter kiu ordonas kaj kiu obeas, la simileco forportas tiun malproksimecon. Tiel en la Evangelioj la verbo obei aŭ la vorto obeo aperas nur kvinfoje, neniam rilate la homojn sed ĉiam rilate malutilaĵojn aŭ malamikaĵojn de la socia medio (la vento, la ŝtorma maro, la morusarbo) Do neniam Jesuo petas al ni obei al Dio. Tio povos ŝaini absurdaĵo sed la kristano estas kiu obeas al neniue ne al la Eterna Patro ĉar la Eterna Patro ne petas esti obeita, **sed simili Lin**. Neniam Jesuo diras "Obeu", sed ĉiam li diras: "Estu kiel la Patro via".

Tiam en la demando verŝajne oni aludas la voton pri obeo kiu ekzistas en la religiaj ordenoj, kiu **ne** signifas **submetiĝon** de mia volo al tiu de aliulo, **sed kunlaboron**. Tiu jes ja.

Mi elektis apartan religian familion por ĝin eniri, ĝi donis al mi studeblecojn, viveblecojn kiujn mi ne povintus havi aliloke, kaj do ekzistas kunlabora rilato kun ĉi tiu familio pro kiu mi kunlaboras kun tiu ĉi familio. Mi antaŭmetas la interesojn de tiu ĉi familio al la miaj sed ne en la senco obej kion aliulo diras al mi kredigante min ke tio estas la volo de Dio.

Do, la volo oni komprenas en la senco de kunlaboro, ne de submetado kaj.... Ekde antaŭ pli ol tridek jaroj mi monĥiĝis, ankoraŭ oni ne min forpelis, kaj mi esperas, mi ne diru, duobligi, sed ĉiukaze alveni al fino. Mi min sentas bone, mi min sentas bone en la eklezio kaj de antaŭ iom da tempo mi spektas apartan okazaĵon tio estas ke multaj homoj apartenantaj al protestantaj eklezioj, leginte miajn verkojn, eniras la katolikan eklezion.

Ili kriziĝas, kial? Ĉar legante mian skribaĵon ili diras: "Sed se katoliko estas pli libera ol ni tiam tiom valoras aniĝi al la romkatolika eklezio. Do, miaflanke, mi intencas resti en la familio de la Servistoj de Maria, en la katolika eklezio. Poste, se iam, ĉion estas kalkuleda, oni devus preni piedbaton sur la postaĵo, tio jam estas kalkulita, ne estas surprizo.

## **Demando**

- Ĉu ni faras tiujn paroladojn en la seminarioj, tiuj kiujn vi faras?

## **Maggi**

Sincere mi ne konas kia estas la seminaria medio kaj mi miras ke ankoraŭ ekzistas seminarioj, sed ĉiukaze mi ne konas la medion.

Kutime nun por la generacio kiu lastatempe eniris seminariojn, mi opinias ke ne. Ili estas junuloj vere tre nememfidaj... kiuj vidas la pastrecon kiel signon de povo, de dominado sur la aliuloj (ili estas tre flataĉantaj, vi ilin vidas, tiuj ĉi kiuj tiom ŝatas surhavi tiujn sutanojn, kiuj ŝatas tiujn liturgiaĵojn...) kaj ili ne havas tiun amrilaton kaj tiun servrilaton al la aliaj. Kelkaj... sed, mi ripetas mi ne konas la seminarian medion.

En la medio de la religiuloj, en la medio de la monaĥoj, en la medio de la pastroj tiun paroladon oni sufiĉe ofte faras.

Mi ĵus finis semajnon pri spiritaj ekzercoj antaŭ kelkaj monatoj, ĉe la kapucenaj monaĥoj de la venetia provinco kaj, do, ankaŭ flanke de la pastroj ekzistas deziro je tiu vorto, malsato, deziro je vero.

Necesas ilin kompreni. Dum jarcentoj ili estis edukitaj esti la Gvidantoj de la komunumo kaj nun ili sin trovas esti **servistoj** de la komunumo kaj tio por multaj el ili ne estas facila afero. Estas malsimila orientigo. Ili timas perdi sian dignon kaj male ili ne ekkonscias ke servante la komunumon ili akiras la veran dignon..

## **Demando**

Iom antaŭ vi mi ricevis bonan kristanan romkatolikan edukadon kaj poste mi laŭiris mian vojon: iom post iom danke al renkontiĝoj kun homoj kiel vi kiuj malfermis al mi la okulojn, kiuj min iluminis. Mi pripensis tion dum vi paroladis pri la mirakloj, ĉar por mi estis unu el ŝokaj momentoj tiutempaj, ĉar vidi Jesuon kiu faris tiujn eksterordinarajn, miraklajn aferojn kontraŭnature kaj kontraŭscience estis la maksimumo.

Poste, abrupte por mi tio fariĝis la afero la plej eksterordinara kaj, do, mi diras ĝi ne min krizigis sed pensigis min eĉ multe. Nun mi ĝojas vidi ke estas almenaŭ en vi kaj en multaj aliaj homoj revizio pri tiu rilato inter scienco kaj fido kaj aliflanke mi vidas, tamen, ke Ilia Sankteco, kiun la Sinjoro ĵus alvokis al Si, havis opinion tute malsaman ol la mia kaj kiu influis kaj daŭre influas ne malmulte la kristanan mondon.

Tiam mi demandas al vi ĉu vi povas, ĉu vi deziras aldoni iom pri via opinio rilate tiun interrilatton inter scienco kaj fido, pri la naturo, kio estas tiu naturo? Kiu estas senŝanĝa, kreita de Dio?

## **Maggi**

Estas ĉiam tradukproblemo. Se vi prenas la Biblion de Jeruzalemo, la Biblio de CEI, je la fino de de la edziĝo en Kana kie Jesuo transformas akvon en vinon por pli ol 600 litroj, en la eldono de CEI, tiu malnova, estis skribite: "Kaj tiu estis la unua el la mirakloj faritaj de Jesuo en Galileo. Kiam vi iras vidi la novan eldonon de la Episkopa Itala Comisiono, do ne tiu de iu ajn teologo, vi trovos: Kaj tiu estis la komenco de la **signoj** faritaj de Jesuo".

En la Evangelioj, la evangeliistoj (kaj la evangeliistoj estas gravaj literaturistoj, gravaj teologoj kiuj atente kaj detale uzas la uzendan vorttrezoron) ili evitas uzi por la agoj de Jesuo la vorton "miraklo". Do ni povas diri sen timo je malkonfirmo ke Jesuo faris neniun miraklon.

Kion oni celas dirante miraklon? **Dirante miraklon oni celas diri eksterordinaran agon farita de eksterordinara estaĵo, tiukaze dia, kiu renversas la naturajn leĝojn.** Nu, en la evangelioj por ĉiuj agoj de Jesuo neniam oni uzas la vorton "miraklo", sed oni uzas la vorton "signo", la vorton, "agoj", la vorton "mirindaĵoj", kiujn Jesuo petas al la komunumo daŭrigi fari mem.

En la Evangelio laŭ Johano Jesuo diros”: la agojn kiujn mi faras eĉ vi ilin faros kaj vi faros el ili eĉ pli grandaj”.

Tiam tiu estas la egzegeza ŝlosilo pri la agoj faritaj de Jesuo. Ni prenu kutiman ekzemplon; tiu kiu oni nomas” la multobligon de la panojn kaj de la fiŝoj”. Jesuo kvazaŭ Li estus prestidigitisto el kvin panpecoj kaj du fiŝoj eltiras tiom da manĝaĵo sufuĉa por malsatigi pli ol 5000 homoj. La homamaso aplaŭdas: Kiam okazos la venonta miraklo?

Nu, neniu el ni kiom ajn ni havos da fido povos refari tiun miraklon.

Ĉu vi volas ni provas, ni iras aĉeti kvin panpecojn kaj du meruetojn, ni ilin metas ĉi tie, ni preĝas dum la tuta mokto kaj, morgaŭ matene la pano sekiĝos kaj la fiŝo putras. Mi vin certigas pri tio! Kaj ĉi tie inter ni estas certe iu kiu havas iom da fido.

Jesuo diris : “Se vi havus fidon malgrandan kiel semo da sinapo vi sukcesos fari tiujn agojn”

Mi certigas vin ke se ni prenos kvin panojn kaj du fiŝojn, kaj ni preĝus ĝis morgaŭ, postmorgaŭ, kiom vi volas, ni ne sukcesus multobligi panojn kaj fiŝojn.

Tiam ni demandu nin, sed, ĉu estas tio kion la evangeliisto rakontas al ni? Ĉu Jesuo estas kvazaŭa prestidigitisto, kiu faras tiun eksterordinaran kaj unikan agon? Kaj kian signifon ĝi havas por ni la fakto ke Jesuo multobligis panojn kaj fiŝojn?

Jesuo kial vi ne ilin multobligas eĉ hodiaŭ? Ĉu vi ne ekrimarkis ke estas granda parto de la homaro kiu estas tute mortiĝonta pro malsato?

Ni ne rigardu la alireligianojn kiujn tio ne meritas, sed almenaŭ ni rigardu la kristanojn kiuj diras al Vi: Patro Nia “nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ”. Ĉe ni estas facile, en nia riĉabunda societo diri “donu al ni hodiaŭ nian panon ĉiutagan”. Ni havas abundon el ĝi, sed estas kelkaj homaj regionoj kie la homoj diras”nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ” kaj bum! Oni terenfalas mortigita ĉar oni mortis pro malsato.

Tiam, Mia Eterna Patro, al kio utilis tiu multobligo de la panoj kaj de la fiŝoj se vi ne daŭrigas ankoraŭ ĝin fari?

Tiam estas nia tasko klopodi kompreni en la evangelia epizodo kion celas diri al ni la evangeliisto: estas neniu ago farita de Jesuo kiun la komunumo ne povas fari.

Tiam, nur por resti ene de tiu ĉi epizodo de la panoj kaj fiŝoj, kiam ni legas la evangelion jen atentigo: atentu la titolojn; la titoloj ne apartenas al la verkisto, kutime ili estas metitaj aŭ de la tradukisto aŭ de la eldonisto kaj ĝenerale ili estas elevoĵigaj. La titolo estas grava ĉar min helpas interpreti la tekston.

Fakte estis titolo, kiam mi estis ĉe “la Ecole de Biblique” (BIBLIA LERNEJO) mi petis:” forigu ĝin, ĝi estas ridindaĵo” en la Libro de la Reĝoj oni trovas la titolon:”Du mirakloj de Elizeo”. Oni legas (Elizeo estis kalvulo kaj, kiel ĉiuj senharuloj, li estis iomete facile ofendiĝema) kaj li eniras vilaĝon kie estas areto da knabetoj kiu lin renkontas kaj lin mokus. Ili kantas al li humuran kanton, Elizeo sin turnas malbenas ilin, he, ilin malbenis kaj jam tio povus suffici (mi ne komprenas tiun viron de Dio kiu ne kapablas akcepti ŝercon de knabetoj, nu, li estis kalvulo, sed finfine,,,) li ilin malbenis kaj el la arbaro foriris du ursoj kaj ili mordoŝiris 42 el tiuj knaboj. Tiaj la

mirakloj de Elizeo. Imagu al vi kiam li furioziĝis, kion li faris? Imagu al vi kion faris tiu ulo kiam li furioziĝis, he? Do atentu la titolojn.

Tiam al tiu ĉi evangelia peco kutime oni metas la titolon “la multobligo de la panoj”. La verbo multobligi ne aperas en la teksto kaj eĉ ne aperas la vorto multobligo. Ne temas pri multobligo de pano kaj fiŝoj, sed **temas pri dispartigo je tio kion oni havas por krei abundon**. Estas malfacilaĵo pro kiu ne komprenante la simblan lingvon de la evangeliistoj, interpretante ĝin per niaj okcidentaj kategorioj, ni ne komprenas la figuran lingvon.

Kiam ankaŭ ni uzas la nombrojn en nia lingvaĵo, oftege ni ilin uzas simbole, figure, sed tio estas pro socia konvencio kiun ni komprenas. Kiam mi diras mi iras “promeneti” kion tio signifas? Mi iras fari mallongan pronenadon”. Kiam mi prenas glason, tiu estas el plasto nenio okazas, sed se ĝi estus el vitro kaj mi ĵetus ĝin teren vi jam scias ke li dispeciĝos ...en 1000 ...pecoj sed kial ĉu vi neniam kontis ilin? Mi al vi diras, ne, 980 provu tion. Signifas nur ke 1000 estas kompleta detruo, aŭ... “mi atendas vin de antaŭ unu horo”. Vi renkontas homon kiun vi ne vidas jam de antaŭ longa tempo...”hej antaŭ jarcento ni ne nin revidas!”Ekscesa. Estis nur antaŭ kelkaj monatoj.ktp.

Ni uzas la numerojn per figura lingvo kaj ni scias ke tiel ni estas komprenitaj.

Ĉiuj la numeroj aperantaj en la Biblio havas figuran kaj neniam matematikan valoron:  $5+2=7$ , 5 panoj kaj 2fiŝoj estas 7,kaj 7 signifas ĉion.

Tiam kiu estas la signifo de tiu ĉi epizodo? La homamaso malsatas, kaj la disĉiploj ne komprenis la mesaĝon de Jesuo, Li diras:”Sendu ilin aĉeti”. Kion signifas aĉeti? Kiu havas monon tiu aĉetas, manĝas kaj vivas kaj kiu ne havas monon tiu ne aĉetas, ne manĝas kaj ne vivas. Tiam estas malakordo en tiu ĉi epizodo inter du verboj, dum la disĉiploj, rezonante laŭ tipa socia pensmaniero, uzas la verbon aĉeti. Jesuo diras “donu” ne “aĉeti, “dnu vi mem kion vi havas”.

Kaj kiam ili kunmetas kion ili havas, (la kundivido) kreiĝas la abundon. Ĝis kiam ĉiu el ni tenas por si kion li havas, kreiĝas la maljusteco. Kiam ni kunmetas kion ni havas, tiam kreiĝas abundo; fakte (ĉu vi rememoras kial tiu estas evangelio kie estas tiom da numeroj...kiom da homoj manĝis? “5000”, sed kion Li faris? Ĉu Li ilin nombris? Kial ĝuste 5000 kaj ne 400 ili estis?

5 kaj ĝiaj multobloj ,en la figura lingvo, indikas la agon de la Spirito; ili indikas ke oni ne nur komunikis materian panon sed oni komunikis amon. Kaj ĉu vi rememoras kiom da provizkorboj restis? “12” Nu, tiomaj kiomaj estas la israelaj triboj. Tio estas Jesuo celas diri: se vi kundividas kion vi havas la malsatuloj eksatas, kreiĝas abundo eĉ por satigi la tutan Israelon. Do, tion jes ja! Multobligi panojn kaj fiŝojn, tion fari ni ne sukcesas, sed kundividi kion ni havas por satigi la malsatulojn, tion ni ja povas fari! kaj estas tio kion la Sinjoro atendas.

Do, estas neutile peti de la Sinjoro ke Li multobligu panojn kaj fiŝojn por manĝigi la malsatantajn popolojn. La statistikoj diras ke se nur kion en Italio oni elspezas por maldikigaj dietoj oni uzus por satigi la malsatulolojn kiom da milionoj de homoj ne mortus pro malsato! Ni estas dikventruloj kaj la aliaj estas skeletaj.

Do la invito de Jesuo estas: **kundividi kion ni havas** (kaj tion ni povas fari, ne estas bezonata iu ajn dia energio).

Do, mi rediras, ne estas mirakloj tiuj kiuj al ni montras la evangelioj, sed ili estas signoj kiuj estas tasko por ĉiu el ni efektivigi, kaj atentu, ne nur Jesuo ne faris miraklojn, sed ekde kiam eksistas la homaro neniam estis miraklo surtere. La fakto estas ke ni konfuzas la miraklo kun la resaniĝo. Ili estas du tute malsamaj aferoj.

La **miraklo** estas: mi ne plu havas manon, mi preĝas kaj ĝi reaperas. Neniam okazita miraklo.

**Resaniĝo:** mi havas kuntiritan manon, en certaj okazoj je emociemo kaj preĝo. en ĉiuj religioj, mia mano resaniĝas.

Do resaniĝoj jes, kaj ili eblas, sed la mirakloj ne!

**parolado de kuracisto** ....Al Lurdo okazas resaniĝoj.... vere miraklaj, dokumentitaj kiel miraklaj, tio estas mortigaj kanceraj tute tuj resaniĝintaj. La scienco tute ne povas tion ekspliki... patro Maggi!

Tio... mi ĉion komprenas, sed vi ne povas diri tiajn aferojn, paciencu.

-“ Sed vi estas parolanta pri resaniĝoj, sendube resaniĝoj. Kiu pridubas tion”?

“Resaniĝoj kiuj absolute ne estas science eksplikeblaj”.

- Nu, bone ĉiam resaniĝoj”

Gravegaj malsanoj- “jes, jes ja- absolute mortigaj, ĉe homoj je la fino de ilia vivo kiuj tuj tuje resaniĝas- “jes, jes ja”- ili resaniĝas tio signifas dum tre mallonga tempo. vi komprenas ke tio ne estis...

## **Maggi**

- Sed tio ne estas nur specialaĵo el Lurdo aŭ de katolikismo. Tio ekzistas en ĉiuj religioj: eksistas lokoj kie okazas resaniĝoj, tiaj kiaj okazas en Lurdo. Mii ne scias en kiu Afrika lando, ekzistas baobabo kie resaniĝas la ostrompiĝoj. La rompoj, la ostrompiĝoj, oni metas tiujn uluojn sub tiu baobabo kaj la rompiĝo reunuiĝas. Mi ne estas pridubanta la resaniĝojn, mi tion rediras;.... mi profunde kredas je la resaniĝoj de Lurdo ĉar en la individuo povas disvolviĝi tia vivenergio kiu ŝtopas kaj eĉ nuligas la malsanon kiun li enhavas. Mi ne pridubas tion. Tamen atentu, atentu, bonvolu rememori ke erara imago de Dio povas kaŭzi ateismon. Atentu vidi en tio la dian agadon kiu tiam tuj estiĝas la demando” kial al tiu homo kaj ne al alia?”... “Ha.... La planoj de Dio estas nekompreneblaj! Apud mia loĝloko troviĝas la sanktejo de Loreto. Antaŭ du jaroj maljunulino 95 jaraĝa leviĝis de rulseĝo. “Miraklo, la Madono faris la miraklon” tiam mi diris “Ho mia Virgulineto ĉar vi devis fari miraklon, kiajn vi faras tiom malofte, ĉu ne li taŭgis paralizitan knabineton 2-3 jaraĝan? Tiu ĉi virino jam estas 95jaraĝa! Finfine....nun jam... ŝi vivis sian vivon, ŝi povis ja resti sur rulseĝo.... se Vi fuŝuzis tiun ĉi miraklon por 3jaraĝa knabineto verŝajne ĝi estintus pli taŭga.

Necesas esti atentaj kiam oni parolas pri mirakloj fare de Dio, ĉar fuŝa bildo pri Dio ne nur ne produktas la fidon, sed eĉ produktas la forrifuzon kontraŭ Dio.

Mi ne pridubas ke en apartaj kazoj de granda religia emociiĝo, de preĝegado, povas esti en iuj homoj vivenergiojn kiuj, mi rediras, ne nur haltas la malsanon, sed eĉ povas ĝin forpuŝi. Do mi tion ĉi tute ne pridubas, sed ni ne preparolu miraklon.

Mi ne multe estas dokumentita pri Lurdo sed mi opinias ke en Lurdo neniuj membroj reaperis, membroj kiuj estas resaniĝintaj, jes, sed ke aliu homo manka je mano tiu mano denove kreskis, mi opinias ke eĉ en Lurdo tio ne okazas.

## **Demandoj**

- Kiel vi kuntekstas la resurekton de Lazaro?

## **Maggi**

- Per la vorto **resurekto** oni aludas pri la traŭso de mortala vivo al alia senmorta vivo. Tiam la tri resurektoj plenumitaj de Jesuo en la Evangelio ne povas nomiĝi resurektoj, sed, eventuale, ili povas nomiĝi reanimadoj de kadavroj.

La ununura kiu resurektis, diras Paŭlo, estas Kristo, ĉar Li resurektinta ne plu mortas, krom se oni ne opinias ke la filino de Ĝajro kaj la filo de la vidvino el Naino kaj Lazaro vivas kaj viglas ie ajn.

Do, pro terminologio oni ne povas paroli pri resurekto. Tiam klaras ke per resurekto oni celas la transiron de mortala al senmorta vivo. Kaj la ununura kiu estas en tiu lasta vivo estas Jesuo.

Temas pri reanimado de kadavroj.

Tiam la unua: tiu de la filino de Ĝajro estis facila, ŝi estis tuj mortinta. La dua: tiu de la filo de la vidvino e Naino estis iom pli malfacila, ĉar jam oni estis ĉe la funebra ceremonio.

Tiu de Lazaro estis malfacilega, li jam de antaŭ 4 tagoj estis en la ĉerko, t.e. jam komenciĝis la putradprocezo. Kaj Jesuo revivigas lin. Kial? Se ni kredas, kaj ĉi tie la katolika kredo invitas nin kredi je tio, ke kiam ni transpasas la sojlon de la morto, tiam ni eniras dimension kies belecon, plenecon, tutecon ni ne povas priskribi per vortoj, sed tiam ĉu Jesuo faris al Lazaro komplezon teviviginte lin?

Lazaro jam troviĝas en la pleno de la dia vivkondiĉo, li jam estas en la pleno de la beateco kaj, se vi volas, de la kontemplado de Dio kaj Jesuo lin revokas surtere por... (mi ne scias ĉu vi konas “la vivo de Jesuo” de Saramago, portugala nobelpremiito, kiam Jesuo estas reviviganta Lazaron estas Marta la fratino kiu malebligas tion al Li kaj diras” ne, Sinjoro, ĉar neniuj en sia vivo tiom pekis por esti devigata morti dufoje”) Ĉu Jesuo komplezis Lazaron? Li revokas lin al vivo kaj tiu viro vivas kun la inkubo devi denove traŭsi la mortpasadon!...

Ĉu Li tion faris por ĝojigi la du fratinojn? Kaj....finfine... io ŝajnas al mi iom stranga. Kaj plue, se Jesuo havis tiun eblon revivigi la kadavrojn, benita viro. vi tion faris iom malofte: nur tri fojojn dum la tuta vivo. Almenaŭ en la okazo de Lazaro mi estos reviviginta la mortintojn en la sama vico, ĉu ne? Unu... Se Jesuo povis revivigi

lakadavrojn, kial Li ne ĝin faris plue? Do, vi vidas ke temas pri laŭlitera legado de la teksto, estas pli gravaj la problemoj de ĝi kaŭzitaj ol tiuj de ĝi solvitaj..

Tiam, mallonge, sed vere mallonge, do en neperfekta maniero (eventuale, vi trovos en libroj tiun ĉi epizodon bone klarigitan) **tiu de Lazaro ne estas kronikaĵo, sed ĝi estas vero je fido. Ĝi estas ŝanĝo de pensmaniero fare de la komunumo rilate la morton kaj resurekton.**

Ni vidu nur la finajn momentojn de tiu drameca rakonto. Jesuo diras “kie vi metis lin? Estas vi kiuj metis lin ie ajn. Ili metis lin en tombon kun ŝtono supremetita.

La tombo simbolis la regnon de la mortintoj: entombiĝi signifis ke ĉio finis.(la esprimo kiun ni uzas en la itala”mettiamoci una pietra sopra” (ni metu ĝin en la kesto de forgeso) referenciĝas al tiuj ĉi funebraj kutimoj) Ni enterigu ĝin signifas ke ĉio finis por ĉiam..

Tiam Jesuo unue diras” forprenu la ŝtonon. Estas vi kiuj metis lin tie ĉi malebligante al li la komunikadon kun la mondo de la vivantoj, forprenu la ŝtonon” kaj poste Jesuo vokas Lazaron, sed ne foriras Lazaro. Se vi iras vidi Jesuo diras:”Lazaro foriru” Lazaro ne foriras. Foriras la mortinto.

Kial Jesuo vokas Lazaron, sed ne foriras Lazaro kaj foriras la mortinto?

Estas la komunumo kiu devas ŝanĝi pensanieron rilate la morton kaj kiam la mortinto foriras, kiel li foriras?... Kun la manoj kaj la piedoj ligitaj per vundoj kiu ne estis la funebra ĵuda kutimo. Oni envolvis la homon en mortotuko. Tiu estas la simbolo de la mortoligiloj.

Estas la komunumo kiu ankoraŭ ne komprenis la novaĵon de la vivo portita de Jesuo kaj daŭrigas priplori la mortintojn kiel ilin priploras la Ĵudoj.

Tiam Jesuo ordonas:”malligu lin”kaj la fina peto kiu ŝajnas al mi tiel klara( nun imagu al vi esti antaŭ la resurekto de la karulo, de kiu vi perdis lastatempe. Kia povus esti la peto de Jesuo?” malligu lin, kaj lin brakumu, ni akceptu lin, ni venigu lin). La lastaj vortoj de Jesuo: **“lasu lin iri”**.

Ili estas enigmaj vortoj. Sed kien li devas iri? Nu, oni diras, li devas iri preni iom da aero ĉar li putradis, alikaze poste li iom putros. Kien devas iri Lazaro? “Lasu lin iri”.

La evangeliisto uzas la saman vorton kiun Jesuo uzis por indiki sian iradon al la Patro. “Lasu lin iri, tio estas lasu lin daŭrigi sian vivon en la sfero de la Patro”.

Do, kion celas diri la evangeliisto? La rakonto de revivigo de kadavro? (oni rajtas kredi je tio. Mi ne volas forpreni tion de vi), aŭ, pli vere, la ŝanĝo de pensmaniero fare de la kristana komunumo rilate la morton? Ke ili ne plu priploru la morton kiel ĝin priploras la Ĵudojn kiuj....( vi vidu kiam mortas ĉe ni homon, se oni venas nin konsoli dirante” li resurektos”, ne nur oni ne nin konsolas sed oni nin ĵetas en la plej profundan malesperon).

Kiam li resurektos? Ĉu morgaŭ? Ne! li resurektos ĉe la tempofino. Tiam tio ne min interesas. Al mi hodiaŭ mankas la karulo, hodiaŭ mi priploras la homon kiun mi amis, brakumis, karesis. Ke li resurektos je la tempofino tio ne min interesas ĉar tiutempe ankaŭ mi estos mortrigida kaj resurektinta.

Do Jesuo ŝanĝigas la pensmanieron rilate la morton kaj resurekton.

Oni ne plu devas priplori la mortinton kiel kadavron kiu estos en regno de la mortintoj ĝis la tempofino sed oni devas pripensi lin kiel vivantan.

Jen kiel Jesuo diras al Marta” Mi vin certigas: kiu kredas eĉ se li mortas li vivos.

“Do vi kiuj priploras kadavron daŭrigu kredi ke li daŭre ekzistas kaj kiu vivas kaj kredas je Mi li nenuam mortos”. Tiu estas la ŝango de pensmaniero rilate la morton.

Do ne temis pri Lazaro kiu devis esti liberigita. Lazaro jam estis en la sfero de la Partro. Li estas la mortinto. **Ĝis kiam ni priploras niajn karulojn kiel mortintajn, ni ne sukcesas ilin sperti kiel vivantaj.**

Tiom ĝi veras ke la virinoj kiam ili iras al la tombo de Jesuo ili trovas la straton baritan de du uloj kiuj diras al ili:”Kial vi serĉas inter la mortintoj tiun kiu vivas ?.

Ĝis kiam ni priploras ilin kiel mortintojn ni ne perceptas ke ili vivas.

Tio estis tiom komprenita ĉe la kristana komunumo ke S. Paŭlo eĉ asertas”Ni kiuj jam resurektis”

La kredantoj ne opiniis ke ili estos resurektintaj post la morto, sed ili opiniis ke ili havis tian vivkvaliton kiu kapablos superi la morton.

Tiam la epizodo pri Lazaro, se vi tion volas, estas propono (Kiu sentas ĝin responda al siaj bezonoj tiu ĝin prenu kaj kiu sin sentas malserena tiu restu kun sia bildo, tamen li pripensu ĝin iomete). **Ĝi ne estas reaniado de kadavro, sed ŝanĝo de pensmaniero.**

Oni ne devas priplori Lazaron kiel mortinta, sed lin akcepti kiel vivantan en la komunumo. Jen “lasu lin iri”. Lasu ke li plivojaĝu en la ekzistado de la Patro. Ĝis kiam ni priploras niajn mortintojn ni ne sukcesas ilin sperti kiel vivantaj kaj vivigantaj.

## **Dimanĉo la 10<sup>a</sup> de Aprilo 2005<sup>a</sup>**

Estas interesa la fakto ke Jesuo diris”vi neniun nomu “Patron”, neniun “Majstron””- En la religiaj ordenoj ni nomas ‘ patron’ kaj majstron’ la edukisto de la novicoj.Tio estas vera absurdaĵo!)

Nu, bonan dimanĉon, bonvenon al ĉiuj. Ni havas belan intensan matenon kun belega peco de la Evangelio( sed ĉiuj estas belaj) kaj, do, ni daŭrigas vidi tiun novaĵon kiun Jesuo alportis en la religia panoramo. Novaĵo kiu kostos la vivon al Jesuo. Kial?

Jesuo estis atendita kaj estas akceptita kiel religian reformanton. Tiutempe oni esperis senditon de Dio, la faman Mesion, kiu venu reformi religiajn instituciojn, kiuj koruptiĝis. La templo fariĝis bazaro kaj do la Mesio devintus purigi la templon. La leĝo fariĝis galimatia kie oni nenion plu komprenis, tiam la Mesio devintus observigi la leĝon, ĝin ekspliki kaj doni ĝustan interpreton el ĝi. La sacerdotoj estis ĉiuj malhonestaj, aparte la ĉefsacerdotoj, tiam purigado de la sacerdotaro kaj tiel plu.

Nu, Jesuo estis forlasita de ĉiuj, li estis perfidita de ĉiuj kiam ili komprenis ke li ne venis por reformi la religiajn instituciojn, sed por ilin forigi. Kiel povis Jesuo tion fari?

Vidu Jesuo ne estas profeto kaj li eĉ ne estas religia geniulo. La profeto, la religia geniulo estas la homo kiu sin movas ĉiam en la religispaco: per siaj kapabloj esti en

aparta agordo kun la ĉiam nova Dio, li montras la dian volon en nova maniero kiu, normale, neniam estas komprenata, nek akceptata, sed ĉiam kontraŭata en la religiaj limoj. Tiam la profetoj sin movis en la kadro de la kult reformo, de la leĝreformo de la reformo de la templo. Jesuo ne! Jesuo estas la homo-Dio. Li estas la homo kiu atinginte la plenton de la homeco atingis la dian kondiĉon. Li estas tiu homo kiu diras:” **Dio neniun neniam Lin vidis, nur Jesuo estis Lia klarigo**”, kiel ni vidis en la Evangelio laŭ Johano, en la Prologo. Li estas la homo kiu havas la dian kondiĉon kaj li mem sin metis for de la religio. Kaj pro tio li havis la kapablon elradikigi la religion kaj montri ĝian marĉon.

Kion oni opiniis ebligi la komunio kun Dio, tion Jesuo montras ke ĝin malpermesas: Tio troas!

Kontraŭ Li eksplodas la mortiga malamo, jam ene de sia familio (Jesuo estos kaptita. Klopodo de kapto flanke de sia familia klano ĉar ili diras ke li estas freneza) la denunco flanke de la sacerdotaro (ili diras ke Jesuo estas blasfemulo, kaj herezulo, ili diras ke li estas demonhava) kaj kontraŭ li ĉiuj sociaj fortoj ribelas. Kial? La Dio kiun Jesuo prezentis, tiu Dio-amo, kiun ni estas klopodantaj dum ĉi tagoj kompreni sub kelkaj vidpunktoj, ĝuste Li estis tute malsama ol la Dio de la religio. La Dio de la religio baziĝas sur la povo kiu forprenas de la homoj la liberon (tiu estas temo kiun ni plurfoje pritraktis) tamen ĝi donas al ili tiom da sekureco.

Jesuo prezentis ne dominantan Dion, sed Dion servantan! Kaj Dio servanta timigas.

Tiam ĉiuj la sociaj kadroj kiuj iamaniere ligiĝas al la povo, estas sensensaj kaj malamikaj al la mesaĝo de Jesuo.

Jesuo kaj la evangeliistoj identigas en tri medioj de la societo la malamon al ĝi. Ĝi estas tute ligita al povo:

- ĉiuj kiuj **tenas** la povon kaj tio klaras ĉar Jesuo estas kontraŭ la povo. Jesuo estas servo.

- ĉiuj kiuj **ambicias** al povo.

- Sed la plej grava medio estas la tria: kiuj **estas subigitaj** kiuj akceptas esti subigitaj al la povo. Ili vidas en Jesuo atencon al sia sekureco.

Pruvo estas ke Jesuo estos forlasita de granda nombro el siaj disĉiploj kaj je la kapto unuiĝos ĉiuj politikaj kaj religiaj fortoj ĉar Jesuo estas danĝera homo.

Ni tion vidis dum tiuj ĉi renkontiĝoj, la danĝero de Jesuo kuŝas en tio ke Li **proponis tute novan rilaton de la homoj kun Dio, tiu bazita ne sur la observado de Siaj leĝoj, sed tiu bazita sur la akcepto kaj sur la praktikado de iu amo simila al la Sia kaj super ĉio Jesuo prezentis Dion tute kiel Amon.**

Sed se Dio ne plu rekompencas la bonulojn kaj ne plu punkorektas la malbonulojn, do, ne plu ekzistas religio!

Nu, danke al Jesuo la religio finis kaj komencas la Fido.

Tiam en la Evangelioj ni rimarkas serion da kreskantaj atakoj kontraŭ Jesuo. Ĉi matene ni vidos la respondon de Jesuo kontraŭ la atako kiu faras al Li la skribistoj kaj la fariseoj kiuj dekomence vidis simpatie Jesuon; ili opiniis ke Jesuo estis reformaciisto kaj ili opiniis povi lin meti en iliaj rangoj, sed kiam ili ekkonscias ke Jesuo vivas multe da lumjaroj for de ili, kreiĝas granda malamikeco al Jesuo.

La malamikeco pri kiu ni parolas ĉi matene estas la sinteno de Jesuo al pekuloj. Per la vorto pekuloj en la Evangelio oni celas vastan variecon da signifoj: ĉiuj kiuj ne vivas laŭ la leĝo, kiuj ne povas vivi laŭ a leĝo, la malpiuloj, la paganoj. Tiuj ĉi devas esti ĉiuj inkluzivitaj sub la nomo de pekuloj.

Nu, Jesuo havas sintenon al la pekuloj kiu skandalas kaj perpleksigas, ĉar, kiel ni jam vidis dum ĉi tiuj tagoj, ekzistas tuta tradicio kiu prezentis Dion kiel malamikon de la pekuloj, Dion pretan ekstermi la pekulojn, Dion, kiu eĉ malamis la pekulojn.

Jesuo plena manifestado de la dieco ne nur akceptas la pekulojn, sed jen la krimo kiun li faras kaj estas la denunco faritan de la skribistoj kaj fariseoj, **li akceptas la pekulojn kaj manĝas kun ili.**

En Oriento, en la palestina medio la tagmanĝon oni servis sur ununura granda pleto en kiu ĉiuj trempis. Ĉar la pekulo estis malpura ekde kiam li metis sian manon en la pleto, la tuta pleto infektigis. Sekve kiu manĝis kun pekulo tiu infektigis per lia malpureco. Tio laŭ la religia vido.

Do Jesuo kaj Siaj disĉiploj estas malpuraj, kial? Ĉar vi manĝas kun la pekuloj kaj vi infektigas per ilia malpureco.

Ili ne komprenas ke: **ne la malpureco de la pekuloj falas sur Jesuo sed la pureco de Jesuo falas sur la pekuloj.**

Hodiaŭ ni konkludos, per eŭkaristia celebrado (por kiuj volos, sed mi invitus ĉiujn), tiu ne estas la tagmanĝo de la ĵustuloj, sed estas la tagmanĝo de la pekuloj, kaj oni ne devas esti pura por akcepti la Sinjoron, sed eufiĉas ke oni akceptu la Sinjoron por esti pura trempante ĉiuj en la sama pleto. **Ne la malpureco de la pekuloj falas sur Jesuo, sed la pureco de Jesuo falas sur la pekuloj.**

Sed skribistoj kaj fariseoj, religiaj homoj, vidas ĉion laŭ la misforma vidpunkto de la religio, ili vidas la pekon kie estas la vivo.

Tiam Jesuo ĝuste al skribistoj kaj al fariseoj, pere de parabolo, klarigas la sintenon de Dio. Dio, neniam iu ajn vidis Lin, nur Jesuo estis Ilia klarigo. En tiu parabolo, konata per la nomo: “La parabolo pri la erarinta filo”, Jesuo klarigas al mi kia estas la sinteno de Dio fronte al la pekanta homo.

En ĉiuj religioj estas ritaro kiu estas trudata al pekulo por ricevi la pardonon de Dio, tiuj estas ritoj kiuj ne solvas la problemon. Mi opinias ke se ekzistis krizo pri la sakramento de la konfeso tio okazis ĉar ĝi fariĝis senutila kaj ripetema sakramento. Vi iris al la pastro kun via kulpolisto kaj la postan monaton vi revenis al li kun la sama listo. Tio estas ĝi ne vin ŝanĝigis profunde.

Kie mi vivas en Montefano, kampara vilaĝeto, estas maljunulo pli ol dekokjaraĝa. Kiam li venas sin konfesi li diras al mi “Pardonu min Patro Alberto, la sama afero”. Estas jam preskaŭ vivon ke li havas ĉiam la samajn kulpojn kaj mi diras al li “Rumuà”(formovita), la samon”. Estas treege mallonga konfeso.

Aŭ estas la zorgema maljunulino, ĉar ŝi timas ne konfesi eksakte ĉiujn kulpojn, kiu venas al mi por sin konfesi kaj diras: “Patro Alberto mi konfesas ĉiujn pekajn kulpojn mi faris kaj eĉ ĉiujn kulpojn mi ne faris” Oni neniam povas scii, estas ĉiam plej bone resti trankvila! Ĉar Dio estas tre preciza pro tio ŝi en sia zorgemo, konfesas ĉiujn pekajn kulpojn ŝi faris sed eĉ ĉiujn kulpojn ŝi ne faris.

Tiam mi opinias la krizo, la krizo pri la sakramento de la kinfeso tio estis pro ĝia miskompreno.

La graco donita de la sakramento nomiĝas transdono de vivenergio. Kial tiu vivenergio daŭras nur malmulte da tempo en la homo?

Kelkaj homoj eĉ opinias esti kiel ladskatoleto el tomata saŭco, ili havas limstampon “ekde antaŭ unu monato mi ne min konfesas”. “Manĝota antaŭ tiu tago”. La dia graco vaporiĝis.

Jen, do, en tiu tre grava biblia peco, (tiu peco kiu estas ĉe la bazo de tiu ĉi sakramento) oni vidos kiu estas la sinteno de la Sinjoro. Kaj se ĝi estas plene travivata, ni vidos ke tiu vivodono profunde engravuriĝas en la individuo, interne lin transformigas kaj ŝanĝas sian eksistadon.

Do, ni troviĝas al la ĉap.15, de la 11<sup>o</sup> ĝis la 32<sup>o</sup> versego, la parabolo ne direktiĝas al la disĉiploj, sed ĝi direktiĝas ĝuste al la religiuloj. Tiu parabolo direktiĝas al kiuj ŝokiĝas pro la sinteno kiun Jesuo havas al la pekuloj, ĉar la pekulojn oni devas riproĉi, distancigi kaj ĉefe ilin ekskludi el la Templo el la agadkampo de Dio. Jesuo kiu manĝas kun la pekuloj, kiu komunikas sian vivon mem al la pekuloj estas neeltenebla.

Do, tiu parabolo direktiĝas a la religiuloj ĝi ne estas parolado por la kominumo de la disĉiploj, eĉ se ĝi interesas nin ĉar en ĝi ni malkovras kiu estas la rilato de la aspekto de Dio, jen tiu parabolo: Lc. ĉap. 15, 11- “Kaj li diris: Unu viro havis du filojn; kaj la pli juna diris al sia patro: Patro, donu al mi la heredotan parton de la havo. Kaj li dividis inter ili siajn vivrimedojn.

Estas grava la indiko kiun la evangeliisto donas al ni; la pli juna el tiuj filoj ne atendas ke la patro mortos sed jam dum la patro ankoraŭ vivas li postulas sian parton de la heredaĵo. Postulante la anticipaĵon de la heredota parto, li konscias ke li ricevos malpli ol kiom estos atendota sed li volas ĉion tuj. Por li la patro jam mortis, kion al li interesas estas la mono. Nu, la Patro kiu respektas la volon de la filo, eĉ se tiu kontraŭas sian volon, li respektas la decidon kaj, grava noto de la evangeliisto, li dividis inter ili siajn vivrimedojn

Do la patro havas 2 filojn, li dividas la vivrimedojn inter la 2 filoj. Sekve unu parton li donas al la filo kiu ĝin petis, sed la alia jam lin donas al la alia filo, al la pli aĝa.

Kaj post ne multaj tagoj la pli juna, kolektinte ĉion, (kio signifas ke tiu filo ricevis sian heredaĵon en kampoj kaj domoj; li kolektinte ĉion, ĉion li transformis en monon, en kontantan monon) la pli juna filo forvojaĝis al malproksima lando (tiu esprimo en la Biblio ĉiam indikas la pagana lando)..

Sekve li ne nur forlasas la Patron sed li forlasas ankaŭ sian Dion por iri en aliaj, paganaj, landoj kie. (kaj tie ĉi li montras ke li estas stultulo) kaj tie li disperdis sian havon per diboĉa vivado. Tioma la urĝo havi la heredaĵon kioma la urĝon per kiu li ĝin disipis.

Do, la tuta posedaĵo kiun li heredis li disperdis per diboĉa vivado. Dum en sia hejmo li povis kolekti, en fremda lando li nur kapablas ĉion fordiboĉi

Kaj kiam li jam elspezis ĉion, forta malsato okazis en tiu lando, kaj li komencis havi mankon

Luko estas la evangeliisto kiu estas la pli.severa ol la aliaj fronte al la amasiĝo de la havaĵoj.

Estas li kiu sekvigas la beatecanoncoj de Jesuo...( estas nur mallonga mencio: ĉar ni priparolis kiom da interpretaderaroj estis faritaj rilate la evangelian tekston kaj kiu ili kondukis al rifuzo rilate la mesaĝon de Jesuo. Bonvolu pripensi vi ĉiuj la beatanoncojn: ili estas 8 fojojn invito al feliĉo. Nu, mi, dum mia vivosperto, (la beatanoncoj estas la fondon de la kristana komunumo) kiam mi demandas al iu granda amaso da kunvenintaj personoj kiomaj estas la ordonoj de Moseo, ĉiuj scias ke ili estas dek. Se mi demandas kiaj ili estas, iom da konfuziĝo kreigās, ĉar oni konfuzas la sesa kun la sepa,ciukaze la dek venas, ili alvenas. Sed kiam oni demandas al la homoj:” kiomaj estas la beatecanoncoj faritaj de Jesuo? “jam estiĝas malfacilaĵo kaj se oni demandas kiaj ili estas estiĝas tuta malklariĝo.

La unua, la plej malsimpatia , ĉiuj ĝin rememoras” feliĉaj estas la povruloj, la aliaj beatanoncoj estas la misfortunoj de la homaro.” Feliĉaj estas la malbonŝancaj, “feliĉa kiu ploras”. Sed, ĉu eblas ke Jesuo, sed eblas ke tiu Jesuo nomiĝu beatanoncoj tiuj kiuj normala homo, rezonanta per sia cerbo,opinias misfortunoj kiujn li esperas neniam okazintajn dum la tuta vivo...?

Kaj tio jes ja kondukis al rifuzo de ilia anonco.

Jesuo kiu deklaras feliĉajn la povrulojn, la malbonŝanculojn de la tero estas kiel marsano, li estas iu kiu ne scias kion signifas la malriĉeco.

Jesuo kiu deklaras feliĉajn la plorantojn, la suferantoj, estas frenezigulo; kaj vi scias ke la diraĵo: “la religio estas la popola opio” baziĝas ĝuste sur tiu interpreto de la beatanoncoj de Jesuo.

Jesuo kiu diras al la povruloj “feliĉaj kial? Ĉar vi iros en la Paradiso” “Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo”.

La malriĉuloj kiuj estas ja povruloj sed ne stultuloj ili sin demandas sed... Tamen bonvolu konsideri ke en la Paradizo iras ankaŭ la riĉuloj, eĉ ili antaŭeniras nin ĉar kiam li forpasas ili lasas oferojn por la mescelebroj; do ni estas trompitaj ĉi tie kaj trompitaj tie.” Ĉu eblas ke la Sinjoro deklaru beatanoncojn tiuj kiuj la homoj, rezonante per sia propra menso, konsideras misfortunajn? Neniam Jesuo deklaris beataj la povruloj, Jesuo ne venis por ekzalti la malriĉecon sed por ĝin forigi.

Neniam en la Evangelioj troviĝas la esprimo de Jesuo por beatproklami la kondiĉon de la malriĉuloj.

En la Evangelio laŭ Mateo, Jesuo diras: ““Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito”. Ne ĉiuj kiuj la societo faris malriĉajn, sed kiuj vole eniras la kondiĉon de malriĉeco por detrui ĝin ĉe ĝia radiko. La propono kiun Jesuo faras estas ununura kaj estas pozitiva: **malaltigu iomete vian vivnivelon por permesi al tiuj kiuj ĝin havas tro malaltan ĝin altigi.**

Tiu estas la beatanonco, tio estas sentu vin respondecajn pri alies feliĉo.

Kia estas la sekvo? Ĉar ilia estas....

Bedaŭrinde en la pasinteco la senscio pri la hebrea kulturo ebligis ke en Mateo la formulo **Regno de la ĉielo** celis diri la transmondon.

Regno de la ĉielo estas esprimo kiu troviĝas nur en la Evangelio laŭ Mateo kaj ne en la aliaj evangeliistoj kaj ĝi respondas al la regno de Dio.

Sed kial Mateo skribas "Regno de la ĉielo"? Ĉar la evangeliisto kiu sin turnas al juda komunumo atentis ne ŝoki ilian sentemon, kaj en la hebrea medio oni ne nur ne nomas Dion sed eĉ ne skribas pri Li.

Ili uzis anstataŭaĵojn kiel ankaŭ ni faras en la itala. Kiom da fojoj ni diras: danke al ĉielo, ni tute ne dankas la atmosferon, ni dankas Dion. Regno de la ĉielo signifas Regno de Dio.

Tio estas, Jesuo faras al ni proponon: se vi okupiĝas pri la bono, pri la bonfarto de la aliaj, vi estas feliĉaj! Kial? Ĉar vi permesas al Dio okupiĝi pri vi. Tio estas la beatanonco.

Nu, reveninte al la beatanoncoj: Luko sekvigas la beatanoncojn ne vegojn kiel oni kutime tradukas.

Jesuo ne malbenas, Li nenium minacas. La greka seprimo uhai estis tipa en la funebra ĝemado sur la kadavroj.

Do Jesuo priploras la riĉulojn kiel vivantajn kadavrojn. Ili fizike vivas, sed ili jam mortis ĉar kiu vivas deprenante alies vivenergion tiu kaŭzas alies morton kaj do tiu kaŭzas morton en si mem.

Do ni diris ke Luko estas la evangeliisto kiu pli ol la alia atentis pri la socia rango, pri ekonomia stato kaj pri la mono, la amasigo de mono li ĉiam vidas nee. Tie ĉi ni vidis ke la filo ĉion fordiboĉis kaj havas mankon. Ne nur li nenion plu havas, sed li li estas plu nenio.

Kiam homo strebas nur al mono, kiam li ne plu havas monon, ne nur **li ne plu havas, sed li ne plu ekzistas**. Li sin retrovas esti nenio. Diras proverbo treege vera en la Biblio, "la riĉecoj multobligas la amikojn, sed la malriĉulo estas forlasita eĉ de la amiko kiun li havas."

Do, kiam li ĉion fordiboĉis li sin trovas ne nur havanta nenion plu, sed estanta nenio plu.

Kiuj direktas sian feliĉon, sian tutan vivon al amasigo de mono estas homoj kiuj ne nur nenion havas sed eĉ estas nenio.

"Kaj li iris eklabori kiel servisto" li kiu hejme estis la mastro nun li eklaboras kiel servisto. Li abandonis sian patron kaj trovis mastron." Kaj li iris, kaj aliĝis al unu el la loĝantoj de tiu lando; kaj ĉi tiu lin sendis sur siajn kampojn, por paŝti porkojn".

Antaŭhieraŭ ni vidis ke en la listo de la bestoj la porko estas malpura besto, t.e. la kontakto kun la porko fermas al vi la rilaton kun Dio. Nu tiu knabo malsupreniras ĝuste al la socia kaj religia defalo.

Li hebrea homo iras paŝti la porkojn, tio estas li merĝiĝas ĝiskole en kompleta malpurecon.

"li deziris plenigi sian ventron per la karoboj, kiujn la porkoj manĝis". Li loĝas kun la bestoj kaj li reduktiĝis kvazaŭ besto, ĉar neniu donis ion al li.

En la domo de sia patro, kiel ni vidos, la servistoj havas abundon da pano kaj li troviĝas preskaŭ mortinta pro malsato.

Nu, kaj tie estas grava afero ĉar ofte en la predikadoj iom simpligitaj kiujn oni faras pri tiu ĉi peco oni prezentas tiun junulon kiel ekzemplon, kiel modelon de pento, kiel modelon de konvertiĝo.

Atentu! Ni restu ĉe la teksto: nenio en la teksto travidigas ke tiu filo decidas hejmenreveni ĉar li sin pentis.

Al li ne mankas la Patro, al li mankas la pano. Fakte la evangeliisto diras:” reveninte al si” tio estas jam reduktiĝinta al malsato li diris:” Kiom da dungitoj de mia patro havas panon abunde,. Do oni vidas ke tiu patro ne nur ne estis tro postulema mastro, sed, male, li traktis la servistojn kiel filojn, ili abundis je pano “dum mi ĉi tie pereas de malsato!” kaj estas la unua el la tri fojoj en kiu aperas la temo de la morto.

Do li rekonsciiĝas ĉar li estas premata de la piko de malsato; ne ĉar li pripentas la doloron kaŭzitan al la patro, sed pro la malsatpikoj. Mi rediras al li ne mankas la Patro sed al li mankas la pano kaj se, kiel nun ni vidos, li decidis rehejmeniri, ne estas pro la amo al la Patro, sed pro amo al la stomako.

Tiel li ne estas modelo de konvertiĝo aŭ de pento. Li estas knabo kiu ĉion kalkulas kaj rezonas surbaze de sia profito.

Surbaze de sia avantaĝo li lasis la Patron, surbaze de sia avantaĝo li decidas reveni al la Patro.

“Mi leviĝos, kaj iros al mia patro”. Tiu ĉi dirmaniero uzata de la evangeliisto Luko. (kaj ni diris ke la evangeliistoj estas tre gravaj verkistoj sed eĉ gravaj teologoj) Tiu verbo iros, ĉio estas la sana dirmaniero uzata de la profeto Hoŝea. Gravega profeto ĉar li estas tiu kiu la unua ŝanĝas la raporton de Dio kun Sia popolo. Kiu estis Hoŝea? Hoŝea estis profeto enamiĝinta al sia edzino sed la edzino lin daŭre perfidis. Iam kaj tiam ŝi forfuĝis de li kun amantojn. Naskis kun li 2 filojn tiu virino sed, de tempo al tempo ŝi forfuĝis de li sekvante amantojn; tiam, la lastan fojon Hoŝea koleriĝas, ŝin postkuras, ŝin retrovas, li listigas al ŝi ĉiujn ŝiajn kulpojn kaj (por la adultaj virinoj ekzistas la tuja publika ŝtonumado) atinginte la verdikton pri komdamno:.” Sekve...” La konsekvenco estis “mi ŝtonmortigas vin, nu Hoŝeo, atinginte la momenton de la verdikto, (la amo al tiu adulta virino estis tro granda), anstataŭ ol diri:”mi vin mortkomdamnas”, li diras: “Sekve ni iros fari alian geedziĝan vojaĝon”. Li diras, ni iru al la dezerto ni ambaŭ tute solaj, kaj Hoŝeo asertas: **“Kaj tie vi ne plu nomos min mian mastron, sed mian edzon”**.

La vorto edzo en la hebrea signifas kaj mastron kaj sinjoron. Jen kial la virino fuĝis. La virino fuĝis ĉar ŝi ne havis amrilaton al edzo sed ŝi havis rilaton de submetiteco al mastro; kaj ŝi serĉis amon.

Nu, Hoseo pardonas la edzinon sen iu ajn certeco pri ŝia konvertiĝo. Kaj tiam la profeto komprenas; se mi kiu estas homa estaĵo sukcesas tiel fari, puŝite de la amo al mia edzino, jen kiel faras Dio!. Kaj Hoŝeo estas la profeto al kiu Jesuo interligiĝas, kiu tute ŝanĝas la rilaton de la pardono kaj de la peko. Laŭ la religio la pekanta homo devis sin penti por atingi, poste, la pardonon de la pekoj. Hoŝeo el sia tragika persona sperto komprenas: Ne! Antaŭe venas la pardono kaj poste, eventuale, venas la vivoŝanĝo.

Tiel estas klare, en la religio ekzistas la pekanta homo, se li sin pentos, tio estas se li ŝanĝos sian vivon, li atingas la pardonon de la pekoj. Hoŝeo el sia sperto komprenas: Ne! Antaŭe venas la pardono kaj kiel sekvon de la pardono povas okazi la vivoŝanĝo. Do tiu dirmaniero”mi iros al mia patro”estas la sama kiun Hoŝeo enbuŝigas al la virino kiu reiras al sia edzo. “Kaj mi diros al li...”Tie ĉi la filo sin preparas al pentesprimo. Li scias ke laŭleĝe li perdis ĉiujn rajtojn esti traktata kiel filon, li perdis ĉiujn rajtojn povi esti akceptata en la domo, li decidas reiri hejmen, kaj tiam li sin preparas al pentesprimo por esti akceptata de tiu patro, “kaj mi diros al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo ...

(peki kontraŭ la ĉielo signifas peki antaŭ Dio kaj en la Biblio Dio diras: “Kiu pekas kontraŭ la ĉielo tiu estos elradikigita el la tero”)”... kaj antaŭ vi. Mi jam ne meritas esti nomata via filo”. Li perdis la ĵuran rangon de filo) kaj li petas” faru min kiel unu el viaj dungitoj”. Do li kiu adaptiĝis servi en fremda lando, kie li estas malaprezita kaj mistraktita kaj estas mortonta pro malsato, li decidas” Mi reiras hejmen, mi ne plu povos meriti esti traktata kiel filon sed tiel kiel unu el la dungitoj de mia patro kiuj havas panon abunde” Do li sin preparas al pentesprimo.” Kaj li leviĝis, kaj iris al sia patro.”Nun la sekvantajn agojn la evangeliisto prezentas al ni lantigite kaj ili estas gravegaj. Dion neniam iu ajn vidis, nur Jesuo estis Lia klarigo, do nun en la verboj kaj en la preposicioj kiujn ni vidos, Jesuo eksplikas al ni kiu estas Dio kaj temas pri vere emociiga kaj kortuŝa portreto.

Mi bondeziras kaj preĝas ĝuste en tiu tago ke tiuj ĉi vortoj, ne la miaj sed tiuj de la evangeliisto enpenetru en ni, ke ili enradikigu profunde en ni, kaj ili orientigu alimaniere nian vivon.

“...li estis ankoraŭ malproksime, lia patro lin vidis “. Do la patro akceptis la forfuĝon de la filo sed li ne lin abandonis.**Li atendis lin. Li vidis lin kiam li estis ankoraŭ malproksime.** Kia estintus la sinteno de orienta patro, sed eĉ tiu de normala patro? Nu, li lin vidas reveni de malproksime; atendas lin hejme, li atendigas lin, lin riproĉas, lin admonas, kaj poste,eventuale li povos esti reakceptata hejmen. “Sed la padro lin vidis kaj.. kortuŝiĝis. Rememoru tiun teknan verbon “**senti kompaton**”(ekcitiĝo de la patrinaj internaĵoj) kiu estas esprimon kiun oni uzas en la Malnova Testamento por indiki agon nure dian per kiu oni redonas la vivon al kiu ĝin ne plu havas.

Ĝi aperas tri fojojn en la Evangelio laŭ Luko, ni ĝin vidis en la parabolo pri la samariano (la samariano, la herezulo estas la nura kiu sin kondutas kiel Dio: li sentas kompaton al missortulo) oni retrovas tiun esprimon en la rakonto pri la reviviĝo de la filo de la vidvino el Naino, kaj tie en tiu parabolo. **La patro sentas kompaton.**

Kiam la pekanta homo reiras al patro( kaj tiu vere estas homo kiu tute merĝiĝis en la pekon), flanke de Dio ne ekzistas koleraj, punaj, minacaj reagoj sed Li moviĝas komplatsento al la pekulo, t.e. deziro komuniki vivon. La Dio de Jesuo, ni tion vidis plurfoje dum ĉi tagoj, ne estas Dio bona, sed Dio absolute nur bona. Dio estas amo kiu deziras transdoniĝi. **La Patro havas neniun alian manieron rekunligiĝi kun la homoj kiu ne estu senĉesa kaj kreskanta transdoniĝo de Sia amo kiu ajn estu la homa konduto.** “Li lin vidis kaj kortuŝiĝis kaj... (kaj ĉi tie estas miregiga kiun ni ne

esperus konante la orientan realon) Vi scias ke en Oriento la tempolimoj ne estas intensegaj kiel ĉe ni en Okcidento. La tempo havas tute alian mezurunon, oni vivas ege pli trankvile,serene. Miaj arabaj, palestinaj amikoj diras:”Vi estas riĉaj, sed estas malriĉaj je tempo. La nura esprimo kiun ni aŭdas de vi italoj estas:- mi ne havas tempon, mi ne havas tempon- ni estas povruloj sed ni havas tiom da tiu tempo! Do la temporitmoj kadencigas alimaniere kaj la rapidemo estas konsiderata kiel malboneduka trajto. Oni vivas, mi rediras tion, en alia temporitmon. Mi rememoras lecion pri granda filozofio, pri vivo, kiun al mi donis gvidanto en Egiptujo. En mia pensmaniero mi estas iom germana, tute preciza kaj ordema. Mi alvenis ĉe la egipta landlimo kun grupo da homoj, mi trovis la gvidanton kaj mi diris al li: Do,kiu estas la hodiaŭa programo”? Mi jam ĉion detaligis. Li min rigardas per tiu kamela rigardo kiu havas la egiptulojn kaj diras” por la momento ni enbusiĝas”. Bela! Por mi estis lecio, lecio kiun mi neniam forgesos. Mi kadencigis la tutan tagon: 9- 9,15- 9,30... , mi diras la tagprogramon al li kaj li “por la momento ni enbusiĝas”.

Neforgesebla lecio, pro kiu la rapidemo estas konsiderata kiel malbonedukiteco kaj neniam homo kuras. Kuri signifas perdi la honoron kaj tiom malpli patro alkuras al la filo. Se iu homo, edziĝita homo, kuras li perdas sian honoron, li malhonorigas sin. La rapidemo estas konsiderata kiel malbonedukiteco, kuri kiel malhonoro.

Nu kion faras la patro?: li kuras, li ne atendas ke la filo revenu kaj lin umiligas, sed la patro kuras renkonte al filo.

La deziro de la patro redoni la honoron al la malonoriginta filo estas pli forta ol sia propra honoro. La patro sin malhonorigas por redoni la honoron al malonoriginta filo. Do, Dio ne atendas ke la pentantulo alproksimiĝu al Li pentinta, umiliginta kaj ke li faru senti al Li la pezecon de ties kulpoj, sed la patro sopire atendas la horon kiam la filoj revenos al li kiu ajn estu la motivo. “Kaj Li kuras al li renkonte”.

Kaj tie ni konjektu ke ni estas la unuaj aŭskultantoj de tiu parabolo, kiu ne scias kiel ĝi finas. “ Li falis sur lian kolon kaj...” Ni opinias, kaj lin premsufokas. Kai lin premsufokas; la normala reago: “Li falis sur lian kolon, li falas sur lian kolon kaj lin premsufokas , la stultulaĉo! **Li** falis sur lian kolon kaj lin kisadis.”Atentu, kiam ni legas la evangeliojn ni ne devas ilin interpreti per niaj okcidentaj, romantikaj opinioj. Tiu ne estas simpla korinklinesprimo. Tie la evangeliisto rekonsideras la esprimon “li falis sur lian kolon kaj lin kisadis”, **kaj lin kisadis** el la unua pardono aperanta en la Biblio, kaj estas ĉiam, rigardu iomete, pro kaŭzo pri heredaĵo.

Temas pri heredaĵo kiun Jakobo trompokaptas al sia frato Esavo.

Vi scias pri Jakobo kiu ŝainigas esti Esavo kaj prenis el la patro la tutan heredaĵon kaj poste li fuĝis.

Kiam la kompatinda Jakobo vidas de malproksime, sur monteto,Esavon kun 400 armitaj homoj sur ĉevaloj, li pensas: la frazo devas ĉiam komenci per majuskla litero:”Estas finite”. Kaj fakte Esavo kuras al li renkonten , li falas sur lian kolon kaj lin kisadas. la kiso estas pardonesprimo. Do, la evangeliisto tie ripetas la unuan grandan pardonon kiu troviĝas en la Biblio.

Tiam kiel ni diris antaŭ nelonge, pri la profeto Jesavo: La Dio kiu manifestiĝas al Jesuo tute ŝanĝas la ritajn liturgiajn normojn. Estis la homo kiu devis sin penti, pardonpeti, pentofari kaj poste obteni la pardonon.

La Patro kiam li renkontas la pekantan filon unue, antaŭ ol la filo prononcu la pentesprimon kiun li estis preparinta, Li kisas lin, tio estas Li pardonas lin.

Memoru kiam antaŭhieraŭ ni diris ke peti la pardonon al Dio estas la plej neutila ago kiun la kredanto povu fari ĉar ni estas jam pardonitaj. Tiu pardono operaciigas kaj efikiĝas kiam ĝi transformiĝas en samtioma pardono al la aliaj.

Do, la patro, kaj en la bildo de la de la patro ni devas vidi la agon de Dio, kiam li renkontas la pekantan homon, unue, Li pardonas lin sen atendi la peko-konfeson, sen atendi la pentesprimon.

Ni diris ke la fonproblemo estas la heredaĵo. La heredaĵo en la Evangelio laŭ Luko estas ĉiam prezentata en negativa maniero ĉar se ekzistas heredaĵo, tio signifas ke kiuj ĝin lasas ne estis malavaruloj, grandanimaj homoj, sed ili estis avaruloj, avidaj homoj kiuj amasigis monon por si mem. Tiam en la heredaĵo kaŝiĝas ĉiam toksa veneno kiu transdoniĝas al la ricevanto.

Mi opinias ke iu supraĵa venĝo-maniero de la gepatroj al la filoj estas lasi heredaĵon. Ili certas ke la gefiloj neniam plu akordos pro tiu heredaĵo. Ĉar eĉ se homo havas 2 filojn kaj li havas 100 da posedaĵoj kaj lasas al ili 50 kaj 50 po unu, do, li opinias ke li faris la pli ĝustan agon, estos ĉiam filo malkontenta ĉar li pensis ricevi plie, ĉar mi vizitis lin pli ol vi. Mi konas homojn, fratojn, fratinojn kverelantajn de antaŭ multe da jaroj pro ŝranko, ĉar ĝi rajtas al mi kaj li ĝin prenis. Do la heredaĵo kiu fontas el avareco, kiam ĝi estas transdonita al gefiloj, transdonas al ili la mortigan venenon de la malakordo. Kaj el la heredaĵoj ĉiam naskiĝas, kiel ni vidis en tiu okazo, la trompoj, la arogantecoj, kaj la avidoj.

Nu, ni diris ke la patro falas sur lian kolon kaj lin kisas kaj la filo estas angorplena; li ne trovas juĝiston sed trovas kvazaŭ patrinan amon. Sed fidi estas bone, malfidi pli bone. Li estis preparinta sian pentesprimon kaj li startigas la diskon.

Sed diris al li la filo:” mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi, kaj mi jam ne meritas esti nomata via filo”(kaj ĉu vi memoras kiel finis la frazo) sed faru min kiel unu el viaj dungitoj” Nu, la patro ne permesas al li fini la frazon.

La renkontiĝo de la pekanta homo kun la Patro ne ĉiam estas tiu humiliga de la listo de la propraj pekoj, sed tiu, ĉiam riĉiga de la grandeco de la Dia amo, do, la filo, kvankam pardonita, ne fidis, kaj startigas la pentesprimon kaj li diras:” faru min kiel unu el viaj dungitoj”sed li ne sukcesas fini la esprimon kiun li preparigis kaj la patro ŝtopas lian buŝon,”sed...” tio signifas ke la patro interrompas la frazo de la filo. Kaj tie estas serio de tri frenezaj demencaj agoj indikanta ke la patra amo estas amo preteriranta la homajn kategoriojn kaj najbaras la frenezon. Sed tie kun tiuj ĉi indikoj la evangeliisto montras al ni kia estas la vera pardono flanke de Dio kaj sekve kia estas la vera pardono flanke de la homoj.

“Sed, Kaj diris la patro al siaj servistoj... (do la filo startigis la pentesprimon, la patro ŝtopas lian buŝon, vokas la servistojn kaj diras...) “Alportu rapide la ĉefan robon, kaj lin vestu-“La eksplikoj iom simplemaj pri tiu evangelipeco, oni opinias, nu, li estis

porkogardisto, li estis malpura, Li revestis lin, Li repurigis lin. Sed la evangeliisto ne donas tiun banalan interpreton, sed ion pli profundan. Tiuepoke, en tiu kulturo (jen kial estas ĉiam grave enmeti la Evangelion en ĝia kulturepokon), tiutempe la vestoj estis altvalora kaj multekosta varoj kaj ili estis uzataj de la reĝo kiel honoraĵo por siaj kuraĝuloj. Do kiam ĝeneralo estis venkinta batalon, la reĝo ne donis al li medalojn, ne ekzistis medalojn, sed kiel premion li donaĉis multekostan veston. Kaj la evangeliisto aludas al la faraono, kun Jozefo (reemoru la historion pri Jozefo kaj Putifaro) malprave kalumniita kaj enkarcerigita li estis.

Kiam evidentiĝas la senkulpeco de Jozefo kaj, skribas la verkisto, la faraono demetis el sia mano la ringon, ĝin enmanigis al Jozefo kaj lin vestis per vestoj el fajnega linaĵo. Tio estas la vesto signifas honoraĵon, la redonon de la antaŭe ricevitan dignon. Tiam la unua ago flanke de la patro al la filo, al la filo kiu sin malhonoris **Li redonas la dignon**. Li ne punas la filon kiu kulpis pro tiuj kulpoj, sed kiel premio por lia rehejmenveno Li donacas al li honoraĵon. Do la unua signo de tiu pardono estas redoni la dignon al la homo kiu ĝin perdis. Kaj la patro daŭrigas en sia freneza agado “kaj metu ringon sur lian manon” Estas frenezaĵo kion faras la patro! La ringo ne estis nur ĵuvelo, kiu scias kial li devis doni al li la ringon. Ni povus diri ke la ringo estis samvalora all la nuntempa kreditkarto. La ringon portis la domadministranto, ĝi havis la domsigelilon. Kiam oni iris butikumi, ne ekzistis la kreditkarto sed ekzistis la ringo kun la domsigelilo oni ĝin stampis sur vaksotableton aŭ sur argiltabuleton kaj ĝi fumciis ĝuste kiel nia kreditkarto.

Nu, la patro enmanigas la hejmadministradon al tiu kanajla kaj nekapabla filo kiu dum mallonga tempo disĵetadis ĉiujn siajn havaĵojn. Estas vera frenezaĵo. Neniu farus ion tian. Do, la patro ne nur renovigas al li sian tutan fidon, sed Li diras: “mi faras, nomumas vin hejmadministranton”.

Ankaŭ en ĉi tiu evangelipeco estas sendo al la malnova testamento, en la Libro pri Estera, kie oni legas ke la reĝo demetis sian ringon kiun li retirigis al Aman kaj ĝin donis al Mordeĥaj. Estera konfidis al Mordeĥaj la hejmadministradon kiu antaŭe apartenis al Aman. Do, tiu gesto pri dono de la ringo signifas atribui al homo kiu tenas la ringon la tutan kaj plenan hejmadministradon. Do la ago de la patro en la pardono, ni diris, estas redoni la dignon kaj pli grandan fidon ol tiu kiun oni donis antaŭe.

Antaŭe la patro ne donis al la filo la hejmadministradon; nun kiam li hejmenrevenis, li malsukcesis en sia vivo, la patro ne fastigas lin, Li ne diras al li: “vi ĉion konkludis per la mono, nun pripensas mi tion”, sed Li diras al li: jen vi fariĝas hejmadministranto”. **Kio kreskigas la homon ne estas la minacoj, sed estas plena fido, plialtigita amgesto.**

Ni ne scias kiel finiĝas la parabolo. Kaj kiu diras al ni ke, kiam ĉiuj, ĉar ili devas, festas, dormas, estas lacaj, dumnokte, tiu filo havante en siaj manoj la kredikarton, la hejmadministradon, li denove ne foriru kaj la sekvan matenon la patro sin retrovos eĉ nuda kaj kruda. **Tio estas la amrisko.** La amo riskas, la amo ne havas certecojn, sed la patro redonas al tiu ĉi filo sian tutan fidon. Kaj ne estas finite. Kaj poste, daŭrigas la evangeliisto, “kaj ŝuojn sur liajn piedojn”. Vidu, ili estas ĉiuj apartaj detaloj. Kial

la ŝuoj? En la domoj de la mastroj la nuraj kiuj portis ŝuojn estis la mastroj; la servistoj ĉiam iris nudpiedaj. Al li kiu volis reheimeniri por esti farata dungito de la patro, la patro diras: Ne, vi ne estas servisto, vi estas la mastro kaj vi estas liberulo”

La patro redonas al li la saman liberon.

Do ni vidis ke en la pardono de la patro estas gravaj tiuj ĉi tri faktoj ĉar tia devus esti la pardono kiun ni donas, **ĝi estas la redono de la digno, la redono de la fido, kaj la tuta redono de la libero.**

Estas tia la pardono aganta profunde en la individuon kaj, eventuale, konsentanta al li adresi alimaniere sian vivon.

La apenaŭaj pardonoj, ekzistas eĉ ofendaj pardonoj, tiuj kauzas pli da malbono ol da bono.

Kiom da homoj, devigitaj, ĉar ili perceptas ke Jesuo ĉiam stimulas al tiu ĉi pardono, aŭ kiam la predikanto aŭ la pastro insistas pri tiu pardono, finfine ili pardonas; “mi lin pardonis pro ami al la Sinjoro”. Tio estas se estus por vi... aŭ, mi memoras iam homo kiu laca senti la insiston per kiu el la predikejo mi ĉiam parolas pri tiu bezono pardoni la aliuloj, li venis al mi tute ĝojega kaj kontenta ((la ulo havis kontraston kun alia homo) li, do, diras: Patro Alberto mi sukcesis, ĉu vi scias, mi pardonis tiun ulon, tamen por mi estas kiel se li estus mortinta”. Li sukcesis, li finfine pardonis.

Tio ne estas la pardono, la pardono ne estas sukcesi pardoni kaj poste ekskludi la pardonito de nia ekzisto mem kiel se li estus mortinta .

La pardono estas redoni eĉ pli da vivo, plialtigi la rilaton kaj la pardonon, atentu, ĉar tiu ŝajnas esti la plej malfacila fendaĵo por la kredantoj, kiam vere ĝi estas la plej facila kaj la plej bela: **la pardono ne estas signo de febleco sed ĝi estas signo de forto.** Pardonu kiu faris al ni malbonon signifas: “Vidu, via kapablo fari al mi malbonaĵon neniam estos tiel granda kiel la mia ami vin kaj fari al vi bonon. Do estas la fortulo kiu sukcesas pardoni.

Pri la pardono ni havas maljustajn ideojn. Pluraj homoj diras: “Mi pardonas sed ne forgesas”. Sed oni ne devas forgesi! Se por pardoni oni devas forgesi, ni havas cerbon kiu rezonas kaj registras, ni memoras eĉ la maljustaĵon faritajn al ni dum nia plej frua aĝo. Se ni efektive ne sukcesas pardoni pro korinklino, nu faru ĝin almenaŭ pro nia kapo, ĉar atentu tion! Kiu ne pardonas tiu kreskigas la rankoron kaj la malamikan resenton ene de si mem, kaj tiuj aĝoj faras tiel ke la suferita maljustaĵo senmezure kreskas ruinigante tutan vivon. Ĉu neniam okazis al vi ricevi maljustaĵon, ne sukcesi ĝin pardoni kaj ke dum la tempopaso tiu ĉi maljustaĵo invadis ĉiun vian vivon?

La homo kiu faris al ni maljustaĵon eĉ ĝin forgesis, ni ne forgesas; ĉar ni manĝas, paŝas, dormas ĉiam kun tiu homo en nia kapo kiel vermo kiu nin rongas, kaj ruinigas nian vivon. Do, se ni efektive ne volas pardoni pro amo, almenaŭ ni pardonu pro sana egoismo: por bonfarti. Sed la vera pardono, kiu prosperigas kaj liberigas la homajn energiojn ekzistas kiam ne nur oni pardonas sed kiam oni bonfaras al homo kiu faris maljustaĵon.

Estas belega sento je pleneco, je libero, ĉar nia vivo eniras la vivon de Dio, la dian vivon.

Kaj ne estas finite. "...Kaj alportu la grasigitan bovidon" Tiuepoke oni malofte manĝis viandon kaj ĉiukaze nur okaze de la solenaj religiaj festoj. Nu, por la patro la rehejmeniro de la filo egalvaloras religian feston. "Kaj alportu la grasigitan bovidon." Tio estas tiu grasigita por la festo." kaj buĉu ĝin, kaj ni manĝu kaj estu gajaj". La patro faras neniun skoldon al la filo, ne lin kvarantenigas, ne lin limigas, ne lin punas. Ĉar li hejmenrevenis ni festu lin dumvive. **Estas tiel kiel Dio faras al la homoj.** Kaj li donas la eksplikon:" Ĉar ĉi tiu mia filo estis mortinta, kaj denove vivas; li estis perdita, kaj estas trovita. Kaj ili komencis esti gajaj."

Kiam la pekanta homo reiras al Dio estas festo en kiu Dio komunikas al li Sian gajecon, Sian vivenergion. Kaj jen, finfine, la vera ĉefrolanto de la parabolo.

Mi diris ke Jesuo, al kiu Li direktis tiun parabolon? Li direktas ĝin al la skribistoj kaj al la fariseoj skandaliĝintaj pro la sinteno kiun Jesuo havas al la pekuloj. Jesuo kiu kundividas Sian vivon kun la pekantoj. Do, nun en tiu frato estas prezentitaj la skribistoj kaj la fariseoj.

Nun lia filo la pli aĝa (la greka termino estas presbitero kiu signifas pliaĝulo kaj la evangeliisto ĝin elektas ĉar la presbiteroj, la pliaĝuloj estis sinedrianoj. La Sinedrio konsistis el ĉefsacerdotoj, el skribistoj, kaj el pliaĝuloj tio estas el presbiteroj.

Do, la uzado de tiu termino komprenigas al ni ke ĝi apartenas al la medio de la skribistoj kaj de la farizeoj). " Sed la pli maljuna filo estis sur la kampo; kaj kiam li venis kaj alproksimiĝis al la domo, li aŭdis muzikon kaj dancadon."

Bonvolu noti la kontraston: la patro vidas la filon kiam li estas ankoraŭ malproksime kaj Li kuras al li renkonten. Tiu ĉi pli aĝa filo revenas hejmen , domo kie oni kutimis funebri. La patro diris ke tiu filo mortis, nu, domo ensorbita en la malĝojon, li aŭdas de malproksime la muzikon kaj la dancadojn. Kion li devis pripensi?- Mia frato rehejmenvenis-.

Kiel eblas ke en mia domo, la domo de la funebro kie mia patro priploras la filon kiel mortintan, tie subite estu muziko kaj dancado? Sed li ne iras drekte al la domo, li eksuspektas. Ĉi tie la evangeliisto portretas la religiulon, ni jam diris ke Luko estas la evangeliisto kiu trempas sian plumon en la vitriolo . La religiulo estas morna homo, vivanta en funebra medio en fastoj, en humiligoj en punpagoj.

Ĉio kio odoras je vivo lin eksuspektigas. La vorto plezuro lin maltrankviligas; en la domo de la patro estas muziko kaj dancado! Sed ne estas plu pieco!

Kaj li ne sin sentas allogata de tiuj muziko kaj dancado, de tiuj vivesprimoj, sed li haltas kaj alvokas serviston." kaj demandis lin, kio estas tio." la reago de normala homo (mi aŭdas ke en la domo oni kantas kaj dancas) estas sin senti allogata kaj iri por vidi kio okazas. Ne! Li eksusspektiĝas, li haltas. La muziko, la dancado, kiuj esprimas la vivon paralizas la religiulon. Kaj li sendas serviston (do li prokrastas la scion pri la kialo de la evento) por informigi sin.

:" Kaj li diris al li: Via frato venis, kaj via patro..."- la afero kiu pli mirigis la serviston, ne estas tiom la ringo, la vesto, la ŝuoj, kio pli lin mirigis estas: Kaj via patro **buĉis la bovidon**, tiu grasigitan, ĉar li ricevis lin sana." (Tio estas tiu bovido kiun ni estis grasigintan por la grandega religia festo, ĉu vi ne scias ke via patro ĝin buĉis por la filo? Kio pli mirigis la serviston).

Nu, al la gajeco de la patro pro la reveno de la filo sekvas la kolero de la pli aĝa frato Sed li koleris, kaj ne volis eniri;” La du filoj estas praktike egalaj. Unu forfuĝis el la domo kaj la alia ne plu volas eniri ĝin.

Fronte al la amo de Dio estas du malsamaj reagoj. Li ne volas eniri la domon de la ĝojo, li ne estas kontenta pro la reveno de la frato sed li bedaŭras tiun elspezon de aĵoj; la grasigita bovido, tiu kiun oni devis manĝi okaze de la religia festo, ili ĝin formanĝas pro tiu via filo.

La patro kiel li iris renkonten al la pli juna filo, nun li iras renkonten al la pli aĝa filo. “Kaj lia patro elvenis, kaj lin petegis...” Estas grava la sinteno de la patro. La patro per la aŭtoritateco kiu havis la orienta homoj, Li povis ordoni al li. La patro ne ordonas, la patro lin petegas. La patro estas la mastro kiu sin faras servisto por ke la servistoj sin sentu mastroj, Li lin petegas... “sed li responde diris al sia patro:- jen (Kaj tie estas la portreto de la religiulo). Ni diris ke kun Jesuo estas proponita nova rilato kun Dio.

Ĉu la malnova interligo estis difinita de Moseo”servanto de Dio” kaj estis alianco inter servistoj kaj ilia Sinjoro, kiu baziĝis sur la obo al Siaj leĝoj, la nova rilato, la nova interligo proponita de Jesuo estas tiu de Jesuo filo kun la Patro. Do, rilato de filoj kun la patro, ne plu baziĝinta sur la obo sed sur la simileco. Kiun nun ni vidos estas gravega afero ĉar bedaŭrinde multaj kristanoj, aparte tiuj de la pasinta generacio estis kreskigitaj por esti servistoj de la Sinjoro kaj havi la timon al Dio, anstataŭ esti filoj de la patro kaj havi kun Li rilaton de Amo.

Rememoru kiam ni vidis la bildon pri la Dia juĝo, ĝi estis terura. Mi rememoras antaŭ kelkaj jaroj en esploro farita inter la studentoj de la papaj romaj universitatoj kaj inter la demandoj estis tiu ĉi. dum la fina juĝo, povante elekti el kiu vi juĝigos vin? Dio estis en la lasta loko. Estis la Sankta Virgulino, tiu kaj ĉi tiu... do la kreitaĵoj estis pli bonaj kaj kompatemaj ol Dio. Tiu estas la pensmaniero de la servisto. Bedaŭrinde en multaj kristanoj ekzistas pensmaniero de servistoj rilate al ilia Sinjoro, do timoplena, kaj kion faras la servisto? La servisto por kontentigi la mastron oferas al li kion al si estas plej kara.

(Do, atentu kion diras ĉi tie la evangeliisto, tio estas portreto de la religiulo). “Jen tiom da jaroj mi servas al vi.” Li ne estas filo kiu kunlaboras kun la patro, li estas servisto rilate al sia mastro.

Li estas ĝuste kiel la dungitoj. Li estas je la servo de la patro, sed li estas la mastro. Ĉu vi memoras ke la patro disdividis inter la filoj siajn havaĵojn? Li estas la posedanto de siaj havaĵoj, sed li tion ne komprenis. Li estas servisto kiu servas al sia patro.

Kaj rimarku la infaneco de la religiuloj. La religio bezonas teni la homojn en infaneco. La religio timegas la kreskadon kaj la maturecon de la homoj al ĝi subiĝintaj. Kion signifas la infaneco?

La infaneculo estas kiu ĉiam bezonas patron kiu lin diras kion, kiel, kaj kie agi. La matureculo estas kiu liberiĝas de la patro kaj agas laŭ sia propra penso. Kaj la religio teruriĝas kiam la homoj maturiĝas kaj ĉiam ĝi donas indikojn pri kio oni devas fari, ĉiam oni provas, vi ja scias. Se estas bone, ĉio glatas, se estas malbone ĉiam la

religiaj autoritatuloj ĉiam provas indiki al la homoj kiel ili devas sin konduti. Tio faras tiel ke la homoj restu en infaneco.

Notu la infanecon de tiu ulo: li estas la pli aĝa frato, li estas la presbitero. Li diras:” Kaj neniam mi malobeis vian ordonon.” (do li estas kiu obeas al la patro observante liajn ordonojn).. kaj... ŝajnas preskaŭ aŭdi la ploremas plendon) , tamen vi neniam donis al mi kapridon, por ke mi estu gaja kun miaj amikoj.”

Stultulo prenu ĝin ĉio estas via avajo! Ĉu vi atendis ke mi donis al vi kapridon? Ĉio estas via avajo.” Tiu estas la pensmaniero e la servisto. Ĉi tie kiel vi vidas estas prezentitaj la pensmaniero de la religiulo, la servo, la ordono kaj la rekompenco. Estas la pensmaniero de la religiulo. Kion li faras li ĝin faras por atingi rekompencon. Sed kun Jesuo ĉio ŝanĝiĝas. Ĉu vi memoras la diferencon inter la amo al Dio kaj la amo kun Dio? Oni ne faras aferojn por atingi rekompencon flanke de Dio. La rekompenco jam ekzistas, ĝi konsistas en la fakto ke oni jam estis trapenetrita per tiu Dia amo. La kredanto ne faras la aferojn por la Sinjoro, sed li ilin faras kun la Sinjoro kaj kiel Li kaj la efiko estas profunde malsama.

Do, tie, en tiu sinteno de la filo la evangeliisto kritikis la religian pensmanieron ; ili estas servistoj kiuj obeas kaj atendas por si ekompencon.

Kaj jen la akuzo.” Sed kiam ĉi tiu via filo..( ĉi tie la evangeliisto estas simpatia ĉar li ĝuste aludas al la familia medio. Estas klasikaĵo en la familioj. Kiam oni fieras pri la filo vi aŭdas la patron aŭ la patrinon- ĉar **mia** filo...Kiam estas io plendinda- ĉar **via** filo...- Ĉi tie li ne diras ĉar mia frato- Li diras:- sed kiam tiu ĉi **via** filo...- Li devintus diri- sed kiam mia frato...- Kiam oni devas honti, malŝarĝi, plendi, tiam temas ĉiam pri alies filo. Kiam oni devas sin glori temas ĉiam pri la Mia.....sed kiam tiu ĉi Via filo...(do, li preskaŭ neas esti la frato) kiu formanĝis vian havon kun malĉastistinoj,”... Kiel li tion scias? La evangeliisto diris ke li disperdis sian havon per diboĉa vivado. Li ne eniris en la plej etaj detaloj. Tiu estas la malico de la religiuloj.

La observantuloj tiom bone observas ke ili vidas eĉ kion ne ekzistas. Ili sin sentas tiom trankvilaj antaŭ Dio ke ili kuraĝas juĝi la aliajn.

Sincere tiu ĉi afero dirita de ulo kiu neniam kuraĝis malobei ordonon kaj neniam prenis por si kapridon, tiu esprimas delat pli aĝa frato pli ol el la kolero ŝajnas veni el la envio.

Li diras: “Li formanĝis vian havon kun malĉastistinoj,li rehejmenvenis, vi buĉis por li la grasigitan bovidon”.

Tiu estas la pensmaniero de multaj religiuloj. Ke Dio ne minacu. ke li ne punu la pekantojn, ke Li ne postulu longan pentvojon, sed ke li reakceptu ilin en Sia amo inundante ilin per Sia amo, tio estas netolereble:.” Do, mi dum la tuta vivo (rememoru, ni faris tiun ekzemplan)....Mi dum mia tuta vivo...”

Tiu ĉi plendas. La mastro, kiu estas Jesuo, diras:”Ĉu eble, vi estas enviema ĉar mi estas bona? Nu en la farizeoj, en la religiuloj, ekzistas envio pro la Dia boneco, anstataŭ ol esti ĝojaj:”Vidu la patron kiom Li estas bona! Al tiu ĉi homo kiu nenion meritas Li donas ĉiun Sian bonon, kiel tiu kiun Li donis al mi”.Anstataŭ ol tiu rilato de feliĉo, de kunhavo postvenas la kolero:”Ne ĝustas, ne ĝustas ke mi , kiu min

foroferis dum mia tuta vivo, havu la saman traktadon kiel tiu fiulo kiu formanĝis sian havon kun malĉastistinoj”. Sed li diris:” Mia naskito”( dum la filo sin turnis al la patro kolere, la patro sin turnas al li per termino plena je amemo, Li lin nomas **mia naskito**, sed la greka termino signifas “**infano**”. Do la patro sin turnas al li per granda amsento kaj lin traktas eĉ iom kiel stultulon. Li diras:” vi estas ĉiam kun mi, kaj ĉio mia estas via, ne necesis ke mi donis al vi kapridon, sed vi ne komprenis la plej esencan aferon: **ke ĉio mia estas via**”Estis la oboe kiu malebligis al li kompreni la amon kiun la Patro havis al li: kiu havas rilaton kun Dio baziĝanta sur la timo, sur la submetiĝo kaj sur la oboe, tiu neniam sukcesos malkovri la grandecon de la amo kiun la Patro komunikas al li. Do estas gravega admono tiu donita de la evangeliisto al sia komunumo:”Elektu ĉu vi volas vivi laŭ la religio observante la regulojn sugestitajn de la Dia leĝo, observante ĉiujn regulojn kaj priskribojn, faru ĝin, sed tiel vi neniam spertos la grandecon de la Patra amo. Do: ĉio mia estas via, sed konvenis esti gajaj kaj ĝoji; ĉar, notu, (ĉar **via** filo), la Patro:” ĉi tiu **via** frato; ( Li memoras al li ke temas pri lia frato), li estis mortinta, kaj denove vivas; li estis perdita, kaj estas trovita.” Do la patro invitas la filon ĝoji kun Li, ĉar la vivo estas pli forta ol la morto, Li invitas lin ĝojigi per la sama ĝojo de la Patro.

Ni vidis ke kiam la pekanto revenas al Dio, la Patro lin inundas per Sia amo kaj la Patro volus ke ĉiuj homoj transdonus unu al la aliaj tiun amon. Jen la parabolo finas, ni ne scias kia estos la reago de la pli aĝa filo, ni ne scias kia estos la reago de la plej juna filo, la nuran certan aferon kiun ni konas estas la Dia sinteno. Do la renkontiĝo de la pekulo kun la Patro, kun Dio ne estas tiu ĉiam umiliganta de la listigo de niaj kulpoj, sed tiu ĉiam riĉiganta de la grandeco de Ilia amo. Responde al iu demando kiu jam estis farita kaj pri kiu mi tenis la rajton respondi hodiaŭ, jen kial la eklezio ŝanĝas eĉ la formulojn, ŝanĝas eĉ siajn normojn, konforme al pliprofundiĝo de la mesaĝo de Jesuo.

Jam de antaŭ preskaŭ tridek jaroj oni tute renovigis la sakramenton kiun antaŭe oni nomis de la

konfeso, kaj nun ĝi ne plu nomas de la konfeso. Tio estas grava,” konfeso” oni akcentigis la deklaron de la propraj kulpoj, deklaro kiu kreis skrupulon; ĉu vi memoras la sinjorino kiu diris:”Mi konfesas kion mi faris kaj eĉ kion mi ne faris”? Ĉar se vi forgesis eĉ unu nuran kulpon.... Nun ĝi nomiĝas **sakramento de la repaciĝo** aŭ de la pento, sed pento ne en la senco de pentofari, sed en la latina senco de pento, tio estas ŝanĝo en la vivinklino. Nu, en la nova rito la centra punkto, eĉ se ĝi konserviĝas, ne tiom estas la deklaro de la kulpoj sed la aŭskultado de la vorto de la Sinjoro. Kiam sin renkontas la pekulo kun la Sinjoro, ne tiom valoras la deklaro pri kio la homo faris, kial? Ĉar je la okuloj de Dio aferoj kiujn ni opinias kulpaj eĉ ne estas tiaj. En la unua letero de Johano la verkisto diras:” Fileto se via koro (la termino koro laŭ la hebrea pensmaniero indikas la menson) eĉ se via koro riproĉas ion al vi, sed Dio estas pli granda ol via koro”. Kion li celas diri? Eĉ se via konscienco riproĉas ion al vi, ne zorgu! Ĉar Dio estas pli granda. Nia konscienco modeliĝas laŭ la komuna moraleco, sed ni vidas dum la tempopaso, kiel kelkaj aferoj kiuj estis konsiderataj malmoralaj, aŭ eĉ pekaj antaŭ kvindek jaroj hodiaŭ ne plu estas

tiaj. Do la rilato de la homo kun la Sinjoro devas esti tute je grandaj trankvilo kaj sereneco, ĝi ne estas la humiliga listo de la propraj kulpoj, sed la rekompenco, ebriiganta akcepto je la grandeco de la Patra amo.

Bone ni finis nian esploron pri la Dio de la evangelioj **Dio ne bona, sed Dio absolute nur bona.**

Kompreneble ni nur povis skizi kelkajn pecojn, kelkajn elementojn laŭ tiu ĉi vidpunkto, nun ni prenas 10 minutojn por spiri iomete, poste ni donos iom da spaco al la intervenoj, al la demandoj kaj pri kio ni eldiris hodiaŭ kaj pri tio kion oni eldiris ekde pasintvendrede vespere. Mi dankas vin.

### **Demando:**

Reprenu la frazon de la Patro Nia, “Pardonu al ni niajn ŝuldojn kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj”. Dankon.

### **Maggi:**

Verdire oni devus ree proponi ne nur tiun ĉi frazon, sed la tuta Patro Nia estus ree proponinda, ĉar la malĝusta aŭ nesufiĉa traduko nenion faras krom kreskigi miskomprenojn, ekde tiu “fariĝu via volo” kie Mateo ne skribas: “Fariĝu la volo” la verbo fari indikas homan agon, sed li uzas la verbon **plenumi** kiu indikas dian agon: ne estas la homo kiu diras: fariĝu, ni akceptas vian volon, estas la komunumo kiu diras: **plenumiĝu via volo**, tio estas via plano pri la homoj. preterlasante poste la miskomprenon pri la ĉiutaga pano, ne estas nun la okazo tie por eniri en ĝi. Sed ni vidos tiun tre gravan esprimon: “Pardonu al ni niajn ŝuldojn kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj” kutime ĝi estas erare simpligita kaj eksplikita per la pardono de la kulpoj: ni pardonas la kulpojn de aliuloj tiel Vi pardonas la niajn. nenio pli malproksimas de tiu teksto ol tiu spiritualisma ekspliko.

Tiu ĉi dirmaniero troviĝas en la evangelio laŭ Mateo. Memoru, ni diris ke Mateo skribas por hebrea komunumo kaj li klopodas prezenti Jesuon laŭ la vivo kaj la instruado de Moseo. Moseo sur la monto Sinajo proponis la aliancon per la dek ordonoj, Jesuo sur la monto, ne el Dio, sed Li kiu estas Dio proklamas la novan aliancon per la **ok beatecancoj**. Kiel akcepto-formulo de la malnova Interligo estis la Izraela kredo ĉe la ĉapitro 6 en la Libro de “Readmono”. Nu, la evangeliisto prezentas la Patron Nian kiel akcepto-formulo de la beatecancoj; do, la Patro Nia ne estas preĝo, sed en preĝformo, ĝi estas **la formulo je akcepto de la beatecancoj**. Sekve povas kompreni kaj sin esprimi per la patro Nia nur tiuj kiuj akceptis la beatecancojn, alikaze ĝi fariĝas babilaĵo, galimatio. La unua beatecanconco, kiu ne azarde troviĝas en la unua loko, sed estas sekvo de ĉiuj aliaj, ni ĝi jam vidis:” feliĉaj estas tiuj kiu vole, libere kaj pro amo fariĝas povruloj”, kiu ne signifas esti mizeruloj, sed ili malaltigas sian vivnivelon, por permesi al tiuj kiuj ĝin havas tro malaltan ĝin plialtigi; feliĉaj kial?, ĉar pri tiuj zorgas Dio. Dio estas Patro, do, kiuj faris tiun elekton, do ne riĉiĝi, ne amasigi, en la akcepto-formulo, ili

memoras tiun “**pardonu**”, kiu signifas forstreku, nuligu niajn ŝuldojn. Oni ne priparolas pekon, oni priparolas ŝuldojn, temas pri materiaj ŝuldoj. Pri kio aludas Jesuo? En la leĝaro kiu Lin donis al Moseo Dio esprimis Sian volon kiun Jesuo rekonsideras kaj ĝi estos tiu formulita de la unua kristana komunumo: “ke neniu el inter vi estu bezonanta”. Kiel oni povas kompreni, vi scias ke tiuepoke ĉiu popolo havis sian diaĵon, kiel povos la cirkaŭantaj popoloj kompreni ke via Dio estas la vera Dio? Facile: ĉar neniu el inter vi estu bezonanta.

La ununura pruvo ke Dio ekzistas en iu komunumo, estas kiam en tiu komunumo ne ekzistas homoj havantaj kaj homoj nehavantaj, ne ekzistas riĉuloj kaj bezonantoj, sed ĉiuj ion havas. Do, “ke neniu estu bezonanta” estas la Dia imperativo kiun Jesuo transprenas kaj difinas en la Patro Nia.

Tiuepoke por agi tiel ke neniu malriĉiĝus, oni publikigis leĝaron, sed kiel oni ja scias, kiam la leĝo estas farita oni ĉiam ĝin malobeas; Je ĉiu sepa jaro ĉiuj ŝuldoj estis nuligitaj, tiel ke neniu povus ŝuldiĝi kaj malriĉiĝus, do la ŝuldoj kiujn oni havis ĉe la tempolimo de la sepa jaro estis nuligitaj. Kaj vi komprenas ke tiu estis leĝo kiu devis esti favora al la malriĉuloj, sed ĝi estis iom naiva; ĝi direktiĝis kontraŭ la povruloj. Neniu pruntedonis monon se li ne havis garantion pli ol certa ke la pruntedono estus al li redonita, kaj kiu estis tiu stultulo kiu pruntedonis je la sesa jaro aŭ eĉ komence de la sepa jaro, sciante ke je la sepa jaro ĉiu estis nuligita? Do, tiu leĝo direktiĝis kontraŭ la povruloj, tiam Jesuo kiu venis iniciati la Dian regnon, novan rilamanieon ene de la komunumo, al la komunumo kiu akceptis la beatecanoncojn li ripetas tiun engaĝigon de la malnova testamento sed ne je ĉiu sepa jaro, sed kiel kutima agado de la komunumo. Ni kutime nuligas la ŝuldojn kiujn la aliaj havas al ni, ĉar ne eblas ke en la komunumo estu ŝuldanto kaj pruntedonanto, sed kiaj fratoj ni estas! Do kiel ni kutime ilin nuligas kaj ni estas rekoneblaj pro tio, tiel Vi nuligu niajn ŝuldojn al Dio, en la tiuepoka pensmaniero la homo estis ŝulda al la Patro pro ĉio kion li ricevis, pro la kreo de la mondo, pro la vivo, ktp. Do ne temas pri spirita rilato, pri ŝuldoj kiel pekoj, sed temas pri konkreta rilato. Vi komprenas ke eĉ se pardoni estas malfacile, pardoni estas unu afero, tute malsame estas nuligi la ŝuldon, do, iom post iom antaŭenigis la spiritan interpreton de la Patro Nia, sed la Patro Nia estas tre konkreta afero. Do, kiu preĝas la Patron Nian akceptis la beatecanoncojn kaj ne povas sin permesi postuli kreditojn kontraŭ la ŝuldantoj.

### **Demando:**

- Kiel do la Sankta Virgulino en Fatimo kaj en Medjugorje petas la vidkapablajn kaj la fidelulojn pri rezignoj kaj sinoferoj por la konvertiĝo de la pekuloj?

### **Maggi:**

Ĉu ĉi tie estas Radio Maria? Do ni parolas pri seriozaĵoj, pri la evangelioj tiu ĉi estas margenaj aferoj. (mi estas en la katolika eklezio, mi opinias ke vi plejparte apartenas al la katolika eklezio) Mi volus citi aĵon, en la katolika eklezio, la kredodoktrino

asertas ke oni estas perfekte kristana, tute katolika eĉ sen kredi neniokaze je la diversaj aperoj kiuj kadencigas la eklezian historion.

Do se oni ne kredas je iu ajn apero kiun oni prezentis dum la historia periodo, tiu ne havas ion malplian, kaj se oni kredas je tiuj aperoj oni ne havas ion plian, ĉar ili ne apartenas al scio pri la fido. La eklezio ne rifuzas la tielnomatajn aperojn, sed ilin ezamenas, se la mesaĝo entenata en la aperoj kongruas kun la mesaĝo de Jesuo, la apero povas esti aprobita, sed kiel akcesoraĵo, ne kiel io rilatanta la fidon, se la mesaĝo kontraŭas la anoncon de Jesuo, la tuta nesaĝo devas esti forlasata.

(La Sankta Virgulino estas tro konscienca por iĝi tiu mondvojaĝantino kiu trotetas ĉie ajn petante senspritegaĵojn.), sed klasikaĵo en la pseudoaperoj estas tiu: Madono kiu aperas kaj anoncas ke Dio naŭziĝis pro la pekoj de la homaro, Li pretas puni ĉiujn. Dio ne plu eltenas. La klasika bildo: la Virgulino kiu retenas la kolerigitan Dian brakon sur la homaro. “Mi ne plu eltenas. Se vi fastos, se vi preĝos eble Dio ŝanĝos Sian opinion, Li ne plu vin punos! Kiel pruvo pri ĉio aperos grandan eksterordinaran signon” Jen tion ni povas preni kaj enŝovi en la senfundan ujon de la religia stultaĵejo. Nenio el ĉio ĉi respondas al la evangelio. La Dio de Jesuo neniam koleras al la homaro sed Li estas **enamiĝinta al homaro** la Dio de Jesuo ne anoncas nek minacas punojn por la homaro eĉ ne kiam oni murdas lian filon mem. Dio estas amo kaj nenion alian Li deziras ol ami kaj al tiu pseudo- madono, kompreneble, ho povrulino, mi dirus: haltu vin iomete kaj foliumu la evangelion, vi restis iomete malantaŭe: provu revizii tiun vian fiksan ideon pri la fastadon. Kial naskiĝis tiu fiksa ideo de la pseudo-madonoj? (kompreneble mi ne estas priparolanta la veran Virgulinon, Ŝi estas tro grava). Kial naskiĝis tiu fiksa ideo pri la fastado? Memoru kiam ni diris ke gravas la traduko, nu en la evangelio laŭ Mateo estis esprimo de Jesuo post la resanigo de la epilepsia knabo kiu sonis jene; ĉar tiuspecaj li intencis diri: tiuspecaj demonoj oni ne elpelas se ne per preĝado. Punkto. Ekde la kvara jarcento p.K. iu kopiisto, eble monaĥo, aldonis “kaj per fastado”. Kopion post kopio tiu esprimo de Jesuo eniris la oficialan tekston. Tiam la kutimo de la fastado atingis ĝian kulminon ĉar estis Jesuo mem kiu tion diris: “Tiuspecaj demonoj oni ne elpelas se ne per preĝado kaj fastado” Iru vidi, do, nun la Evangelion kiun vi havas hodiaŭ kaj vi vidos ke tiu ĉi esprimo “la fastado” malaperis ĉar ĝi ne estis en la originala teksto. tiam oni devus konsili al tiu Madono kiu aperas ĉie ajn iomete trankviliĝi kaj iri vidi en la Evangelio, ke ŝi almenaŭ anoncu al ni evangeliaĵon.

jen vi vidas, do, ke temas vere pri stultaĵoj, pri infanecaĵoj. Mi jam de antaŭ multe da jaroj studas ĉiujn tiujn okazaĵojn, la mesaĝoj el Medjugorje, tiu Madono kiu aperas seninterrompe dirante la plej kompletajn bagatelaĵojn. Hodiaŭ mi diras al vi, estu bonaj kaj preĝu, (nu, kia pacienco necesas!, se vi devas veni el la ĉielo por diri al ni...) la postan tagon: hodiaŭ preĝu kaj estu bonaj”, kiaj gravaj mesaĝoj! Estas vere absurdaĵoj, pro amo al Dio, mi respektas kiu volas kredi je tiaj aferoj sed ili nenion aldonas sed super ĉio ili estas malproksimaj de la anonco de Jesuo kaj ĉiuj kiuj petas de Jesuo signon, ili ĉiam estas riproĉataj de Jesuo kiel senkreduloj kaj obstinkapuloj. En la religio oni petas signojn por povi kredi. Jesuo rifuzas kaj proponas la

malon:”kredu, tio estas, donu al mi konsenton kaj vi mem fariĝu signo kiun la aliaj povas vidi”.

### **Demando:**

Hieraŭ vi diris, rilate la morton, ĝis kiam ni vidas nian karulon mortintan, ni ne ekkonscias ke li vivas. Bonvolu tion ekspliki pli bone: humane kiam forpasas karulo li mankas al ni, oni devas akcepti la funebron, kiel ni povas pensi ke nia karulo vivas?

### **Maggi:**

Ekde antaŭ multe da jaroj mi kredis kaj predikis tiujn ĉi temarojn pri morto, sed ĉiam mi demandis min, kiam tio okazos al mi, tio estas kiam forpasos ĝuste unu el miaj gefanilanoj, ĉu tio veros? Ĉar jes, ja mortis geamikoj, mortis malproksimaj parencoj, sed kiam mortos mia karulo, kaj ne havante familion, temas ĝuste pri la pli karaj homoj: mia patro kaj mia patrino, tiam ĉio ĉi veros? Antaŭ naŭ jaroj mortis mia patro kaj ilia morto konfirmis ĉion je kio mi kredis kaj do kion mi anoncis rilate la morton: mi ŝanĝis nur unu aferon: Mi opiniis, ĉar tiel oni instruis al mi ke kiam mortas nia karulo mortas io el ni, kaj mi tion diradis, kiam mortas karulo mortas io el ni. Kiam mia patro mortis mi sentis en mi nereteneblan viveksplodon, mi restis iom mirigita poste mi komprenis. Sed estis klare: mia patro kiu tiom min amis, nun kiam li estas en la ĉielo, nun kiam li eniris en la plenon de la dia vivo, lia amo plifortigis la amon de Dio kaj li ne povas ne ĝin komuniki. La morto ne detruas la homon, sed ĝi estas viveksplodo, kaj tiu estas komunikata. Vidu, en ĉiu el ni ekzistas kapabloj, nekredeblaj amenergioj en la mallonga daŭro de nia vivo ni ne sukcesas ĉiujn evoluigi. Kelkfoje okazas dum malfacilaj momentoj, Ĉu al vi neniam okazis havi malsanan parencon, kaj devi lin flegi? Kiaj energioj, kiaj fortoj kiaj rezistoj kia abnegacio estas tiam en ni kiujn ni ne supozis havi!

Venis la okazo kiu ilin startigis, ili jam ekzistis ne estis ebleco ilin evidentigi. Nu, la momento de la forpaso estas tiu kiam ĉiuj energioj entenataj en la individuon, ĉiuj la amkapabloj eksplodas, liberiĝas kaj kreskas. **La morto ne detruas la homon sed lin plifortigas.** Jesuo priparolas ĝin kiel greneron kiu, terenfalinte, ekputras, sed ĝi estas viveksplodo, kio naskiĝas estas tritikspiko. Tiam kiam mortas nia karulo kia estas la sinteno? Laŭnature ĝi estas sinteno de malĝojo kaj doloro, ne de malespero, ĉar jes, ja ĉar mortas la homo **kiun** ni fizike povis tuŝi, brakumi, ami, tamen... ni devas ŝanĝi nian pensmanieron. Antaŭ ĉio la kristanismo ne favoras la kulto pri la mortintoj, la Dio de Jesuo ne estas la Dio de la mortintoj sed Li estas la Dio de la vivantoj. La Dio de Jesuo ne revivigas la mortintoj sed Li komunikas Sian vivon mem al la vivantoj, Li estas la Dio de la vivantoj. Tia estas la Dio de Jesuo. Do ni devus antaŭ ĉio nin iom distancigi de la kulto pri la mortintoj kaj ŝanĝi tiun pensmanieron kiu al ni vidigis niajn karulojn ĉie ajn en la universo perdiĝintaj en la ĉielo, se ni estis bonŝancaj. Niaj karuloj daŭrigas sian vivon en la pleno de la Dia sfero kaj la amo kiun ili havis al ni ne malpliigas, kontraŭe ĝi kreskas, ĉar ili daŭrigas nin ami per la

sama amo de Dio, kaj do, por ilin percepti vivaj, vivantaj kaj vivigantaj ni devas ŝanĝi nian pensinklinon. **Ĝis kiam ni staras antaŭ la tomboŝtono por plori la mortinto, ni ne rimarkas la vivanton kiu estas apud ni.**

Kiam Maria Magdalena estas en la tombo por plori, ŝi ne rimarkas ke estas Jesuo kiu atendas pacience malantaŭe, nur kiam ŝi sin turnas kiam ŝi ŝanĝas sian pensinklinon, ŝi vidas ke Jesuo vivas.

Do, niaj karuloj kion ili faras, kie ili estas? Ekzistas preĝo kies origino en si mem estis bela, sed kiu sin montris tia kia dumviva karcero:”riponon eternan donu al ili...”pro amo al Dio: ripozi por eterne estas pli malbona afero ol dumviva karcero! Kion oni faras? Kiam ni estis etuloj en la katekismo por doni al ni la ideon pri la paradizo oni diradis al ni: imagu ke vi estas en la kinejo, en la teatro kaj ke sur la scenejo estas Dio kaj vi dum la tuta eterneco admiras Lin. Dio! mi estis teruroplena pro tiu ideo! Mi kiu ĉiam estis vigla kaj ne sukcesis haltigi min dum pli ol kvin minutoj.... La ideo resti dum la eterneco rigardi tiun ĉi Eternan Patron...! Kiu estos eĉ simpatia kaj bela sed post kelkaj jarmiloj venas al ni la ideon ŝanĝi... televidan kanalon! Nu Jesuo priparolas nin daŭrigantan vivon.

La ripozo eterna estas eltirita el iu esprimo de la Libro de la Apokalipso kie la verkisto diras:Feliĉaj tiuj kiuj mortas en la Sinjoro iliaj agoj akompanas ilin kaj ili eniras la Dian ripozon “. Dio kreis la Homaron, dum la sepa tago Li sin ripozis, la ripozo signifas partopreni en la krea ago de Dio, ĝi ne signifas la neaktiveco. Niaj karuloj estas ĉielenprenitaj de Dio kaj vokitaj kunlabori al kreo nia kaj de la tuta vivo. Do, la funebro se ĝi volas esti akceptata, ĝi ne estas tiu postsopiri mortintan homon, sed (ĉar kiam oni priparolas tiaĵojn,oni bezonas ĉiam multe da respekto kaj da delikateco) se tio eblas ĝi estas provi fari sperton kun vivanta, viviganta homo kiu estas niaflanke kaj kiu kelkmaniere klopodas sendube komuniki kun ni kaj komprenigi al ni ke li estas en la pleno de la vivo.

### **Demando:**

Kion vi opinias pri la rigoreco de la eklezio fronte al divorcitaj kaj separataj homoj kiuj ne plu povas geedziĝi en la eklezio. poste estis ankaŭ alia demando ligita al tiu ĉi rilate la homojn geedziĝintaj en “Komunejo”

“Ĉu komunejo en la senco de Urbodomo”? “Jes”.

### **Maggi:**

En la evangelio praktike oni ne parolas pri geedziĝo, tiu ne estas temo al kiu Jesuo interesiĝas, tiu estas eklezia disciplino. La eklezio estas ŝanĝiĝanta, ni vidis, rememoru, la florencan koncilion kaj la Vatikanan koncilion, 5 jarcentjn, sed la eklezio ŝanĝiĝas, eĉ se tio ĝin faras malrapide, kaj bedaŭrinde, estante Roma eklezion ĝi centriĝas en Romo, en Italio kaj la divorcio estas treege nova realaĵo el ĝuste antaŭhieraŭa itala situacio. Antaŭe la divorcio estis nur aĵo, amerika, aktora afero, do en la itala societo la divorcio ne estis konsiderata. Ĝi estas novaĵo pri kiu la eklezio

troviĝis ne preparita por ĝin mastrumi kaj kiu forglitis el ĝia mano; hodiaŭ la eklezio troviĝas en tiu kontraŭdiro: por ĝi pli gravas la divorcio ol la murdo.

Ĉar se oni murdas homon, la edz(in)on, oni poste povas esti pardonata kaj reakceptata en ĉiuj sakramentoj, se oni divorcias oni ne plu povas esti pardonata. Tiam vi komprenas ke ekzistas kontraŭdiro, ĉu eblas ke la murdo pli malgravas ol la divorcio? Kaj kiel, do la eklezio strumbas sur tiu obstaklo, post kiam Jesuo, kiu lasis al Sia eklezio la kapablon pardoni ĉiujn kulpojn? Mi nun tion diras por maldramigi iomete la situacion :kiam alvenas ĉe mi homoj kiuj havas tiun ĉi problemon, mi diras: “Sed kiu estas la problemo, murdu vian eksedzinon por la itala leĝo vi estos enkarcerigita dum unu aŭ du jaroj, poste vi reedziĝos kaj vi estos en ordo. La eklezio je ĝia komencigo ne permesis la duan edziĝon al la vidvoj, do, dum jarcentoj la eklezion malpermesis al la vidvoj reedziĝi, poste, finfine, ĝi tion permesis. Sed ĝis la dua Vatikana Koncilio en la geedziĝrito de la vidvoj mankis la benon por la edzino. Do vi vidas kiom da tempo postulis la eklezio! Mi opinias ke la eklezio sekvinte la pentan kutimon de la alia granda eklezio, nome de la ortodoksa eklezio, aŭ tiu de la luterana eklezio.... (hieraŭ ni vidis la geedziĝon de la princo Karlo kun tiu Sinjorino, kiu estas divorciita, ŝi ne estas vidvino, kaj mi ne scias ĉu vi rimarkis tion, je la komenco estis penta peco kie ili petis pardonon pro la kulpoj kiujn ili havis al siaj edzo kaj edzino mem) La eklezio ekde la komenco situis la homojn vvantajn en tiu situacio en iu pentvojo kiu, normale, daŭris tri jarojn kaj poste ili estis tute reakceptitaj en la eklezia komunumo. Tion faras kaj la ortodoksa kaj la anglikana eklezioj kaj mi opinias ke estas dezirinde ke kiel eble plej baldaŭ tio okazu ankaŭ en la katolika eklezio. Oni ne povas suferigi homojn pro leĝoj kiuj ne havas certan enradikiĝon en la instruado de Jesuo, almenaŭ, en la ortodoksa eklezio, por tiu kiun oni nomas la senkulpan edz(in)on, eĉ se poste estas tre malfacile, ĉar, foje la senkupulo estas la kulpa, kaj la kulpulo estas senkulpa) Sed oni ne povas trudi vivon plenan je sufero al la homoj, kaj mi opinias esti optimisme preparata akcepti novaĵojn, ni esperu, nun, kun la venonta papo, ni esperu, ĉar nun la situacio pretas, kaj, do tiu estas eklezia leĝaro kiun li povas ŝanĝi, ni esperas ke ekzistos la motivo.

### **Demando;**

Kiu laboras sur si mem tiu pliigas propran egoismon, ĉu vi povas pli bone precizigi tiun vian esprimon? Ĉu laboro sur si mem ne povas prepari la terenon por la Dia ago?

### **Maggi:**

Ne! kiu koncentriĝas sur sin mem tiu nur kreskigas sian egocentrismon. La individuo ne sin konas kiam li koncentriĝas sur sin mem sed nur en rilato kun la aliaj. Kiam mi estas sola aŭ kiam mi estas kun la Sinjoro tiam mi sentas min bonege ĉar mi min pravigas mem, mi ne min kontraŭdiras. Kiam mi min konas mem, kiu estas Alberto, la problemo naskiĝas kiam mi kolizias kun la aliaj. kiam mi ne komprenas kial ili kuraĝas pensi alimaniere ol mi, sed estas tiel klare, estas tiel simple, kiel li permesas

al si tiu frato pensi malsame ol mi pensas, tiam eĉ startigas en mi nervozecsentojn, aŭ sentojn pri agresemo. La ekkono de individuo ne okazas kiam li eniras sin mem, ĉar ĝi povas esti iluzia, kaj ĉiukaze li povas kreskigi sian egocentrismon, sed ĝi okazas kiam la individuo rilatas kun la aliaj. Estas granda mistikulo de la pasintaj jarcentoj Majstro Eckhart, kiu havas eksterordinaran esprimon, li diras:”Se vi kontemplas,( kaj li enmetas la plejan ekzemplon de kontemplo, tiu pri la ŝtre sankta Triunuo), se vi kontemplas la Triunuon kaj via frato petas iom da teo al vi, lasu la Triunuon kaj iru prepari la teon, la Dion kiun vi trovas estas pli fidida ol tiu kiun vi lasas”. Do la individuo kreskas, maturiĝas, realiĝas ne laŭmezure ke li eniras sin mem, kaj nuntempe estas laŭmoda en la diversaj filozofioj serĉi sin mem. Senutila tempo. Ekzistas du senutilaĵoj: serĉi sin mem kaj serĉi Dion. Kiu serĉas Dion, tiu Lin neniam trovas, ĉar li serĉas sian propran bildon de Dio, en la evangelioj Jesuo ne invitas al serĉado de Dio, sed al la **akcepto de Dio en la eksistado mem**. Ne necesas serĉi Dion, Dio tute manifestiĝis en Jesuo, oni devas nur akcepti Lin kaj eĉ la serĉado de si mem povas esti senrezulta kiom estas granda la homa ambicio. Rememoru la peco el la evangelio laŭ Johano en la 15<sup>a</sup> ĉapitro la fruktodonan branĉon, la Patro pripensas purigi, ne ĝin tranĉi ĉar la branĉo povus difektiĝi. Do kion volas diri la evangeliisto? La nura via respondeco estas kiel plifeliĉigi la aliajn. La nura via streĉo estas: “hodiaŭ kiel mi povas feliĉigi la homojn kun kiuj mi vivas? Hodiaŭ kiun agrablaĵon mi povas fari por ke la aliulo ridu, por ke li estu kontenta? La nura via streĉo estas tiu ĉi afero pri vi pensas la Patro, kaj la ŝanĝo mi vin certigas estas garantiata je tuta avantaĝo de la homoj. Hieraŭ vespere ĉetable mi rakontis epizodon kiun mi travivis mem, ankaŭ mi estis edukita pri tiu religio, tiam mi vivis la karesmojn laŭ radikala maniero per pentofaroj, fastoj, rezignoj, mi ĉiam atingis la karesman finon perdiĝinte plurajn kilokramojn el mia pezo, mi estis ĉiam kun elĉerpitaj fortoj. Mi atingis la kvardekan tagon ĉiam lace konsumita kaj ĉiu karesmo alcelis forigi mian mankon. Mi trovis mian mankon kaj tiam ĉiu karesmo, la pentofaroj, la rezignoj, la longaj preĝhoroj celis elradikigi tiun mankon, atinginte la kvardekan tagon mi estis elĉerpita kaj la la manko fortikiĝis, ĝi ĝuste sidis sur trono, mi kreskigis ĝin kaj ne komprenis la kialon. Poste venis la ekkono de la evangelioj, sed estas klare, mi koncentriĝis dum la tuta karesmo sur min mem, mi ne havis tempon por la fratoj, ĉar mi devis preĝi, mi ne havis fortojn por la fratoj, ĉar mi estis lace konsumita pro la fasto aŭ pro la pentofaro tute koncentriĝinta sur min mem. Kiu koncentriĝas sur sin mem nenion alian faras ol fortikigi sian egoon, sian egoismon. kaj do, pro amo al Dio, ĉiuj proponoj estas bonaj, ankaŭ tiuj de kiu skribis tion al mi, mi ĉion respektas, sed la individuo kreskas kaj maturiĝas, ne kiam li koncentriĝas sur sin mem, sed kiam li koncentriĝas sur la aliulojn.

### **Demando:**

Hieraŭ oni petis vin pri la ordono de Jesuo, iru al kiuj vi formetos la pekojn ili estos formetitaj, mi laboras ĉe industria fabriko kie estas atestantoj de Jehovo, ni manĝas kune kaj priparolas tiaĵojn kaj ilin diris la samajn aferojn kiujn vi mem diris, ke ĉio

fontas el la traduko, ke ĉio fontas el la evangelia lingvaĵo, ĉio fontas el tio, jen kial ni ne plu bezonas iri nin konfesi, kaj ili sarkasme respondas al mi: estas bedaŭro ke la eklezio via katolika eklezio ene de malmulte da tempo forigos eĉ tion. Ni pere de tio havigis al ni multajn sekvantojn. Mi demandas: kie kuŝas la malsameco?

### **Maggi:**

Ni klarigu eĉ pli bone tiun miskomprenon pri tiu sakramento: atentu la pardonon de la pekoj, Jesuo estas tre klara: pardonu kaj vi estos pardonataj. Jesuo ne povis esti pli klara. **Tiu sakramento ne utilas, ĝi ne alceligas la pardonon de la pekoj sed ĝi utilas por harmoniigi nian vivon mem kun la plano kiun Dio havas pri la homaro, pri via vivo mem.** Jen kial la centra punkto en tiu sakramento, bedaŭrinde ne realigita fare de tiom da pastroj, ne tiom konsistas je la propra pekconfeso kiom je **la aŭskultado de la vorto de Dio.** La nova rito antaŭvidas la centran punkton: ke oni malfermu la Evangelion aŭ la Biblion kaj ke oni legu el ĝi paĝon taŭgan por la individua situacio.

Mi faras al vi ekzemplon pri tiu sakramento kiel mi ĝin vivas, mi respektas la religiecon de ĉiuj homoj kaj do oni devas ĉiam iri renkonten al la homoj, tiam mi diras: prikonsideru, kion vi faris tute ne interesas al mi, vi konas kion vi faris, la Patro tion scias pli bone ol vi, ĉar aferoj kiujn vi konsideras malbonaj aŭ kulpaj, al Siaj okuloj ne estas tiaj, do ni forigas ĉion kaj anstataŭe ni aŭskultas la vorton de Dio rilate al iu flanko de via vivo kiun vi sensas deficita, kiu ne harmoniigas kun la plano je pleneco de via vivo kiun Dio havas pri vi. Dio ne limigas sed Li pliriĉigas la homojn! Estas ni kiu starigas la limojn, ĝenerale la limoj kiujn ni starigas estas la egoismo, la avido, ĉar por Jesuo la individuo valoras laŭmezure ke li estas grandanimulo, kaj la individuo kiu ne estas grandanima ne valoras; kutime estas tiuj la limoj, la rankoro, la malamika resento, aŭ la mensa fermiteco, la alligiteco al bildoj de la pasinteco, tiam ni laboras sur tion, do ni transdonas la potencon de la Vorto de la Sinjoro kaj la grava momento en la nova repaciĝa rito de la konfeso estas la transdono de la Spirito pere de la mansurmato sur la individuo. Tiu estas tre antikva gesto: surmeti la manojn signifas disdonon de vivo, transdonon de la spirito. Tiu estas la sakramento. Do ĝi ne utilas tiom por akiri la pardonon de la kulpoj ĉar vi povas iri vin konfesi kiom vi volas (ni uzas ĉi tie tiun malnovan terminon), sed se vi ne pardonas nenion estas pardonata al vi. **Pardonu kaj vi estos pardonitaj.** Sed tio ne sufiĉas, gravas ne nur la malpozitiva flanko sed ankaŭ la pozitiva flanko. Harmoniigi nian vivon kun tiu de Dio. Tio dirite, antonomazie la sakramento kie ĉio tio realiĝas estas tiu kiun, se vi volas, ni celebros. En la **Eŭkaristio** estas la pardono de la kulpoj, en la Eŭkaristio estas la enigo de forto, de dia energio kiu vin donas la kapablon ĝin superi; kiam ĉe la komenco estas la pentesprimo kaj la formulo: "Dio kiu estas la Patro ĉiopova kaj estas kompatema al ni, Li pardonas al ni ĉiujn niajn pekojn." Li pardonas niajn kulpojn: estas jam la pardono; kiam ĉe la momento de la Komunio: "Tiu estas Mia sango verŝata por vi kaj por ĉiuj por la forigo de la pekoj". Ĉe la momento antaŭ la Komunio: "Jen la ŝafido de Dio kiu forigas la pekojn de la mondo"

kaj kiom da fojoj ni devas insisti pri tiu forigo de la peko! Do, la Eŭkaristio estas la ĉefa sakramento kie ĉio tio okazas. Nur ni rezonas per nia centrigo pensmaniero kie ni havas abundon da preĝejoj, abundon da pastroj, eĉ tro da Mesoĵ, povas esti abunde da ili, sed la eklezio rezonas por la tuta mondo kie estas tutaj landoj grandaj kiel Italio, sed kie verŝajne estas ununura pastro kaj li ne povas iri celebri la Eŭkaristion ĉie ajn, kaj tiam, en tiuj ĉi okazaĵoj oni valorigas eĉ tiuspecajn sakramentojn, sed mi rediras por nia situacio restas la sakramento de la konfeso laŭbezzone de la individuoj, sed kio estas unuaranga ĉiam estas la centra sakramento: grava estas tiu kiun ni baldaŭ celebros. (prefere nun ni konkludas ĉar jam estas tempo nin pretigi.) Mi rediras: tio estas la Eŭkaristio, la festeno de la pekuloj, tie ĉiuj estas akceptataj, krom ununura homkategorio: la ĵustuloj, la homoj kiuj sin sentas senkulpaj antaŭ Dio havas neniun rilaton kun tiu kiu estas la tagmanĝo de la pekuloj.